



Gramatiko de Esperanto

verkita de BAK Giwan
tradukita de KIM Uson

2015

Korea Esperanto-Asocio

Gramatiko de Esperanto

**verkita de BAK Giwan
tradukita de KIM Uson**

2015

Korea Esperanto-Asocio

Gramatiko de Esperanto (reviziita)

Unua eldono _ 1994. jul. 15

Verkinto _ BAK Giwan

Tradukinto _ KIM Uson

Eldonejo _ Hanshin Publishing Co.

(Seulo, Koreio. Registrita : 1973 Jun. 25, N-ro 4-18)

Presita en Seulo, 1994

© Kopirajto ĉe la eldonejo

Rearanĝo por e-libro(reviziita) _ KIM Uson

Dezajno de e-libro _ Seongmungihoeok

Unua eldono de e-libro _ 2015. ???

© Kopirajto de e-libro ĉe Korea Esperanto-Asocio

Antaŭparolo al la revizio

Jam pasis 26 jaroj depost la ekapero de tiu ĉi libro. Pli ol kvarono de la jarcento.

Mi dankas ĉiujn, kiuj uzis la libron por la studo de la gramatiko de Esperanto. Kvankam kun multaj plibonigendaj problemoj, ĝi estis utiligita de multaj esperantistoj, kaj tial jen povis aperi la reviziita eldono.

Jam de longe mi deziris fari revizion de la libro, sed pro diversaj kialoj la deziro ne estis plenumita. Kaj ĉi foje danke al la decido de Korea Esperanto-Asocio la reviziita eldono povis aperi en la formo de e-libro.

La reviziita eldono estas skribita pli konforme al la morfologia vidpunkto de gramatiko kompare kun la unua eldono. Precipe en la 3-a ĉapitro (Sintakso), en la klasifiko kaj ekspliko de adjekta subpropozicio vi trovos multajn ŝanĝojn. En la unua eldono ili estis faritaj relative laŭ la semantika vidpunkto, kaj ĉi tie multe pli strikte laŭ la morfologia vidpunkto.

Kvankam ŝanĝiĝis la gramatika priskribo, tute ne ŝanĝiĝis la lingvo, Esperanto mem. Gramatiko estas nur la ordigo kaj klarigo de vivanta

lingvo. Tial gravas la facila lerno kaj kompreno de la lingvo kaj ĝia strukturo, kaj ne tiel gravas, kiun gramatikan priskribon vi sekvas. Oni devas kompreni, ke gramatiko ne povas klarigi ĉiujn aspektojn de la lingvo. Ni ne devas tro multe atendi de gramatiko. Ni nur utiligu ĝin por konsulto.

Mi esperas, ke multaj lernantoj kaj studantoj de Esperanto ricevos helpon pere de la libro por pli facila kompreno de la gramatika strukturo de Esperanto.

BAK Giwan

en printempo, 2015.

ĉe Yanbian Universitato de Scienco kaj Teknologio, Ĉinio.

Antaŭparolo

Mi vidas, ke multaj finlernantoj de la elementa kurso de Esperanto volas plu lerni la gramatikon de esperanto. Sed por ili ekzistas nur *Plena Aanaliza Gramatiko de Esperanto* (PAG, 1980. UEA). La libro tamen estas tro komplika pro la tro semantika vidpunkto de la aŭtoroj. Por komencantoj de la gramatiko de Esperanto ĝi ne servas kiel bona gvidilo.

Mia speciala studo estas korea lingvistiko, kaj mi havas grandan intereson pri gramatiko de Esperanto. Dum longa tempo mi deziris verki gramatikan libron de Esperanto facilan sed kompletan por ordinaraĵ esperantistoj. Nun mi metas finan punkton al mia deziro, finverkante tiun ĉi libron per miaj ĝisnunaj scioj pri Esperanto kaj ankaŭ per la scioj pri ĝenerala gramatiko akiritaj tra mia faka studo.

Mia libro diferencas je diversaj punktoj ol PAG. Precipe la strukturo de gramatiko estas radikale malsama, kaj tial mi bezonis novajn gramatikajn fakvortojn. Mi uzas novajn fakvortojn en mia libro. La libro do aspektos iom fremda al tiuj, kiuj studis per supre menciita PAG. Sed ni devas scii, ke nia lingva vivo persistas sen ajna ŝanĝo, senkonsidere kiom da gramatikistoj starigas kiom da gramatikaj sistemoj. Alivorte, kiel ajn ni

klarigas la gramatikon de Esperanto, senŝanĝe restas nia ĉiutaga Esperanto. Ni povas diri, ke gramatiko estas la ordigo kaj strukturigo de realaj lingvaj fenomenoj. Tial estas des pli bone, ju pli simplaj kaj klaraj estas la ordigo kaj strukturigo.

Mi esperas, ke de nun multaj lernantoj de Esperanto povos pli facile kompreni ĝian gramatikan strukturon kaj ĝustigi la parolan kaj skriban vivon de Esperanto per tiu ĉi libro.

Mi esprimas elkoran dankon al tiuj, kiuj diligente partoprenis en mia gramatika kurso okazinta en la oficejo de Korea Esperanto-Asocio, kaj samtempe mi konfesas, ke la kurso estis la bazo de tiu ĉi verko kaj la interparoloj kaj diskutoj, kiujn mi faris kun la kursanoj, estis granda helpo al mia laboro.

Fine mi elkore dankas d-ron Chang Choong-sik, prezidanto de Dankook Universitato, kiu ebligis al mi bonan cirkonstancon por la studo de la gramatiko, kaj ankaŭ s-ron BAK Tae-geun, prezidanto de la libroeldonejo Hanshin Munhwasa, kiu afable eldonis la libron. Kaj mia sincera danko iras al profesoro Bak Ji-hong kaj profesoro So Gilsu, kiuj ĉiam gvidas mian studon.

BAK Giwan

en aprilo, 1989

Esperanto-Instituto de Dankook Universitato

Antaŭparolo de Tradukinto



Iuj diras, ke ĉe lingvo-lernado plej bona metodo estas interparolado. Kaj ili diras ankaŭ, ke gramatika studo ne estas tiel grava afero. Jes, mi samopinias kun ili, nur se la lernata lingvo estas sia denaska lingvo. Kaj mi konsentos pri la opinio, se ni facile kaj ofte havas ŝancon interparoli en la lingvo.

Sed efektive Esperanto ne estas denaska lingvo por plejparto de homoj. Sekve multaj devas aparte lerni la lingvon. Kaj ĉe la lernado, se ni ne bone scias gramatikon, ni baldaŭ frontos limon de lernado. Precipe se ies denaska aŭ gepatra lingvo havas strukturon tute malsaman ol tiu de Esperanto, li certe bezonas studi la gramatikon, por sufiĉe posedi la lingvon. Por ĝuste kompreni kaj esprimi en la lingvo, oni devas bone kompreni la gramatikon. Necesas do libro, per kiu oni povas facile kaj bone lerni la gramatikon.

Tiu ĉi libro estas bona gvidilo por la gramatiko de Esperanto. La aŭtoro sisteme klarigas la gramatikon, por ke oni komprenu ĝin facile kaj komplete. Li estas lingvisto pri korea lingvo. Li doktoriĝis per la disertacio ‘Studo pri Morfologia Kontrasto de la Korea kaj Esperanto’. En lasta jaro, mi lernis de li Esperanto-gramatikon per tiu ĉi libro, skribita en korea lingvo. Post la lernado mi povis memfidi ne nur je skribado kaj parolado de

Esperanto, sed ankaŭ je ĝia instruado.

Mi decidis esperantigi la libron, por ke ne-koreaj Esperantistoj povu lerni per ĝi, kaj ankaŭ kompreni, kiel korea lingvisto klarigas la gramatikon de Esperanto. Kaj mi esperas, ke tiu ĉi traduko fariĝos unu malgranda monumento okaze de la 79-a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo.

En originalo la aŭtoro uzis novajn fakvortojn, kiujn li mem elpensis, apudmetante la terminojn de PAG en krampoj. Sed mi ne faris tiel. Mi uzis terminojn de PAG, kredante, ke ili estas pli kutimaj al multaj Esperantistoj en la mondo. Sed mi foje uzis la novajn terminojn, se ili estas pli taŭgaj al la strukturo de tiu ĉi gramatiko. Ekzemple mi senŝanĝe uzis la vorton ‘junkcio’ por la supera nocio de konjunkcio plus subjunkcio, kaj ankaŭ la vorton ‘liganto’ por la frazelemento, kiu ligas du lingvajn formojn. Kaj la ‘epiteto’ kaj ‘adjekto’ de tiu ĉi gramatiko havas malsamajn senco-kampojn kaj funkciojn ol tiuj de PAG.

Kaj la parto de ‘kompleksaj frazoj’ (III.3.3.) estas nove skribita de la aŭtoro mem. La aŭtoro diras, ke li tute ŝanĝis la enhavon konforme al sia gramatika vidpunkto. Antaŭe li preskaŭ senŝanĝe sekvis la opinion de PAG ĉe tiu parto, sed nun li ne plu sekvas tiun tro semantikan vidpunkton de PAG. Lia gramatika vidpunkto estas morfologia. Kaj tial ankaŭ tiun parton de ‘kompleksaj frazoj’ li klarigas en tiu vidpunkto.

Mi elkore dankas la aŭtoron pro tio, ke li bone instruis al mi la lingvon, kaj helpeme reviziis mian tradukon.

KIM Uson

en februaro, 1994

Enhavo

Antaŭparolo / 5

Antaŭparolo de Tradukinto / 7

Enkonduko / 15

I. Fonologio

I.1. Fonologia sistemo de Esperanto	19
I.1.1. Konsonantoj (21)	19
I.1.2. Duonvokaloj (2)	20
I.1.3. Vokaloj (5)	20
I.2. Specialaj trajtoj de Esperanta fonologio	23
I.3. Alofonoj kaj Sonŝanĝoj	24
I.4. Rimarkoj	25
I.5. Kio estas bona prononco de Esperanto?	26

II. Morfologio

II.1. Analizo de morfemoj	28
II.2. Parolelementoj	30
II.2.1. Kriterioj de la klasifiko de parolelementoj	30
II.2.2. Klasifiko de parolelementoj	30
II.2.2.1. Substantivoj	30
II.2.2.2. Pronomoj	31
II.2.2.2.1. Personaj Pronomoj /	31
II.2.2.2.2. Tabelaj Pronomoj /	32
II.2.2.2.3. Rilataj Pronomoj /	33
II.2.2.3. Numeraloj	36
II.2.2.3.1. Legi nombrojn /	36
II.2.2.3.2. Numeralaj Adjektivoj /	37
II.2.2.3.3. Numeralaj Adverboj /	37
II.2.2.3.4. Algebraj Esprimoj /	37
II.2.2.4. Verboj	38
II.2.2.5. Adjektivoj	39
II.2.2.6. Adverboj	41
II.2.2.7. Prepozicioj	44
II.2.2.8. Junkcioj	49
II.2.2.9. Interjekcioj	53
II.2.3. Studindaj problemoj	55
II.3. Vortofarado	61
II.3.1. Derivado	61
II.3.1.1. Prefiksa Derivado	61

II.3.1.2. Sufiksa Derivado	64
II.3.1.3. Aspekto	69
II.3.1.4. Voĉo	70
II.3.1.4.1. Aktivo /	71
II.3.1.4.2. Pasivo /	72
II.3.1.4.3. Faktitivo /	72
II.3.1.4.4. Medialo /	73
II.3.1.5. Participo	74
II.3.1.5.1. Substantiva uzo /	74
II.3.1.5.2. Adjektiva uzo /	75
II.3.1.5.3. Adverba uzo /	76
II.3.2. Kunmetado	77
II.3.2.1. Adjektivo + substantivo	78
II.3.2.2. Transitiva verbo + objekto	79
II.4. Konjugacio	80
II.4.1. Finitivo	80
II.4.1.1. Indikativo	80
II.4.1.2. Kondicionalo	81
II.4.1.3. Volitivo	83
II.4.2. Infinitivo	85
II.4.2.1. Subjekta uzo	86
II.4.2.2. Objekta uzo	87
II.4.2.3. Predikativa uzo	88
II.4.2.4. Epiteta uzo	89
II.4.2.5. Adjekta uzo	90
II.4.2.6. Predikata uzo	91
II.5. Deklinacio	92
II.5.1. Nombro	93
II.5.2. Kazo	93

II.5.2.1. Specoj de kazo	93
II.5.2.2. Nominativo	95
II.5.2.3. Akuzativo	96
II.5.2.4. Genitivo	99

III. Sintakso

III.1. Analizo de frazelementoj	101
III.1.1. Frazelementoj kaj parolelementoj	101
III.1.2. Diversaj frazelementoj	101
III.1.2.1. Subjekto	102
III.1.2.2. Predikato	103
III.1.2.3. Predikativo	104
III.1.2.4. Objekto	106
III.1.2.5. Adjekto	108
III.1.2.6. Eпитeto	108
III.1.2.7. Liganto	110
III.1.2.8. Memstaranto	111
III.2. Studindaj problemoj	112
III.2.1. Ĉu numeralo povas funkcii kiel subjekto, objekto aŭ predikativo?	112
III.2.2. Adverbo kiel subjekta predikativo	113
III.3. Specoj de frazo	114
III.3.1. Simplaj frazoj	114
III.3.2. Oblaj frazoj	115
III.3.3. Kompleksaj frazoj	117

III.3.3.1. Implikita subpropozicio	118
III.3.3.2. Subjekta subpropozicio	119
III.3.3.3. Objekta subpropozicio	120
III.3.3.4. Predikativa subpropozicio	122
III.3.3.5. Epiteta subpropozicio	123
III.3.3.6. Adjekta subpropozicio	126
1) Adjekta subpropozicio kun la subjunkcio ‘ke’ /	126
2) Adjekta subpropozicio kun la subjunkcio ‘ĉu... ĉu...’ /	127
3) Adjekta subpropozicio kun rilativoj /	127
4) Adjektaj subpropozicioj kun ceteraj subjunkcioj /	130
5) Adjektaj subpropozicioj de komparativo kaj superlativo /	131
III.3.4. Subjekta frazo kaj sensubjekta frazo	135
III.3.5. Indikativa frazo • Volitiva frazo • Kondicionala frazo	138
III.3.6. Priskriba frazo kaj Demanda frazo	139
III.3.6.1. Ĉu-demanda frazo	139
III.3.6.2. Ki-demanda frazo	140
III.3.6.3. Ceteraj demandaj frazoj	142
III.3.7. Pozitiva frazo kaj Negativa frazo	142
III.4. Specoj de sintagmoj	144
III.4.1. Klasifiko laŭ formo	145
III.4.2. Klasifiko laŭ funkcio	145
III.4.2.1. Subjekta sintagmo	146
III.4.2.2. Objekta sintagmo	146
III.4.2.3. Predikativa sintagmo	147
III.4.2.4. Epiteta sintagmo	147
III.4.2.5. Adjekta sintagmo	148

Enkonduko

1. Plejparto de la gramatikaj fakvortoj en la libro estas nove elpensita de mi. En multaj lokoj la kutimaj fakvortoj, aperantaj en PAG, estas skribitaj en krampoj.

[ekz: nomvorto(substantivo)]


2. Iuj ekzemplaj frazoj en la libro estas cititaj el PAG.

3. Je la klarigo de gramatiko mi konsideras la formon plej grave. Alivorte mi unue klasifikas laŭ formo ol laŭ funkcio aŭ senco. Mia sinteno je la klarigo de gramatiko estas tia, ke oni devas havi forman bazon por fari ian juĝon.

4. La ordo de la gramatika klarigo en la libro estas jena. Ĝi estas laŭ la gramatika strukturo de Esperanto, kiun mi starigis.

I. Fonologio


II. Morfologio



<Rimarko>

1) 'Junkcio' mi nomas la parolelementon, kiu kunligas vortojn aŭ sintagmojn aŭ propoziciojn. Al ĝi apartenas konjunkcio kaj subjunkcio.


III. Sintakso




<Rimarkoj>


- 2) 'Adjekto' mi nomas la frazelementon, kiu rilatas nur al predikato.
- 3) 'Epiteto' mi nomas la frazelementon, kiu rilatas al aliaj frazelementoj krom predikato.
- 4) 'Liganto' mi nomas la frazelementon, kiu kunligas vortojn aŭ sintagmojn aŭ propoziciojn.
- 5) 'Memstaranto' mi nomas la frazelementon, kiu havas rilaton kun neniu frazelemento de la frazo.

2. Specoj de frazo





3. Specoj de sintagmo



I. Fonologio



I.1. Fonologia sistemo de Esperanto

En Esperanto ekzistas 28 fonemoj, kaj ilia sistemo estas jena.

I.1.1. Konsonantoj (21)

maniero \ loko	labialo	alveolaro	palatalo	velaro	glotalo
plozivo	p b	t d		k g	
afrikato		c	ĉ ĝ		
frikativo	f v	s z	ŝ ĵ	ĥ	h
nazalo	m	n			
lateralo		l			
frape		r			

<la maldekstra estas senvoĉa kaj la dekstra estas voĉa>

I.1.2. Duonvokaloj (2)

maniero \ loko	palato	velo
glite	j	ŭ

I.1.3. Vokaloj (5)


alteco \ loko	antaŭe	malantaŭe
alta	i	u
meza	e	o
malalta	a	

La prononcoj de la 28 Esperanto-literoj laŭ la Internacia Fonetika Alfabeto (IFA) estas jena.

literoj	a	b	c	ĉ	d	e	f	g	ĝ	h	ĥ	i	j	ĵ
prononcoj	a	b	ts	tʃ	d	e	f	g	ɡʒ	h	x	i	j	ʒ
literoj	k	l	m	n	o	p	r	s	ŝ	t	u	ŭ	v	z
prononcoj	k	l	m	n	o	p	r	s	ʃ	t	u	w	v	z

Jen estas konkretaj artikulaciaj lokoj kaj manieroj de konsonantoj kaj duonvokaloj de Esperanto.

- ① nazkavo
- ② lipoj
- ③ dentoj
- ④ alveolo
- ⑤ palato
- ⑥ velo
- ⑦ uvulo
- ⑧ langopinto
- ⑨ langoantaŭo
- ⑩ langomalantaŭo
- ⑪ langoradiko
- ⑫ epigloto
- ⑬ voĉkordo
- ⑭ traĥeo
- ⑮ ezofago
- ⑯ faringa muro



〈bildo de parolorgano〉

/p/,/b/: Prononciĝas ĉe 2. Oni prononcas ĝin, eksplodigante du lipojn post kompleta fermo.

/f/,/v/: Prononciĝas ĉe 2. Oni prononcas ĝin, frotante du lipojn, el kiuj la malsupra iom kliniĝas al la supraj dentoj.

/m/: Prononciĝas ĉe 2. Oni prononcas ĝin, eligante la aeron tra buŝkanalo kaj samtempe tra nazkanalo.

/t/,/d/: Oni prononcas ĝin, eksplodigante 8 kaj 4 post kompleta fermo. Iuj algluas 8 al 3.

/c/: Oni prononcas ĝin, momente frotante 8 kaj 4 en la momento, kiam oni deprenas 8 disde 4. Iuj algluas 8 al 3.

/s/,/z/: Oni prononcas ĝin, frotante 8 kaj 4. Iuj frotas 8 kaj 3.

/n/: Oni prononcas ĝin, eksplodigante 8 kaj 4 post kompleta fermo. Aero fluas tra buŝkanalo kaj samtempe tra nazkavo. Iuj algluas 8 al 3.

/r/: Oni prononcas ĝin, 2-3 fojojn malpeze tuŝante 4 per 8 per la forto de la fluanta aero.

/ĉ/,/ĝ/: Oni prononcas ĝin, momente frotante 9 kaj 5 en la momento, kiam oni deprenas 9 disde 5.

/ŝ/,/ĵ/: Oni prononcas ĝin, frotante 9 kaj 5.

/k/,/g/: Oni prononcas ĝin, eksplodigante 10 kaj 6 post kompleta fermo.

/ĥ/: Oni prononcas ĝin, frotante 11 kaj 7.

/h/: Frotosono prononcata ĉe 13. Sed oni ne scias ĝian ekzaktan artikulacian lokon. La aero ne-barite fluas tra la buŝkanalo post trapaso de 13.

/j/: Oni prononcas ĝin, proksimen aligante 9 al 5. Oni ne frotas ilin, sed nur fluigas la aeron inter ili. Se oni frotas ilin, la prononco fariĝas konsonantoj /ŝ/ aŭ /ĵ/.

/ŭ/: Oni prononcas ĝin, proksimen aligante 10 al 6. Oni ne frotas ilin, sed nur fluigas la aeron inter ili.

<Rimarko>

En la supra klarigo, kiam ekzistas du fonemoj, la dekstraj estas respektive la voĉaj sonoj de la maldekstraj. Voĉaj sonoj diferencas de la senvoĉaj nur per la vibrado de voĉkordo, kaj iliaj artikulaciaj lokoj kaj manieroj estas tute samaj.

I.2. Specialaj trajtoj de Esperanta fonologio

La plej okulfrapaj trajtoj de la fonologio de Esperanto estas la principo de ‘unu litero por unu sono kaj unu sono por unu litero’ kaj la principo de akcento. Akcento senescepte falas sur la antaŭlastan silabon de vorto. Kaj krom ili ni povas mencii kelkajn pliajn trajtojn.

Unue, en unu radiko de Esperanto neniam troviĝas duoblaj konsonantoj. Ne ekzistas sinsekvoj kiel -bb-, -tt-, -ss-, -kk-, ktp. Se troviĝas tia sinsekvo en iu vorto, ni devas scii, ke la vorto estas kunmetita aŭ derivita vorto. Ekzemple la vortoj ‘huffero’ kaj ‘ekkrii’ estas havas jenajn konstruojn respektive ‘huf-fer-o’ kaj ‘ek-kri-i’. Sed ĉe tio ekzistas kelkaj esceptoj kiel Finno(ano de la ĉefgento loĝanta en Finnujo) kaj Mekko(ĉefurbo de Heĝazo, religia centro de islamismo, en Saudi-Arabujo). Sed ili ne prezentas gravajn problemojn, ĉar ili havas la karakteron de propra nomo.

Due, oni povas prononci /p/, /t/, /k/ aŭ aspiracie kiel /p^h/, /t^h/, /k^h/ aŭ glotigite kiel /p'/, /t'/, /k'/. Lingvanoj el la Hind-Eŭropa kaj la japana ne povas bone distingi inter la aspiracia kaj glotigita sonoj. Sed koreoj devas bone distingi ilin por sia lingva vivo. Kaj tial por koreoj la elekto inter la aspiracia kaj la glotigita estas tre grava afero. Sed universale oni prononcas ilin laŭ sia plaĉo.

Trie, la radiko de Esperanto konsistas el minimume unu silabo. Alivorte ĝi devas havi almenaŭ unu vokalon. Ekzemple la nomoj de Esperantaj konsonantoj estas ‘bo, co’ ktp, sed tiam la <o> ne estas finaĵo. Ĉar tiam la <b,c> ne povas esti radikoj. Unu konsonanto sola ne povas konsistigi unu silabon, kaj do ĝi ne povas esti radiko. Tial ni devas kompreni, ke ili estas substantvioj en siaj kompletaj formoj kun <o>. Kaj ankaŭ la artikolo ne

konsistas el <l-> kaj <-a>, sed ĝi mem en kompleta formo estas unu vorto.

I.3. Alofonoj kaj Sonŝanĝoj

Se unu fonemo prononciĝas diverse laŭ cirkonstanco, la diversaj sonoj nomiĝas alofonoj, kaj el ili unu reprezentanto estas elektata kaj nomata reprezentanta fonemo. Ekzemple la reprezentanta sono de la fonemo /n/ de Esperanto estas [n]. Sed la [n] estas prononcata jen [ŋ](Kiam oni prononcas /lingvo/, /sango/, la /n/ prononciĝas [ŋ].), jen [ɲ](Kiam oni prononcas /panjo/, la /n/ prononciĝas [ɲ].). Kaj tiam [ŋ] kaj [ɲ] estas nomataj alofonoj de la fonemo /n/. Tio estas la fenomeno, ke la alveolaro /n/ prononciĝas [ŋ] kaj [ɲ] antaŭ respektive la velaro /g/ kaj la palatalo /j/, similigante al ili. Kaj la fenomeno estas universala. Sed en la korea la sono [ŋ] estas unu fonemo(/ㅇ/). Kaj tial oni ne nomas ĝin alofono, sed oni traktas la fenomenon kiel sonŝanĝo(la fenomeno, ke iu fonemo ŝanĝiĝas al iu alia fonemo en certa cirkonstanco). Ĉi tie ni devas atenti, ke tio, kio prononciĝas [ŋ] estas ne /ng/ sed nur /n/. Tial kiam ni esperantigas koreajn vortojn, la maniero uzi 'ng' por la korea fonemo /ŋ/ estas ne ĝusta. Principe en Esperanto ne ekzistas litero por la sono [ŋ], alivorte en Esperanto ne ekzistas la fonemo /ŋ/.

Krom tio ekzistas sonŝanĝoj kiel ‘voĉiĝo’ kaj ‘senvoĉiĝo’. Tio estas la fenomeno, ke senvoĉaj sonoj fariĝas voĉaj antaŭ voĉaj sonoj, kaj ankaŭ inverse la voĉaj fariĝas senvoĉaj antaŭ senvoĉaj sonoj. Ekzemple /ekzameno/ kaj /absolute/ prononciĝas respektive /egzameno/ kaj /apsolute/. Tiu sonŝanĝo ne estas deviga sed arbitra, kaj ĝi estas nomata ‘similiĝo’. Kaj

inter sonŝanĝoj ekzistas ‘enŝovo’, kiu estas la fenomeno, ke /j/ enŝoviĝas post la vokalo /i/, se iu alia vokalo sekvas la vokalon /i/. Ekzemple /mia/ kaj /kial/ prononciĝas /mija/ kaj /kija/. Tio ankaŭ estas arbitra.

I.4. Rimarkoj

Iuj esperantologoj volas rigardi ‘dz’ kaj ‘nj’ kiel memstarajn fonemojn. Sed tia opinio estas kontraŭ la fundamento de Esperanto, t.e. la principo ‘unu litero por unu sono kaj unu sono por unu litero’. En iu ajn kazo tiu principo devas esti observita. Kaj samtempe ni devas priatenti la limon de silaboj. Ekzemple kiam ni prononcas la vorton ‘edzo’, ni devas rekoni, ke la silabolimo estas ‘ed/zo’, kaj ni devas atenti, ke ni ne enŝovu vokalon [i] post /d/. Koreoj ofte enŝovas la vokalon [i] post /d/ pro la influo de la korea. Tio estas eraro.

Kaj kiam ni prononcas la vorton ‘panjo’, la silabolimo estas ne ‘pan/jo’, sed ‘pa/njo’, ĉar duonvokalo faras oblan vokalon (diftongo) kune kun simpla vokalo. En Esperanto ekzistas teorie jenaj oblaj vokaloj.

ja je ji jo ju ŭa ŭe ŭi ŭo ŭu
aj ej ij oj uj aŭ eŭ iŭ oŭ uŭ

Sed el ili praktike uziĝas nur /ja je jo ju aj ej oj uj ŭa aŭ eŭ/.

I.5. Kio estas bona prononco de Esperanto?

En Esperanto ne ekzistas t.n. nacilingva parolanto. Tial ni povas diri, ke ne ekzistas modelo de prononco, kiun ni povas sekvi. Sed teorie ekzistas ideala prononco. Fonetikisto d-ro John C. Wells diris en sia verko *Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto* (p.p. 25-26, 1978, UEA), ke bona prononcado de Esperanto estas jenaj prononcadoj.

1-e, la interparolantoj el malsamaj gentoj ne havu malfacilon por kompreni unu la alian.

2-e, oni prononcu laŭ la fonologia sistemo de Esperanto, t.e. oni observu la principon ‘unu sono por unu litero’.

3-e, la prononcoj ne malkovru la nacian aŭ regionan apartenecon de la parolanto.

4-e, oni prononcu tiel, kiel oni universale akceptas.

Se vi prononcas laŭ supre menciitaj kvar manieroj, via prononco devas esti tre bona. Praktike la plej malfacila afero ĉe la prononcado de Esperanto estas tio, ke oni ne povas liberiĝi de la influo de sia gepatra lingvo. Por koreaj esperantistoj la plej malfacilaj punktoj en la prononcado de Esperanto estas jenaj.

1-e, inter labialoj ili ne povas bone distingi la eksplozivojn kaj frikativojn. Ili ne bone distingas /p/ kaj /f/ ankaŭ /b/ kaj /v/, ĉar en la korea ne ekzistas labialaj frikativoj.

2-e, la prononcado de /c/ estas malfacila pro la influo de korea fonemo /t͡ɕ/. Malsame ol la korea /t͡ɕ/, kiu havas la prononcon [t͡ɕ], la /c/ de Esperanto havas la prononcon [t͡s]. Korea /t͡ɕ/ estas afrikato farata per tuŝiĝo kaj frotiĝo de langoantaŭo kaj palato, sed esperanta /c/ estas afrikato

farata per tuŝiĝo kaj frotiĝo de langopinto kaj alveolo. Simple dirite, Esperanto /c/ estas prononcata ĉe pli antaŭa pozicio en buŝo ol korea /t͡ɕʰ/.

3-e, kvankam ne ĉiuj, tamen multaj ne bone distingas /l/ kaj /r/. Ili estas prononceblaj jen facile, jen malfacile laŭ la kunligo kun aliaj sonoj. Se ni priatentas iomete, ni povas venki tiun ĉi malfacilon.

4-e, multaj ne povas distingi /ĝ/, /ĵ/ kaj /z/. La prononco de /ĝ/ estas relative facila, ĉar ĝi estas la voĉa alofono de korea fonemo /t͡ɕʰ/. Kaj /z/ estas simila al la alofono de korea fonemo /t͡ɕʰ/ en /kat͡ɕʰimala/(=Ne iru.), kiam oni nature prononcas ĝin en rapida interparolo. Inter la tri prononcoj la plej malfacila estas /ĵ/. La pozicio de lango por tiu sono estas sama kiel tiu de /ĝ/, sed iliaj prononcm manieroj estas malsamaj. Oni prononcas /ĝ/, momente frotante la langoantaŭon kaj palaton en la momento, kiam oni deprenas langon dis de la palato. Sed ĉe la prononcado de /ĵ/ la lango ne komplete algluiĝas al la palato, sed nur proksimiĝas al ĝi kaj tie la du partoj frotiĝas. Se koreoj venkas supre menciitajn kvar malfacilojn, iliaj prononcoj de Esperanto devas esti tre bonaj.



II.1. Analizo de morfemoj

Morfemo estas ‘ne plu disigebla sencohava ero de parolo’. Ekzemple la vortoj ‘domo, iri, malbona, gesinjoroj’ estas analizataj al morfemoj kiel jene: dom-o, ir-i, mal-bon-a, ge-sinjur-o-j. Kaj morfemo estas signata en kunigaj krampoj({ }).

Inter supre analizitaj morfemoj, {o} {i} {a} {j} havas sencon respektive [substantvio, verbo, adjektivo, multenombro], kaj tial ili estas traktataj kiel memstaraj morfemoj. Kaj {dom} {ir} {bon} {sinjur} ankaŭ havas sian radikan sencon, dum {mal} kaj {ge} havas sian gramatikan sencon de respektive [kontraŭa/nea/inversa ktp.] kaj [ambaŭseksa]. Ili ankaŭ estas memstaraj morfemoj.

En Esperanto la analizo de morfemoj ne estas malfacila, ĉar ĉiuj radikoj, afiksoj kaj finaĵoj estas respektive memstaraj morfemoj. Sed ĉe tabelaj vortoj ni hezitas kiel analizi morfemojn. Ekzemple ni hezitas inter la analizoj ‘ti-u, ti-o, ti-a, ti-e’, ‘t-iu, t-io, t-ia, t-ie’ kaj ‘t-i-u, t-i-o, t-i-a, t-i-e’. Por solvi la problemon ni unue esploru, kiujn sencojn(informojn) havas ‘tiu, tio, tia, tie’ respektive. Laŭ nia scio ili havas la sencojn respektive

[montri, individuo, homo, objekto, pronomo, adjektivo], [montri, individuo, koncepto, objekto, pronomo], [montri, eco, determina, pronomo, adjektivo], kaj [montri, loko, adverbo]. Ĉi tie la komuna senco estas 'montri'. Ni do devas decidi, kiu el <ti> kaj <t> havas la komunan sencon. Teorie iu ajn el <ti> kaj <t> povas havi ĝin. Se ni decidas, ke <ti> havas ĝin, la restantaj <u, o, a, e> havas respektive la restantajjn sencojn. Kaj se ni decidas, ke <t> havas ĝin, la restantaj <iu, io, ia, ie> havas respektive la restantajjn sencojn. Sed ambaŭ decidoj havas problemojn.

La problemo de la unua decido estas tio, ke morfemoj <u, o, a, e> havas siajn proprajn sencojn ekster la kategorio de tabelaj vortoj, nome la sencojn [volitivo, substantivo, adjektivo, adverbo]. Sed tio ne estas tiel grava problemo, ĉar la fenomeno, ke unu morfemo havas diferencajn sencojn en diferencaj okazoj, estas universala. Sed tamen tio ne estas dezirinda por Esperanto, kiu pretendas esti senescepta artefarita lingvo.

La problemo de la dua decido estas tio, ke tiu-kazaj morfemoj <iu, io, ia, ie> estas en alia kazo memstaraj tabelvortoj kun malsamaj sencoj.

Inter la du decidoj ni elektas la unuan, ĉar la problemo de la unua decido estas nur tio, ke finaĵoj {-u, -o, -a, -e} havas diversajn sencojn en diversaj okazoj, kio ne estas grava, sed tiu de la dua estas tio, ke <iu, io, ia, ie> estas uzataj jen kiel memstaraj vortoj jen kiel dependaj morfemoj (morfemo, kiu ne povas esti uzata memstare), kio estas multe pli serioza problemo ol la unua.

II.2. Parolelementoj

II.2.1. Kriterioj de la klasifiko de parolelementoj


La kriterioj de klasifiko de parolelementoj estas,

1-e, la formo,

2-e, la funkcio en la frazo,

3-e, la senco.

II.2.2. Klasifiko de parolelementoj



- substantivo
- pronomo
- numeralo
- verbo
- adjektivo
- adverbo
- prepozicio
- junkcio
- interjekcio

II.2.2.1. Substantivoj

Se iu vorto havas la finaĵon {-o}, ĝi estas substantvio.

La manieroj subdividi substantivojn povas esti diferencaj laŭ vidpunktoj. Ordinare oni subdividas ilin laŭ semantika vidpunkto, nome oni subdividas ekzemple abstraktajn substantivojn, nekalkuleblajn substantivojn, kolektivajn substantivojn, ktp. Sed tia subdivido estas sensenca en la gramatiko de Esperanto, kaj mi ne plu mencias tion en tiu ĉi libro.

II.2.2.2. Pronomoj

Pronomo estas vorto, kiu estas uzata anstataŭ substantvio. Ĝi havas diversajn specojn, ekzemple personajn kaj rilatajn pronomojn, kaj inter tabelaj vortoj, montraĵn, demandajn, totalajn, nedifinaĵn, kaj neajn pronomojn.

II.2.2.2.1. Personaj Pronomoj

Personaj pronomoj estas uzataj anstataŭ homoj. Ili ne havas gramatikajn finaĵojn, sed konsistas el nudaj radikoj. Jen estas ilia sistemo.

persono \ nombro		singularo	pluralo
1		mi	ni
2		vi	vi
3	vira	li	ili
	virina	ŝi	
	nehoma	ĝi	
	refleksiva	si	si
	nedefinita	oni	oni

La personaj pronomoj de Esperanto konsistas el nudaj radikoj, sed ili ĉiuj finiĝas per la vokalo <i>. Tial oni povus miskompreni, kvazaŭ la <i> estus finaĵo. Ĝi ne estas finaĵo, ĉar ĉiu radiko de Esperanto devas konsisti el almenaŭ unu silabo. Se ni rigardas la vokalon <i> kiel finaĵon, la antaŭaj <m, n, v, l, ŝ, ĝ, il, s, on> estus radikoj. Sed ili ne konsistigas unu silabon krom <il> kaj <on>. Ili do ne estas radikoj. Kaj por la singulara 2-a persono

ekzistas unu plia pronomo, ‘ci’, kiu estis origine kreita por doni apartan efekton en tradukoj. Sed hodiaŭ ĝi estas uzata preskaŭ nenie krom en vortaro, gramatika libro kaj literaturaĵo.

Se oni aldonas la adjektivan finaĵon {-a} al personaj pronomoj, ili fariĝas posedaj pronomoj. Kaj ili ofte uziĝas ankaŭ kiel posedaj adjektivoj. Ekzemple ‘mia, via’ signifas aŭ ‘mia aĵo, via aĵo’ aŭ ‘de mi, de vi’.

Kaj la nudaj formoj de personaj pronomoj estas nominativo, dum la finaĵo {-n} aldonita al ili montras akuzativon. Malsame ol ordinaraĵ substantivoj personaj pronomoj havas genitivon, kiu estas esprimata per la aldono de la finaĵo {-a}.

II.2.2.2.2. Tabelaj Pronomoj

	montra (ti-)	demanda (ki-)	totala (ĉi-)	nedifina (i-)	nea (neni-)
individuo, homo, objekto (-u)	tiu	kiu	ĉiu	iu	neniu
ideo, objekto (-o)	tio	kio	ĉio	io	nenio

Tiuj pronomoj havas jenajn proprajn karakterojn.

① La pronomoj en la linio de ‘-u’ montras homon, se ne ilin sekvas aparta mencio. Ili estas uzataj ankaŭ kiel adjektivoj, kaj tial ili prenas necesajn finaĵojn laŭ nombro kaj kazo.

② La pronomoj en la linio de ‘-o’ ne prezentas nombron, kaj tial ili ne povas preni la pluralan finaĵon {-j}. Sed ili povas preni akuzativan finaĵon {-n}, se necesas.

Unu afero, kiun ni devas scii estas tio, ke en la komenco Zamenhof ne

faris la tabelon tiel, kiel mi prezentas supre. Li unue kreis ‘io’, kaj poste li aldonis ‘t-, k-, ĉ-, nen-’ por doni respektive la signifojn de ‘monro, demando, tuto, neo’. Sed por la celo de klarigo kaj instruo la supra sistemo estas pli bona. (Vd: II.1. Analizo de morfemo)

Kaj la demandaj pronomoj estas uzataj kiel rilataj pronomoj.

II.2.2.2.3. Rilataj Pronomoj

Ĉi tie mi ne eksplikos rilatan pronomon, kredante, ke la legantoj jam havas scion pri ĝi. En Esperanto ‘kiu’ kaj ‘kio’ estas rilataj pronomoj kaj foje la demanda adjektivo ‘kia’ estas uzata kiel rilata pronomo. La plej ofte uzata rilativo ‘kiu’ estas uzata kiam la reprezentato estas ordinara substantivo aŭ pronomo. Vidu jenajn ekzemplojn.

- ① Li estas la instruisto. kiu instruas Esperanton.
- ② Ĝi estas la libro, kiun mi aĉetis hieraŭ.
- ③ Ili vidis la studentojn, kiuj lernas Esperanton.
- ④ Ŝi estas la studentino, kies patron mi renkontis hieraŭ.
- ⑤ Plej bone ridas, kiu laste ridas.

Kiel vi vidas supre, la rilata pronomo ‘kiu’ prenas deklinaciajn finaĵojn {-j} kaj {-n} laŭ nombro kaj kazo (Vd: II.5. Deklinacio), kaj la formo de ĝia poseda adjektivo estas ‘kies’. En ⑤ mankas reprezentato, kaj ni subkomprenas la reprezentaton ‘tiu’.

La rilata pronomo ‘kio’ estas uzata nur en jenaj kazoj.

1-e, kiam la reprezentato estas unu el la tabelvortoj de linio ‘-o’, nome, io, tio, ĉio aŭ nenio.

[ekzemploj] Nun restas nenio, kio malhelpas lin.

Redonu, kion vi prenis.

Kio plej multe interesis lin, estis lia seroiza mieno.

2-e, kiam la reprezentato estas adjektivo uzita kiel substantivo.

[ekzemplo] La plej grava, kion mi nun devas fari, estas renkonti lin.

3-e, kiam la reprezentato estas la antaŭa propozicio mem.

[ekzemplo] Ŝi estas afabla, kio ebligis ŝin proksimiĝi al li.

4-e, kiam la reprezentato estas la sekva propozicio mem.

[ekzemplo] Mi renkontos lin, kaj kio estas la plej malfacila afero, mi diros al li la veron.

Ĉe la unua kazo el la supre menciitaj, en la dua kaj tria ekzemploj ne troviĝas reprezentatoj. Ni povas elimini la reprezentaton ‘tio’, se ĝia kazo estas sama kiel tiu de la rilata pronomo ‘kio’. Kaj tial ni povas diri jenan frazon: *Mi ne komprenas, kion li diras.* (Rimarko: Ĉi tie ni povas interpreti la rilatan pronomon kiel demandan pronomon.)

Kaj ĉe la dua kazo, la adjektivoj uzataj kiel substantivoj estas ĉefe superlativo kaj orda numeralo. Sed ankaŭ ordinaraj adjektivoj povas esti uzataj fojfoje, kiel jene: *La verda, kion mi vidis, estis la stelo de Esperanto.*

Ni devas atenti la kvaran kazon. Estas malfacile kompreni la esprimon ‘sekva propozicio mem’. Sed tiu kazo ne estas ofta, kaj ŝajne ĝi ĉiam aperas enŝovite meze en la frazo. Ni povos facile distingi tiun kazon.

Unu afero, kiun ni devas atenti rilate la rilatan pronomon ‘kio’, estas tio, ke ni devas uzi ‘kiu’, se la reprezentatoj ‘io, tio, ĉio, nenio’ estas kvalifikitaj de adjektivoj. (ekz. *Mi sentis ion varmegan, kiu penetris mian tutan korpon.*)

Rilata pronomo ‘kia’ estas uzataj en jenaj kazoj.

1-e, kiam la reprezentato estas la ideo mem esprimita per ‘tia’ (ĝi estas traktata kiel substantivo).

[ekzemploj] Kia oni vin vidas, tia oni vin taksas.

Ĝi estas tia, kian oni ofte trovas en kamparo.

Kia naskiĝas, tia grandiĝas.

2-e, kiam la reprezentato estas la ideo mem esprimita per la substantivo kvalifikita de adjektivo.

[ekzemplo] Ŝi havas belegan vizaĝon, kian oni malofte vidas en tiu ĉi urbo.

3-e, kiam la reprezentato estas la ideo mem esprimita per la nedifinita substantivo havanta la karakteron de adjektivo.

[ekzemplo] Li estas idioto, kia estas tre kuraĝa en batalo.

Ni devas atenti, ke ni ne konfuzu la unuan kazon supre menciitan kun jena kazo.

① Restu ĉiam tia, kia vi estas.

② Kia (estas la) ago, tia (estas la) pago.

Ĉi tie ‘kia’ estas uzita kiel kompara subjunkcio. La detalan klarigon pri ĝi ni vidos poste en la rubriko pri adjektivo.

Kaj ni havas unu specialan pronomon signifantan ‘la du ĉiuj’, nome ‘ambaŭ’. Ĝi estas uzata jen kiel pronomo (en la kazo ①) jen kiel adjektivo (en la kazo ②).

- ① Ambaŭ vivas ankoraŭ.
- ② Li elpuŝis ambaŭ manojn.

Ni devas atente uzi tiun ĉi ‘ambaŭ’. Ĝia uzado ne estas sama kiel ‘both’ en la angla. En la angla eblas la esprimo ‘both A and B’, sed en Esperanto ne eblas la esprimo ‘ambaŭ A kaj B’. Ni devas ŝanĝi jenajn ① kaj ② al ③ kaj ④

- ① Mi diris tion ambaŭ al la mastro kaj al la gasto.
- ② Ambaŭ Petro kaj Maria venis al la kunsido.
- ③ Mi diris tion kaj al la mastro kaj al la gasto.
- ④ Petro kaj Maria, ili ambaŭ venis al la kunsido.

II.2.2.3. Numeraloj

La numeraloj de Esperanto ne prenas finaĵon same kiel la pronomoj. Ili ekzistas en la stato de radikoj. La bazaj numeraloj eatas jenaj 12 vortoj: unu(1) du(2) tri(3) kvar(4) kvin(5) ses(6) sep(7) ok(8) naŭ(9) dek(10) cent(100) mil(1,000).

Kaj ili estas kombinitaj laŭ dekuma(decimala) nombrosistemo.

Ankaŭ ekzistas kalkulaj substantivoj, jenaj: nulo(0) miliono(1,000,000) miliardo(10^9) biliono(10^{12}). Ili estas substantivoj, kaj ili prenas la pluralan finaĵon {-j}, se ili estas en multenombro.

II.2.2.3.1. Legi nombrojn

En Esperanto oni legas nombrojn same kiel en la korea, ekzemple oni ne

diras ‘unudek, unucent, unu mil, unudek mil’, sed ‘dek, cent, mil, dek mil’. Kaj kalkulaj substantvioj staras en pluralo, se ili estas en multenombro, sed ili ne prenas la finaĵon {-j}, se daŭras ciferoj post ĝi. En la lego de sinsekvaj ciferoj oni kutime legas ‘nulo’-n kiel ‘nul’. Kaj oni legas la decimalan markilon ‘punkto’(sed en iuj landoj oni legas ĝin ‘komo’), kaj post la decimala punkto oni legas same kiel en la korea t.e. ĉiun ciferon aparte.

[ekzemplo]

123	cent dudek tri
123,456	cent dudek tri mil kvarcent kvindek ses
12,345,678	dek du milionoj tricent kvardek kvin mil sescent sepdek ok
0.123	nul' punkto unu du tri
10.78	dek punkto sep ok

II.2.2.3.2. Numeralaj Adjektivoj

Se numeraloj prenas la adjektivan finaĵon {-a}, ili fariĝas numeralaj adjektivoj kaj montras ordon.

[ekz: unua, dua, dek-tria]

II.2.2.3.3. Numeralaj Adverboj

Se numeraloj prenas la adverbajn finaĵojn {-e}, ili fariĝas numeralaj adverboj kaj montras ordon.

[ekz: unue, due, dek-trie]

II.2.2.3.4. Algebraj Esprimoj

Adicio (kaj/plus) Du kaj(plus) tri estas(faras) kvin. ($2 + 3 = 5$)

Subtraho	(minus)	Ok minus du estas(faras) ses. ($8 - 2 = 6$)
Multipliko	(oble)	Sepoble tri estas(faras) dudek unu. ($7 \times 3 = 21$)
Divido	(dividite per)	Dudek divite per tri estas(faras) ses kaj restas du. ($20/3=6...2$)
	(one)	Duone ses estas(faras) tri. ($6/2=3$)

II.2.2.4. Verboj

Esperantaj verboj prenas diversajn finaĵojn laŭ modoj kaj tensoj. Jen estas ilia sistemo.

[	infinitivo		-i
	finitivo	prezenco	 -as
		preterito	 -is
		futuro	 -os
	kondicionalo		-us
	volitivo		-u

Kaj la subklasifikoj de verboj povas esti diversaj laŭ vidpunktoj. Ni kutime subklasifikas la verbojn al netransitiva, transitiva, kompleta, nekompleta, ĉefa kaj helpa verboj, ktp. Sed tiu subklasifiko de verboj estas unu el la plej bruaj problemoj inter Esperanto-gramatikistoj. Verdire la distingo inter la netransitiva kaj transitiva verboj restas tre malfacila problemo. Pro tiu problemo ankoraŭ ne eatas bone solvitaj la problemoj de kazoj kaj la klasifiko de parolelementoj, en la priskribo de Esperanto-

gramatiko. Kaj tial ĉi tie mi ne plu mencias tion.

Mi detale traktos verbojn en la ĉapitro de konjugacio.

II.2.2.5. Adjektivoj

Adjektivoj de Esperanto finiĝas per la finaĵo {-a}. Adjektivo estas la vorto, kiu kvalifikas aŭ determinas substantivon. Ĝi havas du funkciojn: jen ĝi funkcias kiel epiteto, metite antaŭ aŭ post substantivo, jen ĝi funkcias kiel predikativo de subjekto aŭ objekto.

① Ĝi estas bela floro.

② La floro estas bela.

La adjektivo ‘bela’ en la supra frazo ① estas epiteto, kiu rekte kvalifikas la substantivon ‘floro’. Kaj tiu en ② estas predikativo de la subjekto ‘floro’.

Inter adjektivoj ankoraŭ ekzistas tiel nomataj tabelaj adjektivoj kaj artikolo krom la ordinaraj adjektivoj havantaj la finaĵon {-a}.

Jen estas tabelaj adjektivoj.

	montra (ti-)	demanda (ki-)	totala (ĉi-)	nedifina (i-)	nea (neni-)
individa (-u)	tiu	kiu	ĉiu	iu	neniu
priskriba, kvalita (-a)	tia	kia	ĉia	ia	nenia
poseda (-es)	ties	kies	ĉies	ies	nenies

Inter ili, al la posedaj adjektivoj ne aldoniĝas la finaĵoj {-j} kaj {-n}. Kaj la demanda adjektivo ‘kia’ estas uzata ankaŭ kiel rilata pronomo kaj subjunkcio de komparo.

Kiel mi jam diris en la klarigo de rilata pronomo, pri la problemoj starigi rilatan adjektivon kiel unu el la rilataj vortoj, ŝajne, ankoraŭ ne ekzistas unuiginta opinio. Ĉi tie mi ne starigas ĝin.

Tiuj, kiuj starigas rilatan adjektivon, povas diri, ke la ‘kia’ en jenaj ekzemploj estas uzata kiel rilata adjektivo.

① Li estas tre afabla.

② Lia patro ankaŭ estas tre afabla.

③ [?]Li estas tre afabla, kia estas ankaŭ lia patro.

Se ni miksas la du simplajn frazojn ① kaj ② en unu kompleksan frazon, ĝi fariĝas ③ (la frazo ③ estas iom stranga), kaj oni povus diri, ke tiama ‘kia’ estas rilata adjektivo. Sed tiu aserto havas jenajn problemojn.

Unue, en la kazo de rilata pronomo, kiel ni vidas en la ekzemplaj frazoj ④, ⑤, ⑥, la sama substantivo(aŭ substantiva sintagmo) en la du simplaj frazoj povas aperi en malsamaj kazoj. Sed en la kazo de t.n. rilata adjektivo ĝi ĉiam aperas kiel predikativo de subjekto.

④ Mi aĉetis la libron.

⑤ La libro estas tre interesa.

⑥ Mi aĉetis la libron, kiu estas tre interesa.

Ĉi tie ni esploru, ĉu ni povus kunligi la adjektivojn malsame funkciantajn

per rilata adjektivo.

- ⑦ La rakonto estas tre interesa.
- ⑧ Li havas tre interesan libron.
- ⑨ *La rakonto estas tre interesa, kian libron li havas.
- ⑩ *Li havas tre interesan, kia estas la rakonto, libron.
- ⑪ *Li havas libron tre interesan, kia estas la rakonto.

Kiel ni vidas supre, la kompleksaj frazoj ⑨, ⑩, ⑪, kiuj havas t.n. rilatan adjektivon ‘kia’, ĉiuj ne estas korektaj frazoj. Ili fariĝas ne-gramatikaj frazoj (kun stela signo).

Due, ni ne bezonas uzi t.n. rilatan adjektivon kiel en ③. Ni povas kunligi la du frazojn ① kaj ② sufiĉe bone per la junkcio ‘kaj’: *Li kaj lia patro estas tre afablaj*.

Sed ni tamen iom hezitas koncerne la starigon de rilata adjektivo, ĉar jenaj kelkaj frazoj estas jam uzataj.

- ① Kia (estas la) patro, tia (estas la) filo.
- ② Mi ne plu estas tia, kia mi estis antaŭe.

Mi opinias, ke ni povas rigardi tiun ‘kia’ kiel ‘subjunkcio de komparo’.
(Vd: III.3.3. Kompleksa Frazo)

II.2.2.6. Adverboj

Inter adverboj de Esperanto ekzistas tri specoj: 1) derivitaj adverboj,

havantaj la finaĵon {-e}; 2) originaj adverboj, kiuj ne havas finaĵon sed staras kiel nuda radikoj; 3) tabelaj adverboj. Jen estas tabelaj adverboj.

	montra (ti-)	demanda (ki-)	totala (ĉi-)	nedifina (i-)	nea (neni-)
loko (-e)	tie	kie	ĉie	ie	nenie
tempo (-am)	tiam	kiam	ĉiam	iam	neniam
metodo, stato, grado (-el)	tiel	kiel	ĉiel	iel	neniel
kaŭzo, motivo (-al)	tial	kial	ĉial	ial	nenial
kvanto (-om)	tiom	kiom	ĉiom	iom	neniom

Ĉi tie ni devas atenti, ke por esprimi gradon oni devas uzi la vortojn de ‘-el’ serio, ne la vortojn de ‘-om’ serio. Multaj homoj miskias tion. Kaj ofte ili faras eraron, eĉ se ili scias tion. Sekve ni devas eviti la esprimojn “Mi kuris tiom rapide.” aŭ “Kiom bela ŝi estas!”, sed ni devas uzi la esprimojn “Mi kuris tiel rapide.” aŭ “Kiel bela ŝi estas!”.

Same kiel en la kazo de demandaj pronomoj kaj demandaj adjektivoj, ankaŭ en la kazo de adverboj, ‘kie’ kaj ‘kiam’ el inter la demandaj tabelaj adverboj estas uzataj kiel rilataj adverboj.

Mi ne klarigas ĉi tie la uzadon de rilataj adverboj. Sed mi substrekas nur tion, ke se la rilata adverbo havas reprezentaton, la rilata propozicio estas traktata kiel epitetaj subpropozicio, kiu determinas la reprezentaton (en la kazo de ĉi-suba ekzemplo ①), kaj ke se ĝi ne havas reprezentaton, la rilata propozicio estas traktata kiel adjekta subpropozicio (en la kazo de ĉi-suba ekzemplo ②). (Vd. III.3.3. Kompleksaj frazoj)

- ① Li venis ĝuste en la momento, kiam mi parolis pri li.
 ② Kiam mi parolis pri li, li venis.

Jen estas originaj adverboj.

ajn:	Li forprenas ion ajn.
almenaŭ:	Li povos almenaŭ manĝi.
ankaŭ:	Li ankaŭ ridis.
ankoraŭ:	Li ankoraŭ balbutas en Esperanto. Li ankoraŭ laboras en la fabriko.
apenaŭ:	Mi apenaŭ povas kompreni vin.
baldaŭ:	Li baldaŭ revenos al ni.
ĉi:	Li staris ĉi tie.
ĉirkaŭ:	Ĝi kostas ĉirkaŭ mil dolarojn.
ĉu:	Ĉu vi scias la veron?
des (pli):	Ju pli multe, des pli bone.
eĉ:	Mi ne povas eĉ paroli.
for:	La domo situas for de la strato.
hieraaŭ:	La letero alvenis hieraaŭ.
hodiaŭ:	Mi vidis ĝin hodiaŭ.
ja:	Ĝi estas ja grandioza.
jam:	La belaj tagoj jam pasis.
jen:	Jen estas la libro. Jen, vidu.
jes:	Jes, mi lernas Esperanton.
ĵus:	La novaĵo ĵus atingis ilian oficejon.

kvazaŭ:	Liaj okuloj kvazaŭ parolis.
mem:	Mi mem faris tion.
morgaŭ:	Ŝi revenos morgaŭ.
ne:	Ne, mi ne lernas Esperanton.
nun:	Kioma horo estas nun?
nur:	Mi amas nur vin.
plej:	Li estas la plej saĝa el ni.
pli:	Li estas pli diligenta, ol mi.
plu:	Mi ne povis elteni plu.
preskaŭ:	La ĉeestantoj preskaŭ sufokiĝis pro ŝoko.
tre:	La knabo estas tre bona.
tro:	La knabo estas tro juna por la laboro.
tuj:	Mi tuj respondos al vi.

II.2.2.7. Prepozicioj

Prepozicio metiĝas antaŭ substantivo(aŭ substantiva sintagmo) kaj faras ilin epiteto aŭ adjekto. Tiu epiteto aŭ adjekto ankaŭ nomiĝas prepozicia sintagmo.

Esperantaj prepozicioj principe postulas post si nominativan substantivon. Sed se akuzativa substantivo venas post loka prepozicio, tio montras direkton. Ekzemple la frazo ‘la rato kuris sub la lito’ signifas, ke la rato dekomence estis sub la lito kaj tie ĝi kuras tien kaj ĉi tien kaj ĝi ne elkuris ekster la liton. Kaj la frazo ‘la rato kuris sub la liton’ signifas, ke la rato komence estis ekster la lito kaj ĝi kuris al sub la lito kaj nun ĝi estas sub la lito.

Jen estas la prepozicioj de Esperanto kaj iliaj signifoj.

1) Lokaj Prepozicioj

antaŭ:	La arbo staras antaŭ la domo.
apud:	Li sidis apud la knabino.
ĉe:	La familio sidis ĉe la tablo. Metu po unu punkton ĉe unu flanko de la kesto. Li kaptis min ĉe la brako. Grandaj makuloj estas ĉe li. Ĉiam malgaja humoro regas ĉe ŝi. Mi laboris dum tri jaroj ĉe profesoro Kim. Ili loĝis ĉe mi dum la tuta somero.
ĉirkaŭ:	La tero rondiras ĉirkaŭ la suno. Li havas multajn saĝajn amikojn ĉirkaŭ si.
ekster:	La hundo dormis ekster la domo.
el:	Li estas la plej juna el ili. Neniu venis el ili.
en:	La floroj estas en la vazo.
ĝis:	Li kuris ĝis la stacidomo.
inter:	La banko estas inter la urbodomo kaj la hospitalo.
kontraŭ:	Mia domo situas kontraŭ la banko.
malantaŭ:	La kato dormas malantaŭ la pordo.
sub:	Sub la tablo sidas la kato.
super:	Super la tablo pendas la lampo.
sur:	Sur la tablo kuŝas teleroj kaj forkoj.
trans:	La junulo loĝas trans la monto.

2) Direktaj Prepozicioj

al:	Mi iras al la lernejo. Mi donis ĝin al li.
de:	Li venis de malproksima lando.
el:	La hundo kuris el la ĉambro.
kontraŭ:	Li promenis kontraŭ la rivero.
laŭ:	Li promenis laŭ la riverbordo.
preter:	La hundo kuris preter la arbo.

3) Tempaj Prepozicioj

antaŭ:	Li foriris antaŭ 3 monatoj.
ĉe:	Li malaperis ĉe la koka krio.
ĉirkaŭ:	Li revenos ĉirkaŭ decembro.
de:	Li legas la libron de mateno.
dum:	Ŝi dormis dum 8 horoj.
en:	En la 3-a de majo (lundo, marto, 1989) mi iros al vi. Li legis la libron en tri tagoj.
ĝis:	Li legos la libron ĝis vespero.
inter:	Li vizitos la sinjoron inter la 3-a (horo, tago) kaj la 4-a (horo, tago).
je:	Mi vizitos vin je la 4-a (horo) posttagmeze.
por:	Li vagabondis por 3 jaroj.
post:	Li faros tion post vi. Li revenos post 3 monatoj.

4) Prepozicioj Metodaj, Stataj, Kaŭzaj, Celaj, ktp

anstataŭ:	Li donis al mi teon anstataŭ kafo.
ĉe:	Li sidas ĉe vespermanĝo. Ŝi ĉiam sidas ĉe la sama laboro.
de:	La libro estas skribita de fama aŭtoro. [aganto de pasivo] Li suferas de gripo. [kaŭzo] La amo de gepatroj al siaj gefiloj [aganto] La preparo de venonta kongreso [celo] La rezulto de la diskuto [simpla ligo]
el:	Mi savis lin el danĝero. Tio konsistas el diversaj elementoj. El tio rezultis, ke li foriris tuj.
en:	Estas malbone lasi lin en tia libereco. La glaso rompiĝis en pecetojn.
far:	La libro far s-ro Kim estas tre interesa. La legado de la libro far s-ro Kim estas tre rapida.
ĝis:	Mi simpligis tion ĝis nekredebleco.
kontraŭ:	Ili batalis kontraŭ la malamiko. Li aĉetis la libron kontraŭ mil
krom:	Neniu venis krom li. Ĉiuj venis krom li.
kun:	La knabo ludas kun la kato.
laŭ:	Mi agis laŭ mia konscienco.
malgraŭ:	Li eliris malgraŭ la malpermeso de la patro.
per:	La knabo skribas per krajono. Mi venis per trajno.

po:	La patrino disdonis al la infanoj po 3 pomoj(pomojn). [Vidu II.5.2.3]
por:	La popolo batalas por la libero. Li pagis mil spesojn por la libro.
pri:	La instruisto parolas pri la uzo de akuzativo.
pro:	Li ne povis ĉeesti pro malsano.
sen:	Homoj ne povas vivi sen aero.
sub:	Li aperis sub la formo de maljunulo. Mi akceptis ĝin sub la kondiĉo, ke mi reformos ĝin.
super:	Tio estas super mia povo. Li ankoraŭ ŝvitas super alfabeto. Li sidis super laboro ĝis malfrua nokto.
tra:	Ili vojaĝis tra Eŭropo. Ĝi okazis nur unu fojon tra tuta historio.

5) Posedaj Prepozicioj

de:	Ĝi estas la libro de la instruisto.
kun:	La junulino kun belaj okuloj venis al mi silente.

6) Kvantaj Prepozicioj

da:	Mi trinkis glason da biero. Jen estas iom da akvo. Jen estas kelke da pomoj. Jen estas multe da akvo. Jen estas multe da pomoj.
-----	---

(Se post 'da' venas kalkulebla substantivo, ĝi staras en pluralo.)

je: La monto estas alta je 100 metroj.
 La rivero estas longa je 10 kilometroj.
 La strato estas larĝa je 20 metroj.
 Ĝi estas vasta je 100 kvadrataj metroj.
 La pakaĵo estas peza je 10 kilogramoj.
 La lago estas profunda je 15 metroj.
 La libro kostas je tri mil speso.

7) Emocia Prepozicio

je: Je mia surprizo li sukcesis en la ekzameno.

Krom supraj prepozicioj iuj vortoj, kiuj origine ne estas prepozicioj, estas uzataj kiel prepozicioj. Ili estas malsamaj ol originaj prepozicioj je tio, ke post ili povas veni akuzativo. Jen estas kvazaŭ-prepozicioj.

almenaŭ: Mi povas fari almenaŭ tion.
 ankaŭ: Ankaŭ li venis kune kun ili.
 eĉ: Li formanĝis eĉ ŝian porcion.
 kiel: Li rolis kiel prezidanto.
 Li aspektas kiel virino.
 ne: Mi renkontis ne lin, sed lian fraton.
 nur: Mi vidis nur ŝian vizaĝon.

II.2.2.8. Junkcioj

Junkcio kunligas diversajn lingvajn formojn (t.e. vorto, sintagmo, propozicio), kaj ĝi dividiĝas en du specojn, t.e. konjunkcio kaj subjunkcio.

Konjunkcio kunligas du lingvajn formojn samajn je frazfunkcio (ekzemple ‘kaj, sed, aŭ, nek’), kaj subjunkcio alligas la propozicion, kiun ĝi kondukas, al la ĉefpropozicio (ekzemple ‘ke, kvankam, se’).

Jen estas la listo de la junkcioj de Esperanto.

aŭ:	Nepre venu morgaŭ, aŭ vi ne plu vidos min.
ĉar:	Ŝi ploras, ĉar ŝia patro mortis.
do:	Ĉiuj homoj do mortas.
ju (pli):	Ju pli multe oni havas, des pli multe oni avidas.
kaj:	Li kaj ŝi estas bonaj geamikoj. Venu morgaŭ matene, kaj mi donos ĝin al vi.
ke:	Mi scias, ke li amas ŝin. La fakto, ke li amas ŝin, estas vaste konata. Mi ĝojas, ke li revenis viva. Mi petis lin, ke li sendu al mi la teleron. Li estis tiel laca, ke li ne povis plu paroli.
kia:	Restu ĉiam tia, kia vi estas.
kiel\:	La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en aliaj lingvoj. Li kantas tiel bele, kiel mi. Kiel vi bone scias, la afero ne estas facila.
kiel se:	Li agas, kiel se li estus heroo.
kvankam:	Kvankam mi estas malriĉa, mi estas feliĉa.
minus:	Kvin minus du estas tri.
nek:	Li ne renkontis lin, nek lian fraton.
nu:	Ĉiuj homoj devas morti, nu, Sokrato estas homo, do

	Sokrato devas morti.
ol:	Li laboras pli diligente, ol mi.
plus:	Tri plus du estas kvin.
se:	Se vi estus mia frato, mi ĝin donus al vi.
sed:	Li legas libron, sed lia frato kantas apud li.
tamen:	Li klopodis multe, tamen li ne sukcesis.

El inter supraj junkcioj, ‘do’ estas uzata, kiam oni diras ion konsekvence de tio, kio estas jam dirita. Kaj tial ĝi ne estas uzata en la subpropozicio de iu kompleksa frazo, sed en alia aparta frazo, senkonsidere ĉu ĉi tiu estas simpla frazo aŭ kompleksa frazo (en la kazo de kompleksa frazo, tiu ĉi estas uzata en la ĉefpropozicio). Kaj en iuj specialaj kazoj ĝi estas uzata kiel adverbo de surprizo aŭ emfazo en demanda frazo aŭ volitiva frazo. Jen estas ekzemploj de ĝia uziĝo kiel adverbo.

① Kial do vi ne laboras? (*Mi tute ne komprenas, kial vi ne laboras.*)

② Sed iru do! (*Se vi tiel deziras, iru. Mi ne retenos vin.*)

La junkcio, ‘tamen’ estas uzata ofte kun aliaj junkcioj ‘kaj’ aŭ ‘sed’. La junkcio de komparo, ‘kia’ deklinacias laŭ la kazo kaj nombro de la substantivo, kiun ĝi determinas. Kaj kiam la demandvorto kondukas demandan subpropozicion, ĝi funkcias kiel junkcio. Kaj ankoraŭ ekzistas vortoj, kiuj estas uzataj momente kiel junkcioj, kvankam ili origine ne estas junkcioj, ekzemple prepozicioj aŭ adverboj aŭ junkcioj plus tiaj vortoj.

Jen estas kvazaŭ-junkcioj.

anstataŭ:	Mi sendis lin, anstataŭ ŝin.
antaŭ ol:	Mi finos la laboron, antaŭ ol vi revenos.
apenaŭ:	Apenaŭ li vidis ŝin, li ekploris pro ĝojo.
ĉu:	Mi ne scias, ĉu li venos aŭ ne.
dum:	Li purigis la ĉambron, dum mi dormis en ĝi.
(eĉ) se:	Mi amas lin, (eĉ) se li estas malriĉa.
ĝis:	Li daŭre laboris, ĝis ŝi revenis.
kia ajn:	Kia ajn li estas, li ŝajnas bela al la patrino.
kiam:	Kiam mi atingis Seulon, estis jam vespero.
kiam ajn:	Kiam ajn vi vizitos min, mi varme akceptos vin.
kie:	Kie pompas floroj, amasiĝas multaj abeloj.
kie ajn:	Kie ajn vi estas, mi iros al vi.
kiel ajn:	Kiel ajn li klopodos, li nepre malsukcesos.
kies ajn:	Kies ajn libro ĝi estas, mi prenos ĝin.
kio ajn:	Kio ajn ĝi estas, mi nepre akiros ĝin.
kiom:	Kiom mi scias lin, li ne faros tian aferon.
kiom ajn:	Kiom ajn ili eltrinkos, la putro ne elĉerpiĝos.
kiu ajn:	Kiu ajn venos, mi bonvenigos lin.
kvazaŭ:	Li agas, kvazaŭ li estus heroo.
malgraŭ, ke:	Li eliris malgraŭ, ke lia patro malpermesis.
por, ke:	Mi petis lin por, ke li sendu al mi la teleron.
post (kiam):	Ili kune ekiris, post (kiam) li venis al ili. Post 'kvazaŭ' oni devas uzi ĉiam kondicionalon, ĉar ĝi donas sencon de supozo mala al la realo.

II .2.2.9. Interjekcioj

Esperanto havas jenajn interjekciojn. Ili ne havas finaĵon, kaj estas uzataj kiel memstaranto en frazo.

bis:	uzata kiam oni petas ripeton de la plenumita kantado aŭ aktorado
fi:	uzata kiam oni esprimas malestimon kaj abomenon
ha:	uzata kiam oni vokas iun, aŭ kiam oni estas surprizita
ho:	uzata kiam oni esprimas vivecan senton
lo:	uzata kiam oni vokas iun ĉe telefonado; ofte uzata kun ‘ha’, do en la formo ‘ha-lo’
nu:	uzata kiam oni atentigas iun alian al sia parolo
ruk (ho ruk):	uzata kiam oni laboras kune, aŭ kiam oni koncentras fortojn
ve:	uzata kiam oni esprimas malfeliĉon, kordoloron, malbenon, malĝojon, ktp

Kaj krom ili ankoraŭ uziĝas kelkaj adverboj kiel interjekcioj.

Jen estas kvazaŭ-interjekcioj.

bedaŭrinde:	uzata kiam oni esprimas bedaŭron
bone:	uzata kiam oni esprimas sian kontenton aŭ taŭgecon de la cirkonstanco
certe:	uzata kiam oni esprimas certecon
domaĝe:	uzata kiam oni esprimas domaĝan senton

eble:	uzata kiam oni esprimas pli malpli da ebleco
kredeble:	uzata kiam oni esprimas iagradan kredeblecon
mirinde:	uzata kiam oni esprimas grandan miron
trafe:	uzata kiam oni trafis ion
verŝajne:	uzata kiam io ŝajnas vera

Kaj ni povas esprimi la senton de admiro per admiraj frazoj, kiel jene.

- ① Kiel bela ĝi estas!
- ② Kiel bela floro ĝi estas!
- ③ Kia idioto (li estas)!

Ĉe la admira frazo ni uzas la demandvortojn ‘kiel’ aŭ ‘kia’. Kiel ni vidas supre, kiam ni admiras la adjektivon aŭ adverb(en la kazoj ① kaj ②), ni uzas la vorton ‘kiel’, kaj kiam ni admiras substantivon (en la kazo ③), ni uzas ‘kia’. En tiu ĉi lasta kazo la substantivo devas havi karakteron de adjektivo. Se ne, kaj se uziĝas ordinara substantivo, ni ne povas bone senti, kian admiron la parolanto volas esprimi. (ekz: *Kia homo! Kia domo! Kia rezulto!*)

Ĉe la kazo de ② iuj diras: “Kia bela floro ĝi estas!”. Tio estas studinda problemo.

Se ni tiam admiras la substantivon ‘floro’ same kiel en la kazo de ③, ni povas uzi ‘kia’. Sed mi opinias, ke en la kazo de ②, tio, kion ni admiras, ne estas la substantivo ‘floro’, sed la adjektivo ‘bela’. Ni vidu jenajn frazojn.

- ④ Ĝi estas tre bela.
- ⑤ Ĝi estas tre bela floro.
- ⑥ Kiel bela ĝi estas!
- ⑦ Kiel bela floro ĝi estas(=estas ĝi)!

La frazo ⑥ estas la admira frazo de ④, kaj la frazo ⑦ estas la admira frazo de ⑤. En ambaŭ kazoj la vorto ‘kiel’ estas uzata anstataŭ la adverbo ‘tre’. Se estas tiel, mi ne povas kompreni la opinion, ke oni devas uzi ‘kia’ en la frazo ⑦.

II.2.3. Studindaj problemoj

1) Inter diversaj lingvoj en la mondo ekzistas lingvoj, al kies radikoj oni povas atribui unu specon el la parolelementoj, kiel ekzemple la korea kaj la angla, dum en la aliaj la radikoj devas preni finaĵon por decidiĝi al unu el la parolelementoj, kiel ekzemple la latina kaj Esperanto.

2) En Esperanto iuj vortoj devas preni parolelementan finaĵon por decidiĝi al unu el la parolelementoj(substantivoj, verboj, adjektivoj, derivitaj adverboj), kaj la aliaj povas stari mem sen tiuj parolelementaj finaĵoj (pronomoj, numeraloj, originaj adverboj, prepozicioj, junkcioj, interjekcioj).

3) Parolelemento estas tio, kion oni dividas laŭ fundamenta karaktero de la vorto. Kaj tial ni devas distingi ĝin disde la frazelemento, kiun oni dividas laŭ la momenta uziĝo en la frazo. Ekzemple la substantivo estas

ĉiam substantivo en la klasifiko de parolelementoj, sed ĝi povas esti uzata jen kiel subjekto, jen kiel objekto aŭ predikativo. Kaj en Esperanto la adverboj kaj prepozicioj povas esti uzataj kiel ligantoj en la frazo. Tiam ni ne nomas ilin junkcioj, kvankam ili estas uzataj kiel ligantoj.

4) Ĉar la radiko de Esperanto ne estas kompleta vorto kun decidita speco de parolelemento, ni ne povas scii ekzemple al kiu parolelemento apartenas ‘dom-’. Sed la signifon ni povas kompreni, t.e. <domo>. Kiel ni povas scii per komuna saĝo, <domo> estas konkretaĵo. Jen ni surpriziĝas, rimarkante, ke tiu konkretaĵo povas esti uzata kiel adverbo, t.e. ‘dome’. Des pli, ke en Esperanto tia parolmaniero estas tre progresinta, kaj ni povas tre bone esprimi eĉ tion, kion oni preskaŭ ne povas esprimi en aliaj etnaj lingvoj. Jen estas kelkaj ekzemploj.

- ĉevale kuri (kuri kiel ĉevalo)
- genue sidi (sidi sur genuoj)
- grue stari (stari kiel gruo per unu piedo)
- korpe viziti (mem viziti)
- mane preni (preni per mano)
- okule paroli (paroli per okulo)

5) Ĉu starigi tabelvorton kiel unu el la parolelementoj?

En Esperanto ekzistas 45 tabelaj vortoj, kiuj estas formitaj sen observo pri la sistemo de la fundamentaj finaĵoj de Esperanto. Ekzemple la ‘-u’ en la sistemo de fundamentaj finaĵoj estas la finaĵo de volitivo, sed ĝi estas uzata ĉi tie kiel finaĵo (verdire ĝi ne povas esti nomata finaĵo) por pronomo

aŭ adjektivo de individuo (de homo aŭ objekto).

Kaj tial ni ne povas klasifiki ilin en parolelementojn laŭ iliaj formoj. Laŭ nia klasifiko de parolelementoj ĉiuj vortoj en la kategorio de adjektivo havas la finaĵon ‘-a’. Se enviciĝus en tiun kategorion iuj vortoj kun la finaĵo ‘-u’, la sistemo fariĝos konfuza.

Ni do unue rezigu la metodon envicigi la 45 tabelajn vortojn en la sistemon de parolelementoj, kaj prenu la metodon aparte starigi tabelvorton kiel unu el la parolelementoj. En tiu kazo nia sistemo de parolelementoj havas 10 membrojn. Sed tio naskas jenajn problemojn.

1-e, vortoj kun tro malsamaj sintaksaj funkcioj ligiĝas kune en unu parolelemento, kaj tial la klasifiko ne kontentigas la funkcia vidpunkton.

2-e, en realo ni nomas ilin ekzemple ‘montra pronomo’ aŭ ‘demanda pronomo’ aŭ ‘loka adverbo’. Kaj tial tiu klasifiko ne konformas al la realo.

3-e, laŭ la principo, ke pli simpla estas pli bona ĉe la starigo de gramatiko, 10-membra sistemo estas malpli bona ol la 9-membra.

Pro tiuj problemoj mi do trovas pli bona, ke ni envicigu la 45 tabelajn vortojn dividi en la 9 specojn de la parolelementoj. En tiu kazo vortoj kun ‘-o, -u’ apartenas al pronomo kaj tiuj kun ‘-u, -a, -es’ al adjektivo kaj la aliaj al adverbo. (Vidu II.1. Analizo de Morfemoj)

6) Ĉu starigi artikolon kiel unu el la parolelementoj?

En la angla gramatiko artikolo estas traktata kiel aparta parolelemento. Sed en Esperanto tiu sinteno havas jenajn problemojn.

1-e, malsame ol en aliaj hindeŭropaj lingvoj en Esperanto ekzistas nur unu artikolo, t.e. ‘la’. Kaj tiu ‘la’ neniam ŝanĝas sian formon (nur en speciala kazo oni povas uzi ties mallongigon <l’>). Kaj tial starigi unu

kategorion de parolelemento nur por unu vorto ne estas ekonomia sinteno.

2-e, la signifo kaj sintaksa funkcio de 'la' estas sama kiel montra adjektivo, kaj ankaŭ la formo estas sama kiel ordinaraj adjektivoj (sed la <a> en <la> ne estas la finaĵo por adjektivo).

Kaj tial mi ne starigas artikolon kiel unu el la parolelementoj, sed rigardas <la> kiel unu el la montraj adjektivoj.

Sed ankaŭ en tiu kazo ni ne povas eviti jenajn problemojn.

1-e, <la>, malsame ol ordinaraj adjektivoj, ne havas la adjektivan finaĵon.

2-e, <la> ne povas havi post si la finaĵojn {-j} kaj {-n}, malsame ol ordinaraj adjektivoj.

Kaj ĉi tie ni studu la uzadon de la artikolo. Ĝiaj uzoj estas jenaj.

A) Ĝi donas ne novan, sed malnovan informon. Ĝi montras:

① tion jam parolitan dum la interparolo;

(ekz: *Hieraŭ mi legis iun libron. La libro estis tre interesa.*)

② tion ekzistantan en la sceno de la interparolo, kaj tial konfirmeblan per okuloj;

(ekz: *Bonvolu transdoni al mi la botelon.*)

③ tion, kion oni ne konfuzas laŭ la situacio.

(ekz: *Kial la knabo ne venas hodiaŭ?*) <La knabo ĉiun tagon venas.>

B) Ĝi reprezentas la specon en la kazo de singularo, kaj ĝi montras la tuton de la speco en la kazo de pluralo.

(ekz: *La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka.; Oni elhakis la arbojn apud la vojo.*)

- C) Ĝi montras unusolan objekton en la mondo.
(ekz: *La suno brilas.*; *La tero estas ronda.*; *La ĉielo estas blua.*; *La filo (=unusola filo) de sinjoro Kim estas tre saĝa.*)
- Ĉ) Ĝi estas uzata antaŭ la substantivo, havanta la karakteron de verbo, se la substantivo estas determinita de de-sintagmo. Sed se rilata propozicio venas post la substantivo, oni povas aŭ uzi aŭ ne uzi la artikolon.
(ekz: *La hirundo anoncas la alvenon de printempo.*; *Vi ricevos de li la(=tiun) instruon, kiun vi bezonas.*)
(komparu: *Vi ricevos de li instruon, kiu estos valora.*)
- D) Ĝi estas uzata antaŭ la propra substantivo, antaŭ aŭ post kiu troviĝas ordinara adjektivo.
(ekz: *la Ruĝa Maro*; *la Monto Blanka*)
- E) Ĝi estas uzata, se propra substantivo estas kvalifikita de epiteto.
(ekz: *Seĝong la granda*; *la tuta Koreujo*)
- F) Se antaŭ propra substantivo venas iu klariga substantivo, oni uzas artikolon antaŭ la klariga substantivo.
(ekz: *la rivero Hangang*; *la reĝo Seĝong*)
- G) Ĝi estas uzata nur gramatike en jenaj kazoj.
- ① antaŭ adjektivo, kiu estas uzata kiel substantivo
(ekz: *la Ĉiopova*; *la granda*)

- ② kiam citaĵo estas rigardata kiel substantivo
(ekz: *La 'multe' de lia parolo estas vere la 'malmulte'.*)
- ③ kiam propra substantivo estas uzata kiel ordinara substantivo
(ekz: *Li estas la Zamenhof de la vilaĝo.*)
- ④ antaŭ la vorto 'plej' de la superlativo
(ekz: *Li estas la plej diligenta el ili.*)
- ⑤ antaŭ la vorto 'pli' de la komparativo, se ekzistas nur du komparaĵoj.
(ekz: *La pli forta el liaj manoj estas la dekstra.*)
- ⑥ kiam poseda adjektivo estas uzata kiel pronomo.
(ekz: *Ĝi estas la mia.*)

<Rimarko>

Tiu esprimo estas sama kiel 'Ĝi estas mia.'

Ni esploru la diferencon de tiuj du esprimoj.

(a) Tiu libro estas via, kaj ĉi tiu libro estas mia.

(b) Via pano estas granda, sed la mia estas malgranda.

En la frazo (a) la du vortoj <via> kaj <mia> estas uzataj kiel posedaj pronomoj, sed <la mia> en la frazo (b) estas uzata anstataŭ <mia pano>.

7) Ĉu starigi numeralon kiel unu el la parolelementoj?

En la angla gramatiko numeralo estas klasifikita kiel adjektivo. Sed en Esperanto ni devas starigi ĝin kiel unu memstaran kategorion de parolelementoj pro jenaj kialoj.

1-e, numeralo estas forme malsama ol adjektivo. Ĝi ne havas adjektivan finaĵon.

2-e, numeralo ne povas havi post si la finaĵojn {-n} kaj {-j}, dum adjektivo povas havi ilin post si.

II.3. Vortofarado

Oni povas pluformi novajn vortojn uzante jam ekzistantajn morfemojn. En Esperanto, same kiel en aliaj lingvoj, ni povas pluformi vortojn per derivado kaj kunmetado.

II.3.1. Derivado

Kiam oni pluformas novan vorton per aldono de afiksoj al radiko, ni nomas tion derivado. En Esperanto ekzistas prefiksa derivado kaj sufiksa derivado.

II.3.1.1. Prefiksa Derivado

Prefiksoj aldonas novan plian sencon al la radiko. En Esperanto ekzistas jenaj prefiksoj.

1) {bo-} homa rilato post geedziĝo

bopatro	patro de la edzo, patro de la edzino
bopatrino	patrino de la edzo, patrino de la edzino
bogepatroj	gepatroj de la edzo, gepatroj de la edzino
bofilo	edzo de la filino
bofilino	edzino de la filo
bofrato	(bo)frato de la edz(in)o, edzo de la (bo)fratino
bofratino	(bo)fratino de la edz(in)o, edzino de la (bo)frato
boparenciĝi	fariĝi rilato inter du familioj per geedziĝo

2) {dis-} malcentriĝo; dividiĝo en multajn direktojn

disdoni	doni al multaj homoj
disvastigi	vaste konigi ion
disigi	apartigi; dividi; pecigi

3) {ek-} komenco

ekiri	komenci iradon
ekscii	subite rimarki; subite scii; subite kompreni
ekridi	komenci ridon
eksidi	sidigi sin

4) {eks-} antaŭa, ne plu posedata ofico aŭ pozicio

eksprezidanto	la prezidanto, kiu finis sian oficon kaj ne plu oficas
eksedz(in)iĝi	ĉesi esti la edz(in)o
eksigi	fari iun ĉesigi sian oficon

5) {ge-} ambaŭ seksoj

gefratoj	frato(j) kaj fratino(j)
gepatroj	patro kaj patrino
geedziĝi	pariĝi per edziĝo kaj edziniĝo
geknaboj	knabo(j) kaj knabino(j)
gesinjoroj	geedzoj de iu familio; sinjoro(j) kaj sinjorino(j)

6) {mal-} kontraŭeco; neo

malbona	kontraŭa al bono
malkompreni	miskompreni

malami	abomeni; deziri al iu malbonon
maldekstra	kontraŭa al dekstro
male	kontraŭe

7) {mis-} eraro

miskoni	erare koni
misi/miso	erari/eraro
miskompreni	erare kompreni

8) {pra-} antaŭlongeco; familia rilato antaŭ aŭ post unu generacio

prapatro	unua patro de familio aŭ gento; mal-ido
pratempo	antaŭlonga tempo
praarbaro	arbaro ekzistanta de pratempo
prahomo	antaŭlonga homo; primitiva homo
praavo	patro de la avo
pranepo	filo de la nepo

9) {re-} retroveno al la deira loko aŭ stato; ripeto

rebati	defende bati kontraŭ ies bato; ripete bati
reiri	retroiri; iri unu fojon pli
reveni	retroveni al la deira loko; veni unu fojon pli
revidi	vidi unu fojon pli
reviziti	viziti unu fojon pli

Supre vi vidas 9 oficialajn prefiksojn, kaj krom ili ankoraŭ ekzistas jenaj kvazaŭprefiksoj kaj neoficialaj prefiksoj.

{vic-} anstataŭanto por alia; dua-rango

{for-} longa distanco

{tele-} longa distanco (teknika vorto)

{retro-} kontraŭa al normala direkto

II.3.1.2. Sufiksa Derivado

Sufiksoj ankaŭ aldonas novan plian sencon al la radiko kaj krom tio ili foje povas ŝanĝi la kategorion de parolelemento. En Esperanto ekzistas jenaj sufiksoj.

{-aĉ-}	malboneco (hundaĉo; ĉevalaĉo; virinaĉo)
{-ad-}	daŭreco de ago (parolado)
{-aĵ-}	konkreta objekto; manĝebla objekto (vendaĵo; porkaĵo)
{-an-}	membro; adepto (familiano; kristano)
{-ant-}	daŭra aspekto.aktivo (leganta)
{-ar-}	kolekto (vortaro; arbaro)
{-at-}	daŭra aspekto.pasivo (legata)
{-ĉj-}	vira karesnomo (Tomĉjo; paĉjo)
{-ebl-}	pasiva povo (videbla)
{-ec-}	abstrakto (juneco; amikeco)
{-eg-}	granda; forta (belega; pordego)
{-ej-}	loko (lernejo; manĝejo)
{-em-}	inklino (hontema; parolema)
{-end-}	pasiva devo (lernenda)
{-er-}	konsistiganto (akvero; monero)
{-estr-}	ĉefo; kapulo (ŝipestro; lernejestro)

{-et-}	karesa; malgranda; malforta (iomete; knabeto)
{-id-}	naskito; filo; posteulo (bovido; reĝido; Izraelido)
{-ig-}	transitivigo; faktitivigo (beligi; turnigi)
{-iĝ-}	netransitivigo; medialigo (beliĝi; turniĝi)
{-il-}	instrumento (skribilo; kombilo)
{-in-}	virina sekso (patrino; virino)
{-ind-}	pasiva valoro (leginda; manĝinda)
{-ing-}	parta kovro (kandelingo; glavingo; cigaringo)
{-int-}	intaspekto.aktivo (leginta)
{-ism-}	doktrino; religio; kutima parolmaniero (demokratismo; kristanismo; esperantismo; anglismo)
{-ist-}	okupo-havanto; adepto (dentisto; esperantisto)
{-it-}	intaspekto.pasivo (legita)
{-nj-}	virina karesnomo (Elinjo; panjo)
{-obl-}	multipliko (trioble)
{-on-}	frakcio (triono)
{-ont-}	ontaspekto.aktivo (legonta)
{-op-}	kolektivecon (triope)
{-ot-}	ontaspekto.pasivo (legota)
{-uj-}	tuta kovro (lando, arbo, vazo) (Koreujo; pomujo; sukerujo)
{-ul-}	homo (junulo)
{-um-}	sen difinita senco (kolumo; akvumi; butonumi)

Supre montritaj sufiksoj estas oficialaj, kaj krom ili ekzistas ankaŭ neoficialaj kiel jenaj.

{-i-}	lando (Koreio; Francio)
{-iv-}	pozitiva ebleco (produktiva)
{-iz-}	apliki; igi (ŝtalizi; pasteŭrizi; organizi)
{-oz-}	malsano (horzonozo)

Kiam sufikso ligiĝas al radiko, principe nenio enŝoviĝas inter ili. Sed en speciala kazo por eviti konfuzon kun aliaj vortoj aŭ evidentigi la signifon, ni povas enŝovi diversajn finaĵojn, ekzemple: post-e-ulo (por eviti konfuzon kun la vorto ‘postulo’), unu-a-eco (por distingi disde ‘unueco’), varm-o-igi (por distingi disde ‘varmigi’).

La aserto, ke sufikso povas ŝanĝi parolelementon de la vorto, estas repensinda problemo. En Esperanto la parolelemento de vorto estas decidata nur, post kiam la parolelementa finaĵo estas aldonata al la radiko. Ekzemple ĉe ‘manĝad-’ la parolelemento estas ankoraŭ ne decidita. Se ĝi prenas finaĵon {-o}, tiam ĝi do fariĝas substantivo, kaj se {-i}, verbo. Se estas tiel, sufikso havas nenian rilaton al parolelemento.

Sed reale ni povas dividi sufiksojn en la kategoriojn de ‘substantiviga’ (ekzemple -aĵ-, -an-, -ar-, -ec-, -id-, -in-, ktp.), ‘verbiga’ (ekzemple -ig-, -iĝ-, ktp.), kaj ‘adjektiviga’ (ekzemple -ebl-, -em-, -end-, -ind-, ktp.). Tio signifas, ke ni jam konscias, kiu sufikso faras kiun parolelementon. Sed inter ili ekzistas kelkaj dubaj (ekzemple -aĉ-, -ad-, -eg-, -et-, -obl-, -on-, -op-, -um- ktp.). Por ili ni devas kolekti multajn ekzemplojn kaj statistiki ilin.

En derivado la plej grava afero estas tio, ke ni devas kompreni la fakton, ke vortoj derivitaj per derivado estas novaj memstaraj vortoj. Ekzemple la vortoj ‘arboj’ kaj ‘arbaro’, kaj ‘parol-’ kaj ‘parolad-’ havas tute apartajn

nesamajn nociojn. Tial ni devas esti atentaj pri tiu punkto, kiam ni uzas derivitajn vortojn.

En naciaj lingvoj derivitaj vortoj aperas en vortaroj kiel kapvortoj, sed en Esperanto ne estas tiel. Tio ne estas teknika afero de kompilado de vortaro, sed aludas pli fundamentan aferon, nome, ke en Esperanto oni ne devas nepre rigardi derivitajn vortojn kiel novaj memstaraj vortoj. Supre mi diris, ke derivitaj vortoj estas novaj memstaraj vortoj, sed ekzistas multaj kazoj, kie ni ne povas rigardi tiel. Ekzemple mi dubas, ĉu mi devas memori la vortojn ‘bela’ kaj ‘beleta’ kiel apartaj du vortoj. Povas esti, ke iu nacio ne konceptas la du vortojn ‘parol-’ kaj ‘parolad-’ aparte. Ankaŭ tion ni devas atenti ĉe derivado.

Kaj la vortoj ‘ir-i’ kaj ‘ir-o’ estas respektive verbo kaj substantivo. En tiu kazo PAG rigardas la {-o} ne kiel finaĵo, sed kiel sufikso. Kaj en la sama kazo en korea lingvo ĝi (la finaĵo {-o}, nome en la korea {-ㅁ} kaj {-ㄱ}) en ‘감’/kam/ kaj ‘가’/kaki/ estas traktata kiel substantiviga finaĵo, kaj en la angla kiel substantiviga sufikso (ekz: la {-ing} en ‘going’ kaj ‘studying’). La vidpunkto de PAG rigardi ĝin kiel sufikso elbe estas influita de tio, ke sufikso havas funkcion ŝanĝi parolelementon. Sed tia vidpunkto havas jenajn problemojn.

1-e, por rigardi {-o} de ‘ir-o’ kiel sufikso ni bezonas antaŭkondiĉon, ke ‘ir-’ estas verbo. Tio estas kontraŭ la principo de Esperanto. Kiel ni jam scias, la parolelementoj de substantivoj, verboj, adjektivoj kaj adverboj de Esperanto ne estas decidataj ĉe la stato de radiko, sed ili estas decidataj nur post kiam aldoniĝas parolelementaj finaĵoj (Vd: II.4. Konjugacio). Kaj tial ni ne povas diri, ke ‘ir-’ estas verbo.

2-e, se ni rigardas {-o} kiel sufikso, ni povas rigardi ankaŭ {-i} kiel sufikso. Kaj en tia kazo ĉiuj parolelementaj, tensaj kaj modaj finaĵoj de Esperanto fariĝas sufiksoj, kaj rezultas, ke ne ekzistas konjugaciaj finaĵoj. Tio do estas tro fremda kompare kun ĝenerala gramatiko.

3-e, se ni promesus, ke ni atribuu bazan parolelementon al radiko, kaj ke ni ŝanĝu la parolelementon per aldono de parolelementaj finaĵoj malsamaj ol la atribuita baza parolelemento, kaj ke nur en tiu kazo ni rigardu la finaĵon kiel sufikso, tio unuvide ŝajnus logika. Sed ankaŭ tio havas problemojn. Ni ne havas ian normon por atribui bazan parolelementon al radiko. Ekzemple ni ne havas definitivan normon, kiun parolelementon ni devas atribui al la radiko ‘ĝoj-’. Iuj pensas, ke ĝi estas adjektivo, kaj aliaj pensas, ke ĝi estas verbo. Tial ni ne povas facile decidi, ĉu {-a} de ‘ĝoj-a’ estas sufikso aŭ ne. Pro tiuj kialoj mi rigardas {-o} de la vorto ‘ir-o’ ne kiel sufikso, sed kiel parolelementa finaĵo.

Sed ekzistas kazoj, kie ni ne povas ne rigardi ĝin kiel sufikso, ekzemple la {-i} kaj {-o} en ‘per-i’, ‘anstataŭ-i’ kaj ‘kial-o’. La vortoj ‘per’, ‘anstataŭ’ kaj ‘kial’, ili ĉiuj estas jam deciditaj kiel unu el la parolelementoj ĉe stato de radiko (respektive prepozicio, prepozicio, adverbo), tial la {-i} kaj {-o} en tiuj kazoj evidente havas funkcion de parolelemento-ŝanĝo.

Kaj la lasta, kion ni devas atenti en derivado, estas la strukturoj <afikso + parolelementa finaĵo> kaj <afikso + afikso + parolelementa finaĵo>. La strukturoj apartenas nek al derivado nek al kunmetado. Ekzemple en la vortoj ‘ebl-e’, ‘mal-a’, ‘eks-ig-i’, ktp ne ekzistas radikoj. Ordinare en naturaj lingvoj apenaŭ troviĝas vortoj, kiuj ne havas radikon. Sed en Esperanto ĉiaj lingvaj formoj mem povas fariĝi radiko. Pro tio ĉiuj finaĵoj

kaj afiksoj povas ludi la rolon de radiko. Principe do en Esperanto la supraj strukturoj estas permesataj.

Se estas tiel, ni devas klarigi la strukturojn. Tio eblas pere de du manieroj. Unue, konsiderante ilin unu el gramatikaj kategorioj, ni donas al ili propran nomon (ekz: afikso-kunmetado). Due, en tiu kazo ni traktas la antaŭan afikson kiel radikon. Mi preferas la duan, ĉar tiam estas evidente, ke la antaŭa afikso, en nia konscio, ludas la rolon de radiko.

Kiam ni elektas la duan, la strukturon <afikso + parolelementa finaĵo> ni devas klarigi en la kategorio de parolelemento kaj la strukturon <afikso + afikso + parolelementa finaĵo> en tiu de derivado.

II.3.1.3. Aspekto

Aspekto ni nomas la realiĝantan figuron de la ago aŭ stato esprimita de la predikato. Strikte dirite, per ĝi oni esprimas, kiel la parolanto komprenas la agon(aŭ la staton) esprimitan de la predikato.

Laŭ la ‘plena analiza gramatiko de esperanto’(1980, UEA), Esperanto havas jenajn 5 aspektojn.

inkoativo (komenca)	ek-, -iĝ-
momentaneo (momenta)	ek-
durativo (daŭra)	-ad-
iterativo (ripeta)	re-
perfektivo (fina)	-int-, -it-

Mi ne scias, kiun formon bazon havas la sistemo. Sur kiu bazo oni

dividis la 5 aspektojn? Kaj krom la 5 aspektoj, ĉu Esperanto ne havas aliajn?

Ni esploru la bazon de formo. Kiel ni vidis supre, oni esprimas la 5 aspektojn ĉefe per afiksoj. Tion ni povas konsideri kiel unu el formaj bazoj.

Sed la nombro 5 estas hazardo. Logike povas ekzisti pli multaj aspektoj krom ili, ekzemple ‘stato estanta’, ‘stato estonta’ aŭ ‘ago kutima’ ktp. Tamen oni dividis nur 5 aspektojn. Kial?

Ni devas ree pripensi la sistemon.

Se ni konsideras ĉi tie ankaŭ la sistemojn de tenso kaj voĉo, kiujn ni studos poste, ni devus diri, ke Esperanto havas 3 aspektojn, nome ‘antaspekto, intaspekto, ontaspekto’, kaj ankaŭ ke la aspekto ĉiam esprimiĝas forme samtempe kun la voĉo. Se ni faras tiel, ni povas doni certan forman bazon al la sistemo de aspekto, kaj ankaŭ certigi la nombron de aspektoj. La voĉaj afiksoj de Esperanto estas <-ant-, -at-, -int-, -it-, -ont-, -ot->. Jen estas la aspekta sistemo.

antaspekto	-ant-, -at-
intaspekto	-int-, -it-
ontaspekto	-ont-, -ot-

La signifojn oni povus scii per la nomoj. Mi do preterlasos la klarigon.

II .3.1.4. Voĉo

Voĉo estas la rilato inter la ago de predikato kaj la subjekto de la frazo. Ilin esprimas aspektaj afiksoj.

Laŭ PAG, ekzistas 4 voĉoj en Esperanto.

aktivo	-ant-, -int-, -ont-
pasivo	-at-, -it-, -ot-
faktitivo	-ig-
medialo	-iĝ-

II.3.1.4.1. Aktivo

Aktivo signifas, ke la subjekto de la frazo mem faras la agon de predikato. Jen vidu la ekzemplojn.

- ① Mi legas la libron.
- ② Mi eatas leganta la libron.
- ③ Li sidas en la ĉambro.
- ④ Li estas sidanta en la ĉambro.
- ⑤ La knabo, leganta la libron, estas mia amiko.

Ĉe la verboj ‘legas’ kaj ‘sidas’ de la ekzemploj ① kaj ③, ne troviĝas aparta metodo de voĉo. Tamen laŭ la signifoj de la verboj evidentas, ke ili estas aktivo. Kaj por klare evidentigi voĉon, oni povas paroli kiel la ekzemploj ② kaj ④ per la strukturo <esti + aktiva participo>. Sed tio ne estas necesa. Kiam oni parolas same kiel la frazoj ② kaj ④, la esprimoj montras ne nur voĉon, sed ankaŭ aspekton. Kaj en ⑤, per la participo ‘leganta’ oni povas scii, ke la subjekto(ĉi tie ĝi estas eliminata) mem faras la agon.

II.3.1.4.2. Pasivo

Pasivo signifas, ke la ago de predikato influas la subjekton(t.e. la subjekto ricevas la influon de la verbo), kaj samtempe la ago estas kaŭzita ne fare de la subjekto, sed de iu alia aganto. Ni vidu jenajn ekzemplojn.

- ① Li estis invitita de ŝi.
- ② La libro estis eldonita en la jaro 1988.
- ③ La sinjoro, invitita de ŝi, estas mia amiko.

Kiel ni vidas supre, pasivo havas la strukturon <esti + pasiva participo>. Kaj por esprimi la aganton oni uzas prepozicion ‘de’. Sed foje oni ne bezonas esprimi la aganton, kiel ni vidas supre en ②.

II.3.1.4.3. Faktitivo

Faktitivo signifas, ke la subjekto faras la objekton plenumi la agon esprimitan de la predikato.

- ① Ĝi beligis ŝin.
- ② Li sidigis la infanon sur la seĝon.
- ③ Li sciigis tion al li.(=Li sciigis lin pri tio.)
- ④ Li manĝigis ĝin al ŝi.(=Li manĝigis ŝin per ĝi.)

En la ekzemplo ①, alĝuiĝis al adjektivo la sufikso {-ig-}. La ekspliko de la frazo estas ‘Ĝi igis ŝin bela’. Tiu-forma faktitivo eblas ĉe ĉiuj parolelementoj, ne nur ĉe adjektivo, sed ankaŭ ĉe substantivo(akvigi), adverbo(troigi), prepozicio(eligi), verbo(kiel en la ekzemploj ②,③,④) ktp.

En la ekzemplo ②, la faktitivo formiĝis el netransitiva verbo, kaj tiam uziĝas nur unu objekto. Kompare kun ③ kaj ④, la ekzemplo ② diferencas je la nombro de objekto. Ĝi povas havi nur unu objekton, ĉar la faktitivo formiĝis el netransitiva verbo. Sed en ③ kaj ④ la faktitivo formiĝis el transitiva verbo, kaj nature laŭ la senco ili havas du objektojn. Ni do povas esprimi ilin ankaŭ kiel la frazoj en la krampoj supre, kie ŝanĝiĝis la objektoj.

II.3.1.4.4. Medialo

Medialo signifas, ke la subjekto ricevas la influon de la ago esprimita de la predikato, kaj la subjekto mem estas la aganto. Medialo kaj pasivo samas je tio, ke la subjekto estas influita de la ago de predikato, sed diferencas je tio, ke ĉe medialo la subjekto mem estas la aganto de la ago. Vidu jenajn ekzemplojn.

- ① Ŝi beliĝis.
- ② Li sidiĝis.
- ③ La pordo fermiĝis.

En ekzemplo ①, oni formas medialon per almeto de {-iĝ-} al adjektivo. Tiu-forma medialo, same kiel mi menciis ĉe faktitivo, eblas ĉe ĉiuj parolelementoj. La sufikso {-iĝ-} povas algluiĝi ne nur al adjektivo, sed ankaŭ al substantivo(glaciigĝi), adverbo(forigĝi), prepozicio(aligĝi), verbo(kiel en ②, ③) ktp. La ekspliko estas: Ŝi iĝis bela.

En ② la medialo formiĝis el netransitiva stato-verbo, kaj tiam la medialo havas la sencon de ago-verbo.

Kaj en ③ la medialo estas formita el transitiva verbo. Tiam ŝajnas, ke la medialo iugrade havas la sencon de pasivo, ĉar por fermiĝi la pordo nepre bezonas forton de ekstero. Sed kompare kun la pasiva esprimo ‘La pordo estis fermita’ ĝi diferencas je tio, ke en la pasivo evidentas la forto de ekstero(oni scias, kiu fermis la pordon, kaj povas esprimi la aganton per la prepozicio ‘de’), dum en medialo la forto de ekstero estas apenaŭ sentebla. Oni do devas uzi ne medialon, sed pasivon, kiam la forto de ekstero estas evidenta. Estas pli bone esprimi en pasivo jenajn medialojn.

- La letero skribiĝis per krajono. $\Rightarrow$ La letero estis skribita per krajono.
- Li invitiĝis al la konferenco. $\Rightarrow$ Li estis invitita al la konferenco.

II.3.1.5. Participo

Ni nomas ‘participo’ la lingvoformon kun la aspektaj kaj voĉaj sufiksoj <-ant-, -at-, -int-, -it-, -ont-, -ot->. Krom verba finaĵo ĉiuj parolelementaj finaĵoj povas alĝluiĝi post participo (en speciala kazo ankaŭ verba finaĵo alĝluiĝi post ĝi: manĝintus). Kaj ili ludas diversajn rolojn en la frazo.

II.3.1.5.1. Substantiva uzo

Se post participo alĝluiĝas substantiva finaĵo {-o}, principe ĝi montras ‘homon’. Ekzemple ‘dorm-ant-o(homo, kiu dormas)’, ‘ĉeest-ant-o(homo, kiu ĉeestas)’, ‘parol-ant-o(homo, kiu parolas)’, ‘am-at-o(homo, kiu estas amata)’, ‘arest-it-o(homo, kiu estas arestita)’.

Ĉi tie ni devas atenti, ke, laŭ la karaktero de verbo(ĉu momenta, ĉu daŭra), la participo povas alĝluiĝi, aŭ ne.

Ekzemple, de la verbo ‘bati’, kiu estas momenta verbo, povas deveni la vorto ‘batinto’, sed la vorto ‘sidinto’, elfarita el la daŭra verbo ‘sidi’, estas iom stranga. Kaj ankaŭ la vorto ‘partopreninto’ estas ne bona pro la sama kialo. Kiam iu raportas iun kunvenon, kaj tiam se li diras “Ĉiuj partoprenintoj aklamis laŭte”, tio estas malnatura. La verbo ‘aklamis’ estas preterito. La frazo do montras pasintecon. Sekve en tiu frazo la participo <-into> devas signi imperfekton. Kaj logike la voto ‘partopreninto’ signifas, ke la homo, kiu partoprenis, nun ne plu estas en la loko, sed jam forlasis la lokon. Kaj tial tiu forlasinto ne povas fari la agon ‘aklami’ en la loko. Sed en la frazo “Ĉiuj batintoj aklamis laŭte”, ‘bati’ estas momenta verbo, kaj tial ĝi estas senproblema. Estas tute nature akلامي por tiuj, kiuj jam finis la agon ‘bati’. Kiuj jam finis bati, tiuj nun povas akلامي restante en sama loko.

II.3.1.5.2. Adjektiva uzo

Participo povas roli kiel adjektivo kun aldonita adjektiva finaĵo {-a}. Same kiel aliaj adjektivoj, ĝi povas rekte kvalifiki aŭ determini substantivon, metite antaŭ aŭ malantaŭ ĝi, kaj ankaŭ povas malrekte rilati al substantivo kiel predikativo. Ni vidu jenajn ekzemplojn.

- ① Ĝi estas dormanta leono.
- ② Ĝi estas mia amata kanto.
- ③ Li estis dormanta en la ĉambro.
- ④ Li estis amata de ŝi.

En la ekzemploj ① kaj ② la participa adjektivo rekte kvalifikas

substantivon. En tiu kazo ni povas diri, ke ĝi havas du funkciojn de predikato kaj adjektiva epiteto, same kiel en la kazo de infinitivo en konjugacio. En ① la participo ‘dormanta’, estante epiteto de ‘leono’, funkcias kiel predikato en la subkomprenata frazo ‘la leono dormas’. Kaj en la frazoj ③ kaj ④ la participoj estas predikativoj. Kiam participo malrekte rilatas subjekton kiel adjektiva predikativo, ĝi esprimas nur aspekton kaj voĉon. Ĝi ne havas du funkciojn.

II.3.1.5.3. Adverba uzo

Participo kun la adverba finaĵo {-e}, estas uzata kiel adverbo. Jen estas la ekzemploj.

- ① Li plorante sekvis sian patron.
- ② Li sekvis ŝin, tirite de ŝia ĉarmo.
- ③ Parolante kun ŝi, li trovis, ke ŝi estas tre ĝentila.

Ĝi ankaŭ havas du funkciojn, same kiel en la adjektiva uzo. En supraj ekzemploj la participoj estas ne nur adjektoj, sed ankaŭ predikatoj de la subkomprenataj frazoj, ‘li ploris’, ‘li estis tirita de ŝia ĉarmo’ kaj ‘li parolas kun ŝi’.

Kaj ĉi tie ni devas atenti, ke la laŭsenca subjekto de la participa adverbo devas esti sama kiel tiu de la frazo. Nome en supraj ekzemploj ①, ② kaj ③ laŭsenca subjekto de ĉiu participa adverbo estas ‘li’, kiu estas ankaŭ la subjekto de la frazo. Se la subjekto de la participa adverbo ne estas sama kiel tiu de la frazo, ne eblas fari la partician adverbon kiel en la supraj ekzemploj, kaj tiam oni devas esprimi en alia maniero.

II.3.2. Kunmetado

Kunmetante radikojn, oni formas novan vorton. Tian vortofaradon oni nomas kunmetado. Logike la nombro de la kunmetataj radikoj estas senlima. Sed ordinare du aŭ tri radikoj kunmetiĝas. Ĉe kunmetado troviĝas gravaj principoj.

Unue, la ĉefa elemento staras en la lasta loko.

Due, inter radikoj metiĝas nenia elemento.

La unua el tiuj du principoj estas sama kiel la principo de korealingva kunmetado. La ordo kunligi radikojn por kunmetado estas sama kiel tiu en korea lingvo. En korea lingvo, {son-dŭng}, {ĉim-sil} estas esperante ‘mandors-o’, ‘dorm-ĉambr-o’, kaj iliaj vicoj estas tute samaj.

Kaj ĉe la dua principo ekzistas escepto. Foje oni enŝovas ian elementon inter la radikojn. Inter radikoj foje staras la finaĵoj <-o, -a, -i, -e, -en, ktp>. Jen estas la kaŭzoj.

- ① Kiam la kunligo de radikoj malfaciligas la elparolon.
- ② Kiam oni ne povas facile rimarki la kunmetitecon de la vorto.
- ③ Kiam la vorto povas fariĝi iu alia vorto.
- ④ Kiam necesas evidenti la signifon de la kunmetita vorto.
- ⑤ Kiam jam kutime oni uzas la finaĵon.

En ①, ② kaj ③ ordinare oni uzas finaĵon {-o}, sed laŭ kazoj, oni povas uzi alian finaĵon. En ④ oni elekte uzas taŭgan finaĵon laŭ signifoj. Kaj en ⑤ la finaĵo estas fiksita, ĉar ĝi estas kutimiĝinta esprimo. Jen ni vidu la ekzemplojn laŭ la kazoj.

- ① gast-o-ĉambro, rab-o-birdo, kurb-a-krura, minut-e-bakita
- ② di-o-simila, lu-o-dormo
- ③ fe-o-kanto, konk-o-ludo
- ④ unu-a-foje, unu-a-vide, supr-en-iri, flank-en-iri
- ⑤ mult-e-nombro, kelk-a-foje, viv-i-pova, pag-i-deva

Ni povas analizi kaj ekspliki kunmetitajn vortojn en du vojoj, unu estas simpla kaj la alia estas komplika. La simpla vojo estas sekvi la principojn supre prezentitajn, kaj la komplika estas la analizoj kaj eksplikoj proponitaj en la libro ‘plena analiza gramatiko de esperanto’(1980, UEA: LA VORTFARADO).

Por pli detalaj analizoj kaj eksplikoj, konsultu la libron. Ĉi tie mi mencias nur kelkajn aferojn, kiujn oni devas atenti.

II .3.2.1. Adjektivo + substantivo

Adjektivo kvalifikas aŭ determinas substantivon antaŭ ĝi, kio estas tute natura sintaksa funkcio de adjektivo. Tia strukturo estas natura sintaksa strukturo, kaj oni ne bezonas aliformigi ĝin. Sed ekzistas homoj, kiuj kunmetas ilin, kaj elfaras unu morfologian strukturon. Tio estas eraro.

Ekzemple ‘bela koloro’ estas natura strukturo, sed ‘belkoloro’ ne estas ĝusta kunmeto. Se oni permesas tian kunmeton, oni povas ligi ĉiujn adjektivojn kaj la substantivojn, kaj formi kunmetojn. Se estas tiel, oni ne bezonas adjektivajn epitetojn. Tio do estas tro eksterordinara for de ĝeneralaj lingvo-fenomenoj. Se tiamaniere kunmetiĝus ĉiuj adjektivoj, oni ne povus distingi inter ‘bela reĝino’(reĝino, kiu estas bela) kaj ‘belreĝino’

(reĝino de beleco). Ni do devas ne formi kunmeton el la strukturo <adjektivo + substantivo>.

Sed foje oni faras tian kunmeton, nur se la tuta kunmetita vorto ne funkcias kiel substantivo, sed kiel alia parolelemento. Por ekzemplo, ‘belrakonta’ estas permesebla, kvankam ‘belrakonto’ ne. Ĉar ĝia strukturo estas ‘(bela rakonto)-a’. Nome la tuta sintaksa strukturo jen funkcias kiel unu radiko, kaj post ĝi gluiĝas vorto-finaĵo. El tio ni povas lerni, ke ‘dek-tria’ estas ĝusta, sed ‘dek tria’ ne.

II.3.2.2. Transitiva verbo + objekto

Estas tute fundamenta funkcio kaj natura sintaksa strukturo por transitiva verbo, ke ĝi prenas objekton. Ni ne bezonas ŝanĝi la strukturon al kunmetita vorto. Ekzemple oni ne devas ŝanĝi ‘skribi leteron’ al ‘leterskribi’. Se oni tiel kunmetas ĉiujn transitivajn verbojn, tio devias tro multe de la ĝenerala lingvo-fenomeno, same kiel en la kazo de la strukturo <adjektivo + substantivo>, kiun ni supre tuŝis.

Sed ni foje renkontas tian kunmeton, kiam la signifo de la kunmetita vorto ne estas sama kiel tiu de la sintaksa strukturo. En la frazoj “Mi skribis leteron al li” kaj “Mi leterskribis dum la tuta posttagmezo”, diferencas la signifoj de ‘skribi leteron’ kaj ‘leterskribi’. La unua esprimas ‘konkrete skribi leteron al iu’. La dua ‘faras la laboron de leter-skribado’. Fakte ekzistas diferenco inter ili. Ni do devas ne formi kunmetitan vorton el la strukturo <transitiva verbo + objekto>, por ke ni povu konservi la eblecon distingi inter tiuj delikataj diferencoj.

II.4. Konjugacio

Konjugacio estas gramatikaj kategorioj, kiujn oni esprimas per la ŝanĝoj de verbo-finaĵoj. Ĝi havas du kategoriojn: 1) finitivo, esprimata per ŝanĝo de verbo-finaĵoj; 2) infinitivo, esprimata ne per ŝanĝo de verbo-finaĵoj, sed per la baza formo de la verbo.

II.4.1. Finitivo

Finitivo estas la gramatika kategorio, esprimata per la ŝanĝo de verbaj finaĵoj. En finitivo ekzistas modo. Modo estas la korstato aŭ sinteno de parolanto, kiun li tenas pri la enhavo de la parolo aŭ pri la alparolato. Ekzistas tri modoj: indikativo, kondicionalo kaj volitivo.

II.4.1.1. Indikativo

Indikativo ni nomas la parolmanieron, en kiu la parolanto nur priskribas la fakton. La parolanto ne ordonas, nek volas ion al la alparolato, nek supozas la enhavon de la parolo.

En indikativo esprimiĝas tenso. En Esperanto ekzistas dek du tensoj: tri bazaj(prezenco, preterito, futuro) kaj naŭ kompleksaj, kaj tiuj lastaj esprimiĝas per kunmeto de la bazaj tensoj kaj aspektoj(daŭranteco, fininteco, faronteco). Jen estas ĉiuj tensoj kaj iliaj verbofinaĵoj aŭ esprimmanieroj.

bazaj tensoj	prezenco	-as
	preterito	-is
	futuro	-os
kompleksaj tensoj	prezenca daŭranteco	estas — -anta/-ata
	preterita daŭranteco	estis — -anta/-ata
	futura daŭranteco	estos — -anta/-ata
	prezenca fininteco	estas — -inta/-ita
	preterita fininteco	estis — -inta/-ita
	futura fininteco	estos — -inta/-ita
	prezenca faronteco	estas — -onta/-ota
	preterita faronteco	estis — -onta/-ota
	futura faronteco	estos — -onta/-ota

II.4.1.2. Kondicionalo

En Esperanto kondicionalo havas jenajn signifojn.

- ① supozo mala al la fakto
(ekz: *Se mi estus birdo, mi flugus al vi.*)
- ② konjekto pri futuro preskaŭ ne realigebla
(ekz: *Se morgaŭ venus la fino de la mondo, mi donus al vi ĉion mian.*)
- ③ forta deziro
(ekz: *Se li venus nun!*)
- ④ ĝentila peto
(ekz: *Ĉu vi sendus ĝin al mi?*)

Ni devas atenti, ke kondicionalo kaj kondicionala frazo nepre devas havi la finaĵon {-us}, kaj la subjunkcio 'se' ne estas nepre necesa elemento por ĝi. Sen la verba finaĵo {-us}, eĉ se la frazo havas la vorton 'se', ĝi ne estas kondicionalo, sed indikativo. Kaj tiam la vorto 'se' havas nur la originan sencon 'kaze de'.

Multaj gramatikaj libroj de Esperanto ne konas la supre donitan duan signifon de la kondicionalo. Ni devas konsideri ĝin rilate al la tenso de kondicionalo. En la kondicionalo de Esperanto ne eblas esprimi tenson. Ne eblas kunmeti tensan finĵon kaj kondicionalan finaĵon. Tial, se ni volas esprimi tenson en kondicionalo, ni devas uzi jenajn diversajn vortojn rilatajn al tenso.

① Se vi venus hieraŭ, mi povus prezenti vin al li.

② Se vi venus morgaŭ, mi povus prezenti vin al li.

Se ni esprimas tenson tiamaniere, la ekzemplo ① estas evidente preterito, kaj la ② devas esti futuro. Kaj kiam la kondicionalo estas en preterito(aŭ prezenco), ĝi certe havas la unuan signifon el la kvar signifoj de la kondicionalo. Sed en la kazo de futura kondicionalo ĝi ne povas havi la unuan signifon, ĉar 'supozo mala al la fakto' signifas mem, ke jam ekzistas la fakto, kaj tio signifas preteriton. Mi do pensas, ke futura kondicionalo havas la duan signifon el la kvar signifoj de la kondicionalo.

Kaj ni devas atente distingi inter la signifoj de futura kondicionalo kaj la strukturo <se + {-os}>. Ni vidu.

③ Se vi venos morgaŭ, mi donos ĝin al vi.

④ Se vi venus morgaŭ, mi donus ĝin al vi.

La frazo ③ signifas nur ‘se vi venos morgaŭ, en tiu kazo mi donos ĝin al vi’, kaj per tio ni ne povas konjekti, ĉu ‘vi’ morgaŭ venos aŭ ne. Sed la ④ signifas ‘vi certe ne venos morgaŭ, sed tamen se vi venus, en tiu kazo...’. En la kazo de ④ la parolanto bone scias, ke ‘vi’ ne venos. Iuj dubas pri la valoro de la dua signifo, demandante ĉu vere necesas esprimi tiel delikatan diferencon de la nuanco. Sed se ni renkontas jenajn frazojn, ni ne povas ne agnoski la neceson de futura kondicionalo.

⑤ Se li revivus, mi pli afable kondukus al li.

⑥ Se mi fariĝus reĝo, mi donus al vi grandan bienon.

Ni ne povas diri, ke la frazoj ⑤ kaj ⑥ estas preteritaj. Ili devas esti futuraj. Kaj per la esprimoj ni povas scii, ke la parolanto bone scias la neeblecon de la realiĝo.

II.4.1.3. Volitivo

Ni ordinare tradukas korealingve la volitivon de Esperanto ‘imperativo’ (ordona parolmaniero). Kaj tio kaŭzis malfacilajn problemojn. Ni vidu.

① Mi iru.

② Li iru.

③ Ni iru.

④ Dio helpu min.

⑤ Ĉio finiĝu ĝis li venos.

Ĉiuj ekzemploj ne estas la tipa ordona modo de dua persono. Ni ilin klarigis en diversaj manieroj, kiel jene: ĉe la singularo de unua persono la volitivo signifas ‘la decidon de la subjekto mem’, kaj ĉe la pluralo de unua persono ĝi signifas ‘persvado’, kaj ĉe la tria persono ĝi signifas ‘faktitivan ordonon’. Mi ne scias, de kie venis tia maniero de klarigo. Ne bone estas klarigi unu gramatikan kategorion tiel divers-voje.

Kaj eĉ se ni akceptas tian manieron ankoraŭ restas malfacile klarigi la frazojn ④ kaj ⑤, kiujn ni ne povas klarigi per ‘faktitiva ordono’. Ni ne povas diri, ke ili signifas, ‘Vi ordonu al Dio, ke Li helpu min.’ kaj ‘Vi ordonu al ĉio, ke ĉio rapide finiĝu.’ La frazon ⑤ ni devus esprimi per la ordono de dua persono: ‘Finu ĉion ĝis li venos’.

Por facile kaj kontente solvi la problemojn, ni devas traduki korealingve la volitivon de Esperanto ‘vola parolmaniero’. Ni evitu miskomprenon de enhavo kaŭzitan de malbona termino. Kiam ni nomas ĝin ‘vola parolmaniero’, la supraj ekzemploj povas esti eksplikitaj ke, ili montras la volon de la parolanto. Alivorte per volitivo la parolanto esprimas sian volon al la subjekto de la frazo.

Ĉe la singularo de unua persono la parolanto mem estas la subjekto de la frazo, kaj tial la volitivo esprimas nur sian volon, sed ne ian decidon. Ĉe la pluralo de unua persono la parolanto esprimas sian volon al la subjekto, t.e. pluralo de unua persono. Kaj ankaŭ ĉe la tria persono la parolanto esprimas sian volon al la subjekto de la frazo, t.e. tria persono, fari ion, esprimitan de la predikato.

Kaj ni ofte esprimas volitivon en demanda frazo, kiel jene.

⑥ Ĉu mi vizitu vin?

⑦ Ĉu li vizitu vin?

⑧ Ĉu ni vizitu lin?

Ni ordinare klarigas ilin per diversaj manieroj. En la kazo de ⑥, ni diras, ke la volitivo signifas ‘la dubon de la subjekto’ aŭ ‘sondon de la intenco de la alparolato’. Kaj en la kazoj de ⑦ kaj ⑧ ni diras, ke la volitivo signifas respektive ‘peton de permeso de la alparolato’ kaj ‘ĝentilan persvadon’.

Sed ankaŭ tiujn malfacilojn ni povas solvi per la termino ‘vola parolmaniero’. Ni povas ekspliki ilin ĉiujn per la klarigo ‘demandi la volon de la alparolato’. Per demanda frazo ni demandas ion al la alparolato, kaj tial demandi la volon al la alparolato en tiu kazo estas tute natura afero. Kaj ĉe ⑧ la alparolato estas iu(j) el ni, la pluralo de unua persono, inkluzivanta vin kaj min. Kaj ĝi estas plej ofte ‘vi’ el inter vi kaj mi.

Tiel tute simple kaj facile ni povas klarigi la volitivon, kiun ĝis nun ni eksplikis en diversaj manieroj. Sekve mi volas traduki korealingve la volitivon de Esperanto ‘vola parolmaniero’, sed ne ‘imperativo’.

II.4.2. Infinitivo

Kiam la baza formo de verbo, t.e. kun la finaĵo {-i}, havas diversajn gramatikajn funkciojn, tiun uzon de verbo ni nomas ‘infinitivo’. Malsame ol ĉe finitivo, ĉe infinitivo verbo ne ŝanĝas sian finaĵon. Tiam la verbo funkcias kiel diversaj frazelementoj, ekzemple subjekto, objekto, predikativo, epiteto kaj adjekto. En speciala kazo ĝi funkcias kiel predikato.

Se ni komparas la infinitivon kun finitivo, ni vidas, ke infinitiva verbo

havas ne nur la funkcion de predikato sed ankaŭ aliajn funkciojn, dum la finitiva havas unu solan funkcion de predikato, kiu estas la fundamenta funkcio de verbo. Mi do nomas finitivon ‘unu-funkcia modalo’, kaj infinitivon ‘du-funkcia modalo’. Sed kiam la infinitiva verbo funkcias kiel predikato, ĝi ne estas du-funkcia, sed nur unu-funkcia.(pri du-funkcia modalo vidu ankaŭ II.3.1.5. Participo)

II.4.2.1. Subjekta uzo

Infinitiva verbo jen funkcias kiel subjekto, konservante la verban karakteron kaj la predikatan funkcion. Ni vidu jenajn ekzemplojn.

① Ami iun estas ne nur feliĉo, sed ankaŭ doloro.

② Mensogi estas malbone.

La supraj infinitivoj ludas la rolon de subjekto en la frazo, konservante verban karakteron, kaj funkciante kiel predikato en la subkomprenta frazo. Ĉe la ekzempla frazo ① la subjekto ‘ami’ estas verbo, ĉar ĝi prenas objekton(iun). Kaj ĝi funkcias kiel predikato en la subkomprenata frazo ‘oni amas iun’. Ĉe ② la subjekto ‘mensogi’ estas predikato de la subkomprenata frazo ‘oni mensogas’. Esperanto havas specialan gramatikan regulon rilate al infinitiva subjekto. Kiam subjekto estas infinitivo, la predikativo devas esti adverbo, kiel ni vidas ĉe ②, sed ne adjektivo. Krom tio en kelkaj aliaj kazoj la predikativo aperas en adverba formo, sed ne en adjektiva formo. Pri tio ni studos poste. (Vd: III.2.2. Adverbo kiel subjekta predikativo; III.3.4. Sensubjekta frazo)

II.4.2.2. Objekta uzo

Jen la infinitivo funkcias kiel objekto.

- ① Mi deziras vidi vin.
- ② Li intencas kaŝi ĝin.
- ③ Mi volas(devas, povas) diri tion al li.

La infinitivoj en ĉi supraj ekzemploj estas uzataj kiel objekto. Kaj ni povas scii, ke ili konservas la karakteron de verbo, ĉar ili prenas objekton post si. Kaj ili funkcias ankaŭ kiel predikato ĉe la subkomprenataj frazoj ‘mi vidas vin’, ‘li kaŝas ĝin’ kaj ‘mi diras tion al li’.

Pri la ekzemplo ③ mi devas aparte mencii iom pli. Iuj esperantologoj traktas la strukturon <volas(devas, povas) + infinitivo> kiel verba sintagmo. Sed jen mi ne konsentas pri tiu opinio pro jenaj kialoj.

Unue, la verboj ‘voli, devi, povi’ estas tute samaj kiel ordinara transitivity verboj, prenante post si objektojn de ordinara substantivo aŭ infinitivo.

Due, ‘verba sintagmo’ oni nomas vortopon uzatan kiel unu predikato. Sed en tiu ĉi kazo en Esperanto ĉu vere la vortopo ‘volas diri’ esprimas nur unu predikatan nocion? Tio estas dubinda. En angla lingvo ekzistas tiel nomata help-verboj, kaj ili ne funkcias kiel kompleta transitiva verbo. Nome ili ne havas perfektan predikatan nocion. Kaj tial en la angla gramatiko oni povas starigi verban sintagmon. Sed en Esperanto, kiel mi diris, la verboj, ‘voli, devi, povi’ estas kompletaj transitivaj kaj ĉiu el ili esprimas unu perfektan predikatan nocion. Kaj tial ni ne bezonas starigi

verban sintagmon.

Trie, se ni traktas tiun strukturon kiel verba sintagmo, ĉiujn similajn strukturojn de verboj ni devus nomi ‘verba sintagmo’. La verboj ‘deziri, intenci, ordoni, proponi, ktp’ povas havi post si infinitivon, ĉu ni do devus nomi ilin ĉiujn ‘verba sintagmo’? Se estas tiel, ĉiuj objektaj uzoj de infinitivo fariĝas verba sintagmo. Kaj tio malfaciligas la klarigon de gramatiko, ĉar en tiu kazo verba sintagmo havas du tri predikatajn nociojn samtempe. (Vd: III.4. Specoj de sintagmo)

II.4.2.3. Predikativa uzo

Jen infinitivo estas uzata kiel predikativo.

- ① Mia hobio estas kolekti monerojn.
- ② La problemo ŝajnas rilati al li.
- ③ Mi vidis lin fali sub la podion.
- ④ Ŝi invitis lin kanti en la kunveno.

Ĉi supraj infinitivoj funkcias kiel subjektaj predikativoj(①, ②) kaj objektaj predikativoj(③, ④). Sed ni vidas, ke ili konservas la karakteron de verbo, ĉar ili prenas post si aŭ objekton aŭ adjekton. Kaj samtempe ili estas predikatoj de la subkomprenataj frazoj ‘mi kolektas monerojn’, ‘la problemo rilatas al li’, ‘li falas sub la podion’ kaj ‘li kantas en la kunveno’.

Jen ni devas atenti la eksplikon de la infinitivo de la ekzemplo ④. Laŭ PAG(1980, UEA), la infinitivo de ③ estas objekta predikativo, kaj tiu de ④ estas adjekta predikativo. Sed mi ne samopiniis kiel PAG. Mi rigardas

ilin ambaŭ kiel objekta predikativo. Mi povas trovi nenian kialon por tia divido, nek gramatike, nek sence. La infinitivoj ‘fali’ en ③ kaj ‘kanti’ en ④, ambaŭ priskribas komplete la agon(aŭ staton) de la objekto ‘lin’.

Kaj PAG diras, ke ankaŭ ‘nuda’ en la frazo ‘Ŝi dancas nuda’ estas adjekta predikativo. Se ni komparas ĝin kun la subjekta predikativo ‘nuda’ en la frazo ‘Ŝi estas nuda’, la diferenco konsistas nur en la verbo. Ni do povas konkludi, ke ĉe la verbo ‘esti’ ĝi funkcias kiel subjekta predikativo, sed ĉe ‘danci’ kiel adjekta predikativo. Mi demandas, ĉu ni vere povas dividi la verbojn de Esperanto tiel klare en du klasojn? Vere unu el la plej seriozaj disputaĵoj inter esperantologoj estas la subklasifiko de verboj. Ekzemple divido inter transitivaj kaj netransitivaj verboj, aŭ kompletaj kaj nekompletaj verboj. Tio estas malfacila afero, kaj tia estas la realo. Mi do pensas, ke ankoraŭ ne maturiĝis la situacio por starigi laŭ verboj plian adjektan predikativon.

II.4.2.4. Epiteta uzo

Jen infinitivo estas uzata kiel epiteto, konservante verban karakteron kaj predikatan funkcion.

- ① Deziro vivi sen kulpoj estas nobla.
- ② Mi ricevis la anoncon tuj veni al la policejo.
- ③ Nun estas tempo iri al lito.

Ĉi supraj infinitivoj ĉiuj rilatas al la antaŭaj substantivoj, kaj ni vidas, ke ili prenas adjektojn post si. Ili do certe konservas la verban karakteron.

Krome ili estas ankaŭ predikatoj de la subkomprenataj frazoj ‘oni vivas sen kulpoj’, ‘mi venas al la policejo’ kaj ‘oni iras al lito’. Ni devas atenti, ke ne ĉiuj infinitivaj verboj povas esti uzataj kiel epiteto. Tio dependas de la sencaj karakteroj de la verbo kaj de la substantivo.(Vd: pli detalan klarigon en PAG, ĉapitro 141)

II.4.2.5. Adjekta uzo

En du kazoj infinitivo estas uzata kiel adjekto. Jen infinitivo sola funkcias kiel adjekto(kiel en ① kaj ② ĉi-sube), kaj jen kune kun prepozicio, staranta antaŭ ĝi, ĝi funkcias kiel adjekto(kiel en ③ kaj ④).

- ① Mi ĝojas vidi vin.
- ② Li iras renkonti ŝin.
- ③ Mi multe parolis por konvinki lin.
- ④ Li nur ridis al mi anstataŭ respondi.

La infinitivoj en ① kaj ② funkcias kiel adjektoj respektive de kaŭzo kaj celo de la agoj esprimitaj de la predikatoj de la frazoj. Kaj ili devas esti verboj, ĉar ili prenas post si objektojn. Kaj samtempe ili estas predikatoj de la subkomprenataj frazoj ‘mi vidas vin’ kaj ‘li renkontas ŝin’.

Same kiel en la kazo de epiteta uzo, ankaŭ ĉi tie ne ĉiuj infinitivaj verboj povas esti uzataj kiel adjektoj. Laŭ la karaktero de la predikato de la frazo(ĉi supre ‘ĝojas’ kaj ‘iras’) eblas aŭ ne eblas la adjekta uzo de la infinitivo. Ŝajnas, ke tia uzado de la infinitiva adjekto, kiel en la ekzemplo ①, estas ebla nur por la predikatoj kun la senco de emocio, ekzemple

‘ĝoj-’, ‘malĝoj-’, ‘mir-’, ‘trankviliĝ-’, ‘scivol-’, ‘pacien-’, kaj tia uzado kiel en la ekzemplo ② estas ebla nur por tiel nomataj ir-venaj verboj, ekzemple ‘iri’, ‘veni’ kaj ‘kuri’.

Ĉe la ekzemploj ③ kaj ④ la infinitivoj kune kun la prepozicioj ‘por’ kaj ‘anstataŭ’ funkcias kiel adjektoj. Kaj krom tiuj prepozicioj ankoraŭ kelkaj pliaj prepozicioj estas uzataj tiel, nome ‘sen’, ‘krom’ kaj ‘inter’.(Vd: III.4. Specoj de sintagmo: Adjekta sintagmo).

Kaj ne nur post prepozicio, sed ankaŭ post liganto, kiel ‘antaŭ ol’, kies strukturo estas <prepozicio + junkcio>, la infinitivo estas uzata kiel adjekto. (Post la liganto ‘antaŭ ol’ povas veni frazo aŭ infinitivo. Ekz: *Antaŭ ol ekiri, ŝi denove demandis min pri li.*)

II.4.2.6. Predikata uzo

Foje infinitivo mem funkcias kiel predikato. Tio ne estas tiel ofta afero. Kaj ordinare tia infinitivo estas uzata anstataŭ volitivo aŭ kondicionalo, kaj foje anstataŭ indikativa prezenco aŭ indikativa futuro en la esprimoj de admiro, demando kaj hezito.

- ① Ne ĉesi!
- ② Malesperi kaj tamen ne morti!
- ③ Ĉu piki lin per mia halebardo?
- ④ Se kompari lin kun ŝi, li estas multe pli saĝa ol ŝi.
- ⑤ Mi scios, kion diri.

En du manieroj ni povas klarigi tiun uzon de infinitivo. Unue ni povas

klarigi, ke tio estas la predikata uzo de infinitivo, kaj due ke tio estas unu speco de elipso. Kiel ni vidas supre, la infinitivoj estas uzataj sen subjektoj. Kaj tial ni povas diri, ke en tiuj kazoj la subjekto kaj la predikato (povi, devi, voli, ktp) estas eliminataj. Se ni akceptas tion, ni povas diri, ke la supraj ekzemploj devenis de jenaj frazoj, parte eltranĉite.

- ① Vi devas ne ĉesi!
- ② Mi povas(?) malesperi, kaj tamen mi devas ne morti!
- ③ Ĉu mi devas piki lin per mia halebardo?
- ④ Se mi povas kompari lin kun ŝi, li estas multe pli saĝa ol ŝi.
- ⑤ Mi scios, kion mi devos diri.

Mi pensas, ke ambaŭ klarigoj estas eblaj kaj bonaj. Mi devus plu studi por scii, kiu el ili estas pli bona klarigo.

II.5. Deklinacio

‘Deklinacio’ mi nomas la finaĵo-ŝanĝojn de substantivo kaj adjektivo. En ĝi troviĝas la gramatikaj kategorioj de nombro kaj kazo. Ĉe konjugacio la finaĵoj algluiĝas al radikoj, sed ĉe deklinacio la finaĵoj algluiĝas post paralelementa finaĵo {-o} aŭ {-a}, kiuj signas respektive substantivon kaj adjektivon. Kaj kiam la finaĵoj de nombro kaj kazo algluiĝas samtempe, la nombra finaĵo {-j} antaŭas la kasan finaĵon {-n}.

II.5.1. Nombro

En Eperanto ekzistas du specoj de nombro: singularo kaj pluralo. Ĉe pluralo la vorto portas la finaĵon {-j}, sed ĉe singularo ne(t.e. la finaĵo estas nulo). La plurala finaĵo alĝuiĝas kaj al substantivo kaj al adjektivo. Tial la adjektivo, kiu rilatas al plurala substantivo, portas pluralan finaĵon (senkonsidere ĉu ĝi estas epiteto aŭ adjekto). Ni vidu jenajn.

- ① Jen estas bela floro.
- ② Jen estas belaj floroj.
- ③ La floro estas bela.
- ④ La floroj estas belaj.
- ⑤ Mi trovis la florojn belaj.

Ĉe la ekzemploj ① kaj ② la adjektivo kvalifikas substantivon kiel epiteto, kaj ĉe la ③ kaj ④ ĝi estas uzata kiel subjekta predikativo, kaj ĉe la ⑤ ĝi estas uzata kiel objekta predikativo. Ĉiukaze adjektivo same signas nombron akorde al la substantivo, al kiu ĝi rilatas.

II.5.2. Kazo

II.5.2.1. Specoj de kazo

‘Kazo’ ni nomas la funkcion de substantivo, kiun ĝi havas en la frazo. PAG diras, ke Esperanto havas tri kazojn jenajn.

— nominativo
— akuzativo
— prepozitivo

Jen mi demandas, ĉu ni vere bezonas starigi prepozitivan. Oni dividas kazojn laŭ la ekzisto de ĝia gramatika formo — la formo estas ordinare fleksia finaĵo. En Esperanto nominativo kaj akuzativo havas klare distingeblajn formojn, t.e. {-n} kaj $\emptyset$ (=nulo). Sed ĉe tiel nomata prepozitivo, malsame ol ĉe la nominativo kaj akuzativo, la substantivo mem forme ne fleksias, sed ĝi havas prepozicion antaŭ si, kiu estas aparta vorto. Tial ni ne povas trovi ian forman bazon por agnoski prepozitivan.

Ni nomas iun vorton nominativo, ĉar ĝi funkcias kiel subjekto(aŭ subjekta predikativo), kaj iun vorton akuzativo, ĉar ĝi funkcias kiel objekto. Tio estas la bazo de la dividado kaj nomado de kazoj. Se ni do uzas la nomon ‘prepozitivo’, tio signifas, ke ni agnoskas la frazelementon ‘prepoziciaĵo’. Sed ĉu vere indus la ekzisto de la ‘prepozicia frazelemento’? Ekzistas multaj vortoj, kiuj venas post prepozicio, kaj en la frazo ili funkcias kiel diversaj frazelementoj kun diversaj signifoj. Se ni traktas tiujn ĉiujn kaŭzojn same kaj starigos unu frazelementon por ili ĉiuj, tio ne estas logika. Kaj tial mi ne starigas tiel nomatan prepozitivan.

Kaj ĉe pronomoj ni starigas ‘genitivon’ malsame ol ĉe substantivoj, kaj ni konas tri-kazan sistemon por pronomoj, kiel jene.

pronomo \ kazo	nominativo	akuzativo	genitivo
persona pronomo	mi	min	mia
montra pronomo	tiu	tiun	ties
rilata pronomo	kiu	kiun	kies
demanda pronomo	kiu	kiun	kies
nedifinita pronomo	iu	iun	ies
totala pronomo	ĉiu	ĉiun	ĉies
nea pronomo	neniu	neniun	nenies

Kiam substantivo prenas akuzativon, ankaŭ la adjektivo, kiu kvalifikas (aŭ determinas) la substantivon, prenas akuzativon. Ni vidu jenajn ekzemplojn.

- ① Mi havas belan floron.
- ② Mi havas belajn florojn.

La adjektivoj ŝanĝas siajn finaĵojn laŭ la nombro kaj kazo de la substantivo, kiun ili kvalifikas(aŭ determinas). Tio estas unu el la apartaj trajtoj de Esperanto.

II.5.2.2. Nominativo

Nominativa finaĵo de Esperanto estas $\emptyset$ (nulo). Tio estas, ke neniun alian finaĵon prenas substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj post sia parolelementa finaĵo. La esenca funkcio de nominativo estas fari iun vorton subjekto. Sed

ankaŭ predikativo aperas en la formo de nominativo, ĉar en Esperanto ne ekzistas ‘predikativa kazo’. Ni vidu jenon.

- ① La libro estas interesa.
- ② La interesa libro kuŝas sur la tablo.
- ③ Mi invitis la knabon.
- ④ Ĝi estas libro.
- ⑤ Li estas diligenta.
- ⑥ Mi trovis ĝin utila.

Ĉe la ekzemplo ① la substantivo prenas neniun alian finaĵon post sia parolelementa finaĵo, kaj tial ĝi estas nominativo, kaj funkcias kiel subjekto. La adjektivo en ② ne prenas alian finaĵon post la parolelementa finaĵo, kaj tial ĝi estas nominativo, kaj kvalifikas nominativan substantivon. Kaj ankaŭ la pronomo en ③ prenas neniun finaĵon, kaj tial ĝi estas nominativo kaj estas uzata kiel subjekto.

La predikativoj en la ekzemploj ④, ⑤, ⑥ (libro, diligenta, utila) aperas en la formo de nominativo, t.e. ke ili prenas neniun alian finaĵon post la parolelementa finaĵo. Ĉi tie ni devas atenti, ke ankaŭ la objekta predikativo ‘utila’ en ⑥ aperas en la formo de nominativo. Predikativoj ĉiam aperas en la formo de nominativo senkonsidere ĉu ĝi estas subjekta predikativo aŭ la objekta.

II .5.2.3. Akuzativo

La akuzativa finaĵo de Esperanto estas {-n}. Se la finaĵo {-n} aldoniĝas

al substantivo, pronomo aŭ adjektivo, tiuj fariĝas akuzativo kaj funkcias kiel objekto.

La akuzativon de Esperanto oni tradukas kiel ‘objekta kazo’ per korea lingvo. Sed la termino ‘objekta kazo’ ne estas tiel taŭga, ĉar efektive krom ĝia ĉefa funkcio, kiu estas montri objekton, la ‘akuzativo’ havas kelkajn aliajn funkciojn. Sed tamen ne estas facile trovi en la korea taŭgan terminon por tiuj ĉiuj funkcioj. Pro tio laŭ ĝia esenca funkcio, mi nomas ĝin ‘objekta kazo’. Kaj la akuzativo havas diversajn funkciojn kiel jene.

① monro de la objekto de la predikato

Mi legis interesan libron.

② monro de la direkto

— akuzativo de propra nomo de loko

Li iris Seulon.

— akuzativo de la substantivo post prepozicio de loko

Mi iris en la ĉambron.

— kiam akuzativa finaĵo aldoniĝas rekte al derivita adverbo de loko

Kien vi iras? — Mi iras hejmen.

③ monro de mezuro

daŭro: Mi dormis 10 horojn.

tempopunkto: La 9-an horon matene mi vekigis.

pezo: Mi pezas 60 kilogramojn.

alto: La monto estas 100 metrojn alta.

longo: La rivero estas 4 kilometrojn longa.

distanco: Li estas 3 paŝojn de la ŝtuparo.

profundo: La putro estas 10 metrojn profunda.

larĝo: La strato estas 100 metrojn larĝa.

kosto: La libro kostas tri mil spesojn.

④ monstro de rimedo

Li metis la glason supron malsupren.

Oni pendigis la krimulon kapon malsupren.

⑤ uziĝo anstataŭ la prepozicio ‘je’

Anstataŭ la prepozicio ‘je’ oni faras la substantivon akuzativo.

Tiu ĉi uzo de akuzativo estas nur alia klarigmaniero de ③, ĉar la uzo de ③ estas sama kiel la uzo de prepozicio ‘je’. Sed unu sola diferenco estas, ke la prepozicio ‘je’ povas anstataŭi ĉiujn prepoziciojn teorie. Kaj tial oni povas uzi la prepozicion ‘je’ ankaŭ en aliaj kaŭzoj krom en la kazo de ③. Sekve ankaŭ en aliaj kazoj ni povas fari la substantivon akuzativo anstataŭ uzi la prepozicion ‘je’. Sed tio ne estas tiel bona uzo kaj efektive oni ne tiel ofte uzas tian akuzativon.

Ekzemplo: Li parolas Esperanton.(en Esperanto)

Kiel ni vidas supre, la uzo de Esperanta ‘akuzativo’ tre similas al tiu de korea postpozicio {-eul/-leul}({-을/-를}). Ankaŭ en korea lingvo la ĉefa funkcio de la postpozicio {-eul/-leul}(nomata ‘objektkaza postpozicio’) estas montri objekton. Sed krom tio ĝi estas uzata ankaŭ por montri direkton kaj mezuri daŭron aŭ distancon.

Ĉi tie ni devas pripensi, kiun ni devas uzi inter nominativo kaj akuzativo post la prepozicio ‘po’(Vd: II.2.2.7. Prepozicioj). Ni povas uzi ambaŭ. Ni vidu jenajn.

- ① La patrino disdonis al la infanoj po 3 pomoj.
- ② La patrino disdonis al la infanoj pomojn po 3
- ③ La patrino disdonis pomojn al la infanoj po 3.

Gramatike ĉiuj ekzemploj estas bonaj. En ① substantivo <pomoj> aperas en nominativo post <po>. Tio estas ebla, ĉar principe prepozicio postulas post si nominativon. Sed en ② kaj ③ <pomojn> aperas en akuzativo. Tio ankaŭ estas tute natura, ĉar certe ĝi estas la objekto de predikato <disdonis>. En tiu ĉi kazo la prepozicio <po> influas nur la numeralon post si.

Per tio ni povas scii, ke ankaŭ en la frazo ① la prepozicio <po> regas nur la numeralon, sed ne la substantivon <pomoj>. La substantivo <pomoj> do devas aperi en akuzativo, ĉar ĝi, kvankam staras post prepozicio, havas nenian rilaton kun la prepozicio. Sed tamen Zamenhof ne diris, ke tio estas erara, eĉ se oni uzas nominativon ankaŭ en tiu kaŭzo. Tial mi pensas, ke ambaŭ esprimoj estas eblaj.

II .5.2.4. Genitivo

Ĉe ordinaraj substantivoj ne ekzistas genitivo, kaj nur en pronomoj ĝi ekzistas. Por esprimi genitivan ĉe ordinaraj substantivoj oni uzas la prepozicion ‘de’. (ekz: *la domo de mia amiko*)

La genitivo de personaj pronomoj estas esprimita per adjektiva finaĵo {-a}, kaj tiu de tabelaj pronomoj estas esprimita per {-es}.

La genitiva finaĵo de personaj pronomoj estas sama kiel tiu de adjektivoj, kaj tial ĝi deklinacias (ŝanĝas la finaĵojn) same kiel ordinaraj adjektivoj. Ĝi

prenas la finaĵojn de akuzativo kaj pluralo. Sed la genitivoj de tabelaj pronomoj ne prenas tiujn finaĵojn.



III.1. Analizo de frazelementoj

III.1.1. Frazelementoj kaj parolelementoj

Kiel mi menciis antaŭe, parolelementoj estas dividitaj laŭ formo, funkcio kaj senco. Mi dividis vortojn de Esperanto en naŭ parolelementojn. Kaj la frazelementoj, pri kiuj ni nun studos, estas dividitaj laŭ la rolo en la frazo, kaj tiel ili estas nomataj.

III.1.2. Diversaj frazelementoj

La frazelementoj de Esperanto estas jenaj.

- subjekto
- predikato
- predikativo
- objekto
- adjekto
- epiteto
- liganto
- memstaranto

III.1.2.1. Subjekto

Subjekto ni nomas la vorton, funkciantan kiel la aganto de la ago(aŭ stato) de la predikato de la frazo. Kaj ĝi ne estas sama kiel la parolanto de la frazo. Ni devas ne konfuzi ilin. En ĉiuj ekzemplaj frazoj ĉi-subaj la parolantoj estas ‘mi’. Sed la subjektoj estas malsamaj. Ili estas respektive ‘mi mem’ ĉe ①, ‘alparolato’ ĉe ② kaj ‘priparolato’ ĉe ③.

① Mi lernas Esperanton.

② Vi lernas Esperanton.

③ Li lernas Esperanton.

Ni atente devas distingi inter la subjekto kaj la parolanto de la frazo, ĉar ni devas bone konscii, ke en volitiva frazo la volo, esprimita per la predikato, estas tiu de la parolanto, ne tiu de la subjekto. Ĉe ĉi-subaj volitivaj frazoj la volo estas de la parolanto, ne de la subjekto(nur ĉe ① la parolanto kaj la subjekto estas samaj).

① Mi lernu Esperanton. (Mi volas, ke mi lernu Esperanton.)

② (Vi) lernu Esperanton. (Mi volas, ke vi lernu Esperanton.)

③ Li lernu Esperanton. (Mi volas, ke li lernu Esperanton.)

Kiel subjekto povas esti uzataj substantivo(inkluzive de substantiva propozicio), pronomo, infinitivo kaj citaĵo. Inter ili la kazoj de infinitivo kaj substantiva propozicio estas aparte atentindaj. En Esperanto, ĉe ambaŭ kazoj la predikativo ne aperas en la formo de adjektivo, sed en la formo de

adverbo. Ni vidu.

- ① Mensogi estas malbone.
- ② Estas interese, ke li revenis.
- ③ Estas ne antaŭvideble, ĉu li revenos aŭ ne.

Ĉe la ekzemplo ① la subjekto estas infinitivo, kaj ĉe ② kaj ③ ĝi estas substantiva propozicio. En tiuj kazoj la predikativo estas ne adjektivo, sed adverbo. Kompreneble kiam substantivo aŭ infinitivo estas uzata kiel predikativo, tiam ili ne aperas en la formo de adverbo, kiel jene.

- ① Vidi estas kredi.
- ② Estas fakto, ke li revenis.
- ③ Estas malfacila demando, ĉu li revenos aŭ ne.

III.1.2.2. Predikato

Predikato esprimas la ‘agon’ aŭ ‘staton’ de la subjekto de la frazo, aŭ ĝi esprimas ‘al kio egalas’ la subjekto. Ĝi estas esprimata ĉefe per verbo. Ni vidu jenon.

- ① Li manĝas panon.
- ② Li sidas silente.
- ③ Li estas bona.
- ④ Li estas studento.

En la supra frazo ① la verbo esprimas la agon(de manĝo) kaj en la frazoj ② kaj ③ la verboj esprimas la staton(de sido kaj de bono) de subjekto, kaj en ④ ĝi esprimas la egalecon inter subjekto kaj predikativo.

La verboj en la frazoj ① kaj ② komplete priskribas per si mem la agon. Sed en ③ kaj ④ la verbo ‘esti’ ne povas per si mem kompletigi la priskribon. Se ne sekvas predikativo post la verbo, la frazoj ne kompletigas. Ni do bezonas predikativon.

III.1.2.3. Predikativo

Predikativo ni nomas la vorton, kiu perfektigas la predikaton, en la kazo, kiam tio ne kompletigas la priskribon. Ekzistas du specoj de predikativo, t.e. la subjekta predikativo, kiu kompletigas la priskribon pri subjekto, kaj la objekta predikativo, kiu kompletigas la priskribon pri objekto. Ni vidu.

- ① La arbaro ŝajnas ploranta pri la printempo.
- ② Ŝi restas ankoraŭ kolera.
- ③ Mi trovis ĝin bona.
- ④ Mi vidis lin kanti en la ĉambro.

En la frazo ① inter ĉi-supraj ekzemploj, la verbo ‘ŝajni’ estas nekompleta netransitiva verbo, kiu ĉiam bezonas predikativon. Al tiu kategorio apartenas ‘esti’, ‘fariĝi’ ktp. Kaj la verbo ‘resti’ en la frazo ② aŭ bezonas predikativon aŭ ne. Ekzemple en la frazo “li restis en Seulo dum 3 tagoj” ĝi ne bezonas predikativon, funkciante kiel kompleta netransitiva verbo, malsame ol en la frazo ②.

En ③ kaj ④ la predikativoj ‘bona’ kaj ‘kanti’ estas objektaj predikativoj, kiuj kompletigas la priskribojn de stato aŭ ago de la objektoj ‘ĝin’ kaj ‘lin’. Kaj cetere kiam venas verbo, kiu ne nepre bezonas predikativon, laŭbezone ni povas pli multe kompletigi la agon aŭ staton de subjekto aŭ objekto. Ankaŭ tiuj frazelementoj devas esti konsiderataj kiel predikativoj.

- ① Ŝi dancas nuda.
- ② Li mortis mizerulo.
- ③ Oni invitis lin kanti en la malfermo.

La verboj en ĉi-supraj ekzemplaj frazoj tute ne havas problemon, eĉ se ili ne havas predikativojn. Laŭ sia speciala intenco la parolanto volas esprimi la priskribojn pli detale per kompletigaj vortoj, kaj li aldonas la vortojn ‘nuda’, ‘mizerulo’ kaj ‘kanti en la malfermo’. Ĉe ① kaj ② la vortoj kompletige priskribas la staton de la subjekto, kaj ĉe ③ ĝi kompletige priskribas la agon de la objekto(fakte la farotan aferon de la objekto). (Vd: II.4.2. Infinitivo)

Ĉi tie ni devas konscii, ke gramatiko ekzistas por klarigi realan fenomenon de lingvo, sed neniam por ebligi iun lingvaĵon. Kaj tial ni neniam devas aserti, ke ĉiuj verboj povas esti uzataj same kiel supraj ekzemploj, dirante ke ekzistas tia kaj ĉi tia gramatiko. Eĉ se ekzistas tia gramatikaĵo, ne eblas diri ekzemple ‘[?]li parolas kolera’, ‘[?]li mortis studento’, ‘[?]mi batis lin kanti en la malfermo’ ktp. Laŭ la karaktero de verbo jen eblas, jen ne eblas. Pri tio mi devas plu studi.

Rilate al predikativo, ni devas pripensi ankaŭ jenan aferon. Kiu esprimo esatas pli bona inter jenaj ① kaj ②.

- ① Mi estas malvarma.
- ② Mi sentas min malvarma.
- ③ La akvo estas malvarma.

Unuavide ambaŭ esprimoj ŝajnas bonaj, sed la esprimo ② estas pli bona. Ĉar kiel ni vidas en ③, la frazo ① signifas, ke la subjekto mem estas malvarma. Tial ni devas esprimi kiel ②, ne kiel ①, kiam ni sentas malvarmecon.

Sed jenaj esprimoj ambaŭ ŝajnas bonaj.

- ④ Mi estas malsata.
- ⑤ Mi sentas min malsata.

Per tio ni scias, ke laŭ la karaktero de la adjektivo uzata kiel predikativo, ni povas aŭ ne esprimi kiel ④.

III.1.2.4. Objekto

Objekto ni nomas la vorton, kiu estas la objekto de la ago esprimita de la predikato (ĉi tie la predikato estas transitiva verbo) de la frazo. Nome, en la esprimo ‘li lernas Esperanton’, la objekto de la frazo estas ‘Esperanto’, kiu estas la objekto de la ago ‘lerni’.

Iuj esperantologoj dividas objekton en du specojn, nome rekta objekto kaj malrekta objekto. Sed mi ne faras tiel. Se ni dividas ĝin en rektan kaj malrektan objektojn, tio signifas, ke ni havas premison, ke iuj verboj bezonas malrektan objekton. Sed en Esperanto ne ekzistas ia certa bazo

klare distingi, kiu verbo postulas malrekta objekton, kaj kiu vorto estas malrekta objekto. Ni vidu.

- ① Li donis al mi la libron.
- ② Li revas pri feliĉo.
- ③ Li parolas pri Esperanto.
- ④ Li ridas pri ŝia naiveco.

Iuj esperantologoj diras, ke la prepoziciaj sintagmoj en la frazoj ① kaj ② estas malrektaj objektoj. Sed tio havas problemon. La verbo ‘donis’ en la frazo ① estas transitiva verbo, kaj ĝi estas ordinarie uzata en la formo ‘doni ion al iu’. Kaj foje la parto ‘ion’ aŭ ‘al iu’ estas neesprimita. Sed principe ĝi estas verbo, kiu postulas ‘donatan objekton’ kaj ‘la homon’, al kiu la objekto estas donata. Mi pensas, ke ĝuste tio estas la kialo de la starigo de malrekta objekto.

Sed la verbo ‘revas’ en ② estas netransitiva verbo, kaj ĝi esence ne bezonas objekton. En tiu kazo mi ne scias, kio estas la bazo rigardi la sintagmon ‘pri feliĉo’ kiel malrekta objekto. Se ni ĝin traktas kiel malrekta objekto, ankaŭ la prepoziciaj sintagmoj de ③ kaj ④ povas esti traktataj kiel malrektaj objektoj. Se estas tiel, estus malfacile distingi inter transitiva verbo kaj netransitiva verbo, kaj ankaŭ malfacile estus distingi objekton de la frazo.

Mi do opinias, ke ĉiuj prepoziciaj sintagmoj en tiu kazo estas adjektoj.

III.1.2.5. Adjekto

Adjekto estas vortoj, kiuj montras, en kia cirkonstanco(stato, maniero, kaŭzo, celo, rezulto, kondiĉo, direkto ktp) okazas la ago(aŭ la stato) de la subjekto de la frazo. Ĝi aperas ordinare en la formo de adverbo aŭ adverba sintagmo. Ni vidu.

- ① Li kuras rapide.
- ② Li dormis dek horojn.
- ③ Li venis renkonti ŝin.
- ④ Li sidas sur la seĝo.
- ⑤ Mi donis ĝin al li.
- ⑥ Li sekvis ŝin, tirite de ŝia ĉarmo.

La adverbo ‘rapide’ en ① esprimas la manieron de la predikato ‘kuras’. Kaj en ② la sintagmo ‘dek horojn’ esprimas tempodaŭron de la predikato, kaj en ③ la infinitivo esprimas la celon de la predikato. En ④ kaj ⑤ la prepoziciaj sintagmoj esprimas respektive la lokon kaj la direkton de la predikato, kaj en ⑥ la participo esprimas ĝian kaŭzon.

III.1.2.6. Eпитeto

Eпитeto estas la vorto, kiu rilatas al aliaj frazelementoj krom predikato. Kiel epitetoj estas uzataj adjektivoj, kiuj kvalifikas(aŭ determinas) substantivojn, kaj adverboj, kiuj kvalifikas(aŭ determinas) adjektivojn aŭ aliajn adverbojn, kaj substantivoj, kiuj eksplikas aliajn substantivojn. Ni devas bone distingi inter unuj adverboj uzataj kiel adjektoj, kaj aliaj

adverboj uzataj kiel epitetoj. La adverbo, uzata kiel adjekto, montras en kiu cirkonstanco okazas la ago de la subjekto. Alivorte ĝi kvalifikas predikaton. Kaj la adverbo, uzata kiel epiteto, kvalifikas(aŭ determinas) aliajn frazelementojn krom predikato. Ni vidu.

- ① Ĝi estas bela floro.
- ② Mi ricevis anoncon veni al la kunveno.
- ③ Ŝi estas la filino de mia amiko.
- ④ Ĝi estas tre bela.
- ⑤ Li kantas tre bele.
- ⑥ La rivero estas tri mil metrojn longa.
- ⑦ Ĝi estas Esperanto, la internacia lingvo.

En la frazo ① la vorto ‘bela’ funkcias kiel epiteto, kiu kvalifikas substantivan predikativon. Kaj ankaŭ en ② la infinitivo funkcias kiel epiteto, kiu determinas substantivan objekton. En ③ la prepozicia sintagmo estas epiteto, determinanta substantivan predikativon, kaj en ④ la adverbo ‘tre’ estas epiteto, kvalifikanta adjektivan predikativon ‘bela’. Kaj en ⑤ la adverbo ‘tre’ funkcias kiel epiteto, kiu kvalifikas la adjekton ‘bone’, kaj en ⑥ la akuzativa substantiva sintagmo ‘tri mil metrojn’ determinas adjektivan predikativon ‘longa’. Kaj interne de la epiteto ‘tri mil metrojn’, la numeralo ‘tri mil’ funkcias kiel epiteto, kiu determinas la substantivon ‘metrojn’.

Kaj la substantiva sintagmo ‘la internacia lingvo’ en ⑦ estas la vorto, kiun la parolanto uzas por alinomi la antaŭan substantivon ‘Esperanto’. Ĝi estas vere tute sama vorto kiel la antaŭa. Ni povas ekspliki tion jene:

Esperanto = la internacia lingvo. En tiu kazo mi opinias, ke la posta vorto estas la epiteto, kiu eksplikas la antaŭan.

III.1.2.7. Liganto

Liganto estas la frazelemento, kiu ligas vorton kun vorto, sitagmon kun sintagmo, aŭ propozicion kun propozicio. Ĝi aperas ĉefe en la formo de junkcio. Sed ofte prepozicioj, adverboj, aŭ rilativoj estas uzataj kiel ligantoj. Ni vidu.

- ① Li kaj lia amiko vizitis min.
- ② Vi povas trovi ĝin sur la tablo, aŭ sur la lito.
- ③ Mi vizitis lin, kaj mi konfesis ĉion al li.
- ④ Mi ne scias, ke li amas ŝin.
- ⑤ Ĝi estas la libro, kiun mi aĉetis en lasta jaro.
- ⑥ Mi ne scias, ĉu li venos aŭ ne.
- ⑦ Kiam li vizitis ŝin, li eksciis la veron.
- ⑧ Apenaŭ mi vidis lin, li forkuris.
- ⑨ Tion finu, ĝis mi revenos.
- ⑩ Li estas tiel diligenta, kiel mi.
- ⑪ Li agas, kvazaŭ li estus heroo.

La junkcio en ① estas uzata kiel liganto, kiu ligas vorton kun vorto, kaj tiu en ② ligas sintagmojn. Kaj depost la frazo ③ la junkcioj estas uzataj kiel ligantoj, kiuj ligas propoziciojn. De ① ĝis ③ la junkcioj estas uzataj kiel 세계에스페란토청년대회j, kaj depost ④ ili estas uzataj kiel

subligantoj.

La junkcio ‘ke’ de ④ estas liganto, kiu kondukas eksplikan subpropozicion, kaj la rilativa pronomo de ⑤ funkcias kiel liganto, kiu kondukas rilatan propozicion. Kaj la demanda adverbo ‘ĉu’ de la frazo ⑥ kaj la rilativa adverbo ‘kiam’ de ⑦ estas uzataj kiel subligantoj, kiuj kondukas respektive demandan subpropozicion kaj la tempan.

Kaj la subliganto ‘apenaŭ’ de ⑧, kiu havas la signifon ‘tuj, post kiam’ aŭ ‘preskaŭ samtempe, kiam’, estas origina adverbo, kaj la subliganto ‘ĝis’ de ⑨, kiu havas la signifon ‘ĝis la tempo, kiam’, estas origine prepozicio. Kaj ‘kiel’ de ⑩ kaj ‘kvazaŭ’ de ⑪ estas uzataj kiel ligantoj, kondukantaj komparan subpropozicion.

Kiel ni vidas supre, la ligantoj estas ĉefe junkcioj, sed ankaŭ adverboj, prepozicioj kaj rilativoj estas ofte uzataj kiel ligantoj.

III.1.2.8. Memstaranto

Memstaranto havas rilaton kun neniuj frazelementoj, kaj staras tute sendepende. Al ĝi apartenas vokaj vortoj, emociesprimaj vortoj, priparolataĵoj kaj epitetoj rilatantaj la tutan frazon.

- ① Karlo, kie vi estas? (=Kie vi estas, Karlo?)
- ② Ho, mi forgesis tion.
- ③ Internacia lingvo, ĝi estis delonga deziro de la tuta homaro.
- ④ Feliĉe, li revenis viva.

La propra nomo en ① kaj la interjekcio en ② estas memstarantoj uzataj

respektive kiel voka vorto kaj emociexpressa vorto. Kaj en ③ la adverbo ‘feliĉe’ estas memstaranto, kiu rilatas la tutan frazon.

En kazoj kiel ③ foje estas malfacile distingi ĝin(memstaranto) disde adjektoj kaj epitetoj. Sed se ni bone scias la fakton, ke memstaranto rilatas al neniuj frazelementoj en la frazo(t.e. ĝi ne kvalifikas alian frazelementon, nek klarigas iun cirkonstancan de la ago esprimita de la predikato), ni povas distingi ilin.

III.2. Studindaj problemoj

III.2.1. Ĉu numeralo povas funkcii kiel subjekto, objekto aŭ predikativo?

En korea lingvo numeralo povas fariĝi subjekto. Sed ni ne povas facile diri, ke ankaŭ en Esperanto numeralo fariĝas subjekto. Ĉu ja eblas jenaj esprimoj? Ekzemple, “Kvin venis.”, “Du restas.”, “Mi manĝis tri.”, “Ili estas dek.” Se tiuj esprimoj, kvankam iom strangaj, estas permesataj, tio ŝajnas ebla pro la interkonsento, ke ili estas la mallongigoj de jenaj esprimoj: “Kvin homoj venis.”, “Du homoj/objektoj restas.”, “Mi manĝis tri -ojn.”, “Ili estas dekopo/dekope.” La esprimo “du restas” povas esti uzata ĉe kalkulado ĉi tiel: “ $20 \div 3 = 6...2$ ” (dudek dividite per tri faras ses kaj restas du).

Tial ni devas pensi, ke la numeralo de Esperanto sola ne povas esti uzata kiel subjekto, objekto aŭ predikativo.

III.2.2. Adverbo kiel subjekta predikativo

Ĝi estas unu el la specialaj gramatikaĵoj de Esperanto. Por subjekta predikativo estas uzata ordinare substantivo, adjektivo aŭ infinitivo. Sed ĉe jenaj kazoj adverbo estas uzata kiel predikativo.

Unue, kiel la predikativo de sensubjekta frazo.

(ekz: *Hodiaŭ estas varme.*)

Due, kiam la subjekto estas ne vorto, sed propozicio.

(ekz: *Estas interese, ke li aperis en la kunsido.*)

Trie, kiam la subjekto estas infinitivo.


(ekz: *Mensogi estas malbone.*)

Mi volas iom esplori la kazojn duan kaj trian. La propozicioj kaj la infinitivoj uzitaj kiel subjekto en tiuj kazoj, kompreneble ne estas predikato de la frazo, sed momente funkcias kiel substantivo. Pro tio ni nomas tiun propozicion substantiva propozicio, kaj ni diras, ke tiu infinitivo estas uzita kiel substantivo. Se estas tiel, ankaŭ en tiuj kazoj ni devus uzi adjektivon por la predikativo, same kiel ĉe la kazoj de ordinara substantivaj subjektoj.

Krom tio jen estas ankaŭ alia kialo. Kiam la objekto de la frazo estas infinitivo aŭ propozicio, oni ordinare uzas adjektivon kiel predikativo (ekz: *Mi trovas bona iri kun li.*; *Mi trovas bona, ke li estas kun ŝi.*). Tio teorie ne akordiĝas kun la kazo de la subjekta predikativo. Mi ne komprenas, kial oni uzas adverbos nur ĉe la kazo de subjekta predikativo, dum oni uzas adjektivon ĉe la kazo de objekta predikativo. Sed tamen preskaŭ ne eblas tion ŝanĝi(aŭ korekti), ĉar jam pli ol 100 jarojn oni uzadas tiel.

III.3. Specoj de frazo

Oni povas dividi frazojn en diversaj manieroj. Ĉi tie mi dividas jene.



III.3.1. Simplaj frazoj

‘Simpla frazo’ ni nomas la frazon, kiu havas la rilaton de ‘subjekto-predikato’ nur unu fojon. Ni vidu.

① Li kuras rapide.

- ② Li ne kuras rapide.
- ③ Ĉu li kuras rapide?
- ④ (Vi) kuru rapide.
- ⑤ Estas varme.

En supraj ekzemploj ekzistas nur unufoja rilato de ‘subjekto-predikato’. Ili estas simplaj frazoj (Fakte ne ekzistas subjekto en ⑤). Kaj ni detale studos pli pri la frazoj poste, sed jen ni povas diri, ke la ekzemplo ① estas frazo subjekta-indikativa-priskriba-pozitiva, kaj ② estas frazo subjekta-indikativa-priskriba-negativa, kaj ③ estas frazo subjekta-indikativa-demanda-pozitiva, kaj ④ estas frazo subjekta-volitiva-priskriba-pozitiva, kaj ⑤ estas frazo sensubjekta-indikativa-priskriba-pozitiva.

Ni povas ilin ŝanĝi al aliaj formoj. Ekzemple ni povas ŝanĝi la frazon ④ al la frazo subjekta-volitiva-priskriba-negativa: “(Vi) ne kuru rapide.” Kaj la frazo ⑤ povas esti ŝanĝita al la frazo sensubjekta-indikativa-demanda-negativa: “Ĉu ne estas varme?”

III.3.2. Oblaj frazoj

Se du simplaj frazoj estas kunligitaj al unu frazo pere de konjunkcio (kaj, sed, aŭ, ktp), ĝi fariĝas obla frazo. Tiukaze la ligitajn simplajn frazojn ni nomas ‘kunordigitaj propozicioj’. Jen vidu.

- ① Li marŝis, sed ŝi kuris.
- ② Ĉu li ploris, kaj ŝi ridis?
- ③ Venu frue morgaŭ matene, aŭ vi ne povos vidi lin.

En ĉiu frazo de supraj ekzemploj la rilato de ‘subjekto-predikato’ aperas du fojojn, kaj ili estas kunligitaj pere de konjunkcioj. La du kunligitaj simplaj frazoj havas egalan gramatikan funkcion (alivorte neniu el ili rolas kiel frazelemento de la alia), kaj tial la kunligita frazo estas obla frazo. La frazo ① estas duoblo de la frazo subjekta-indikativa-priskriba-pozitiva, kaj la frazo ② estas duoblo de la frazo subjekta-indikativa-demanda-pozitiva. Kaj la frazo ③ estas kunligita per la frazo subjekta-volitiva-priskriba-pozitiva kaj la frazo subjekta-indikativa-priskriba-negativa. La kunligataj simplaj frazoj povas esti diversaj frazoj. Ili povas esti ali-specaj.

Ni tamen devas atenti, ĉu jenajn frazojn ni povas rigardi kiel oblaj frazoj aŭ ne.

- ① Li kaj lia amiko vizitis min.
- ② Li senĉese ploris kaj ridis,
- ③ Ŝi vidis lin kaj lian amikon.
- ④ Diru tion aŭ al la patro, aŭ al la patrino.

Ni ne povas facile diri, ke la supraj frazoj havas unu-fojan rilaton de ‘subjekto-predikato’, nek ke ili havas du-fojajn rilatojn.

Ni povas diri, ke la frazo ① estas kunligita per jenaj du frazoj: ‘Li vizitis min.’ kaj ‘Lia amiko vizitis min.’ Sed efektive ĝi havas nur la kunligitan subjekton el du substantivoj. Forme ĝi havas la rilaton de ‘du subjektoj plus unu predikato’. Sed male la frazo ② havas la rilaton de ‘unu subjekto plus du predikatoj’, kaj la frazoj ③ kaj ④ havas respektive la rilaton de ‘unu subjekto plus du objektoj’, kaj ‘unu subjekto plus du adjektoj’.

Iusence ni povas diri, ke ili estas kunligitaj per du simplaj frazoj, do oblaj frazoj. Sed ni rigardas ilin nur kiel simplaj frazoj, ĉar nia kriterio de la frazo-specoj estas la nombro de la rilato de ‘subjekto-predikato’.

III.3.3. Kompleksaj frazoj

Kompleksa frazo ni nomas la frazon ligitan per subjunkcioj(ke, ĉar, se, kvankam, rilativoj, demandaj vortoj, ktp). La ĉefa frazo el la ligitaj frazoj estas nomata ‘ĉefpropozicio’, kaj la vica estas nomata ‘subpropozicio’. La subpropozicio rolas kiel unu el la frazelementoj de la ĉefpropozicio, kaj ĝi nomiĝas laŭ la rolo.

Subpropozicioj estas dividitaj kiel jene laŭ ilia rolo de frazelemento en la ĉefpropozicio.

- subjekta subpropozicio
- objekta subpropozicio
- predikativa subpropozicio
- epiteta subpropozicio
- adjekta subpropozicio

La klasifiko estas laŭ la funkcioj de la subpropozicioj, kiujn ili ludas en la ĉefpropozicio. Kaj krom tio oni povas klasifiki ilin laŭ iliaj propraj karakteroj kiel jene.

— eksplika subpropozicio: ‘ke’ estas uzata kiel subjunkcio
 supoza subpropozicio: ‘se’ estas uzata kiel subjunkcio
 kompara subpropozicio: ‘kiel, kia, ol, ktp’ estas uzataj kiel subjunkcioj
 konceda subpropozicio: ‘kvankam, ktp’ estas uzataj kiel subjunkcioj
 kaŭza subpropozicio: ‘ĉar’ estas uzata kiel subjunkcio
 rilata subpropozicio: rilativoj estas uzataj kiel subjunkcioj
 demanda subpropozicio: demandaj vortoj estas uzataj kiel subjunkcioj
 — implikita subpropozicio: ‘ke’ estas uzata kiel subjunkcio

Fakte ĝi estas klasifiko laŭ sencoj, kaj tial ni povas dividi ilin alimaniere laŭ aliaj vidpunktoj. Mi ne klarigas ilin ĉi tie, ĉar ilin mi klarigos ĉe la loko, kie mi klarigos pri la laŭ-funkcia klasifiko de subpropozicioj. Sed ĉi tie nur la implikitan subpropozicion mi klarigas.

III.3.3.1. Implikita subpropozicio

Se eksplika substantiva subpropozicio estas interplektita kun demanda ĉefpropozicio aŭ alia demanda subpropozicio, tion ni nomas implikita subpropozicio. T.e. la demanda vorto de demanda frazo rolas ankaŭ kiel unu frazelemento de la subpropozicio. Ni vidu.

- ① Kiel vi deziras, ke mi agu?
- ② Mi ne scias kion vi volas, ke mi faru
- ③ Kiun vi deziras, ke mi liberigu al vi?

En la ekzemplo ① la ‘kiel’, estante demanda vorto de demanda ĉefpropozicio, rolas ankaŭ kiel adjekto de eksplika subpropozicio. En ② la ‘kion’ estas demanda vorto, uzata kiel liganto(ĝi ligas la propozicion ‘kion

vi volas’ al la antaŭa ĉefpropozicio), kaj samtempe ĝi estas uzata ankaŭ kiel la objekto de la eksplika subpropozicio. Ankaŭ la ‘kiun’ en ③ funkcias ne nur kiel demanda vorto de la ĉefpropozicio, sed ankaŭ kiel la objekto de la subpropozicio. Tiujn subpropoziciojn ni nomas implikita subpropozicio. (Pri detala klarigo de la implikita subpropozicio vidu PAG(1980, UEA: p.305))

III.3.3.2. Subjekta subpropozicio

Subjekta subpropozicio estas la subpropozicio, kiu funkcias kiel subjekto de la ĉefpropozicio. Ni vidu.

- ① Ĉu tio estas vera, ke li amas ŝin?
- ② Estas nekredeble, ke li konfesis tion.
- ③ Estas duba, ĉu li sciis tion.
- ④ Ne estas certe, por kio li donis ĝin al vi.

En la ekzempla frazo ① la ke-subpropozicio estas sama kiel la subjekto de la ĉefpropozicio ‘tio’ (ĝin ni nomas ‘formala subjekto’), kaj ĝi eksplikas ‘tion’. Tial ni nomas ĝin ‘subjekta subpropozicio’. Kaj en tiu kazo formale la subjekto estas ‘tio’, sed ne la ke-subpropozicio, kaj tial ĝi prenas adjektivon ‘vera’ kiel predikativo.

Kaj kiel ni vidas en la ekzempla frazo ②, kiam la ĉefpropozicio ne estas demanda propozicio, tiam la formala subjekto ‘tio’ estas subkomprenata, kaj uziĝas adverbo kiel la predikativo.

Kaj jen ni devas atenti, ke ni ne konfuzu la ekemplan frazon ② kun la ‘sensubjekta frazo’ kiun ni vidos poste. En la ekzempla frazo ② evidente

ekzistas subjekta subpropozicio, kaj la kialo, ke ĝi prenas adverbos kiel predikativo estas nur tio, ke la subjekto aperas ne en la formo de substantivo, sed en la formo de propozicio. (Konsultu: III.3.4. Subjekta frazo kaj sensubjekta frazo)

En ③ kaj ④ la subjekta subpropozicio estas demanda propozicio, kaj tiam ĝi ofte aperas en la formo <esti + predikativo>. Kaj en tiu kazo oni uzas adverbos kiel predikativo.

III.3.3.3. Objekta subpropozicio

Objekta subpropozicio estas la subpropozicio, kiu funkcias kiel objekto de la ĉefpropozicio. Ni vidu.

- ① Mi trovis (tion), ke li amas ŝin.
- ② Mi deziras (tion), ke vi fartu bone.
- ③ Mi kredas (tion), ke ĝi plaĉus al vi.
- ④ Oni esploras, ĉu la rivero estas sufiĉe profunda.
- ⑤ Mi ne scias, kion li diris.
- ⑥ Li demandis min(al mi), kiam li revenu.
- ⑦ Mi ne komprenas, kial li kolerus.

En la ekzemploj ①, ② kaj ③ la ke-subpropozicioj funkcias kiel objektoj de la predikatoj (trovis, deziras, kredas) de la ĉefpropozicioj. Ili do estas objektaj subpropozicioj. Kaj en tiu kazo ni povas uzi la formalan objekton ‘tion’ post la predikato de la ĉefpropozicio.

Kaj kiel ni vidas ĉe la subpropozicioj de ①, ② kaj ③, la predikatoj

povas esti indikativo, volitivo aŭ kondicionalo. En ③ la subpropozicio estas kondicionalo, kaj en tiu kazo ni komprenas, ke post la subpropozicio estas kaŝita la kondicionala propozicio ‘se vi vidus ĝin’.

La frazoj ④, ⑤, ⑥ kaj ⑦ estas la ekzemploj, kie la subpropozicio aperas en demanda propozicio. Kaj tiam la demanda propozicio povas esti ĉu-demando aŭ ki-demando, kaj ĝi povas aperi en indikativo, volitivo, aŭ kondicionalo. La volitiva subpropozicio de la frazo ⑥ estas la mallongigita esprimo de ‘kiam mi volas, ke li revenu’, kaj la kondicionala subpropozicio de la frazo ⑦ havas la kaŝitan subpropozicion ‘se li kolerus’. Kaj ni povas interpreti la indikativan subpropozicion de ⑤ alimaniere, ke en tiu kazo la ‘kion’ ni vidas kiel rilatan pronomon. Se ni vidas tiel, la subpropozicio fariĝas rilata subpropozicio, kaj do epiteta subpropozicio. Kaj la senco de la frazo estas “Mi ne scias tion, kion li diris.”

La elekto inter tiuj du manieroj dependas de la kunteksto.

Kaj ni traktas malrektajn parolojn en tiu ĉi ĉapitro de objekta subpropozicio.

rektaj paroloj	malrektaj paroloj
Li diris: “Mi estas laca.”	Li diris, ke li estas laca.
Li riproĉis ilin: “Se vi estus homoj, vi donus al mi akvon.”	Li riproĉis ilin, ke, se ili estus homoj, ili donus al li akvon.
Mi demandis lin: “Kien vi iris?”	Mi demandis lin, kien li iris.
Mi demandis lin: “Ĉu vi estas laca?”	Mi demandis lin, ĉu li estas laca.

Ni ne nepre bezonas trakti tiujn en la nomo de ‘malrektaj paroloj’, ĉar ni povas kompreni ilin kiel objektajn subpropoziciojn aŭ adjektajn subpropoziciojn(vidu sube III.3.3.6. ‘Adjekta subpropozicio’). En angla gramatiko malrektaj paroloj estas speciale traktataj ĝuste pro tenso-ŝanĝiĝo. Sed en Esperanto, kiel ni vidas supre, troviĝas neniuj speciala traktado pri tenso(oni ĝenerale esprimas tension laŭ la natura tempo), kaj tial ni ne bezonas trakti ilin aparte.

III.3.3.4. Predikativa subpropozicio

Predikativa subpropozicio funkcias kiel predikativo de la ĉefpropozicio. Ni vidu.

- ① La vero estas (tio), ke li amas ŝin.
- ② La ordono estis (tio), ke ni ekiru frumatene.
- ③ La demando estas, ĉu li vizitis ŝin aŭ ne.
- ④ La problemo estas, kiam ni ekiru.
- ⑤ La afero ŝajnis, kvazaŭ li mortigus ŝin.

La subpropozicioj de ① kaj ② en supraj ekzemploj funkcias kiel la predikativoj de la ĉefpropozicioj, kaj tial ni nomas ilin predikativaj subpropozicioj. Kaj tiam ni povas plu uzi la formalan predikativon ‘tio’ en la ĉefpropozicio.

Kaj tiuj predikativaj subpropozicioj povas aperi en indikativo kiel en ①, aŭ en volitivo kiel en ②.

La demandaj subpropozicioj de ③ kaj ④ ankaŭ estas predikativaj

subpropozicioj, funkcionatj kiel la predikativoj de la ĉefpropozicioj. Kaj tiam la subjektoj de la ĉefpropozicioj estas ordinare ‘demando’ kaj ‘problemo’, kaj la demandaj subpropozicioj povas aperi en indikativo aŭ volitivo.

En la ekzempla frazo ⑤, kie ‘kavazaŭ’ estas uzata kiel la subjunkcio, la subpropozicio funkcias kiel la predikativo de la ĉefpropozicio, kaj do ĝi estas nomata predikativa subpropozicio. Tiu subpropozicio povas esti traktata kiel unu el la eksplikaj subpropozicioj laŭ ĝia senco. Sed ĝi estas malsama ol la eksplikaj subpropozicioj de ① kaj ②, kiel ni vidas jene:

Unue, la subjunkcio ne estas ‘ke’, sed ‘kvazaŭ’.

Due, la subpropozicio aperas en kondicionalo, kiu esprimas supozon malan al la realo.

Ĉi tie ni devas atenti, ke la ‘kvazaŭ’, uzata kiel subjunkcio, povas konduki du specojn de subpropozicioj: predikativa subpropozicio kaj adjekta subpropozicio. La adjektan subpropozicion ni pristudos poste. Kaj en ambaŭ kazoj la subpropozicio devas aperi en kondicionalo. Ni do povas diri, ke la subpropozicio kondukata de ‘kvazaŭ’ estas ĉiam supozo mala al la realo.

Kaj ĉiuj subjektaj kaj objektaj subpropozicioj kaj plejparto de la predikativaj subpropozicioj estas uzataj kiel substantivo, kaj ni nomas ilin substantivaj subpropozicioj.

III.3.3.5. Epiteta subpropozicio

Epiteta subpropozicio funkcias kiel epiteto de la ĉefpropozicio, kaj ĝi modifas(nome kvalifikas, determinas aŭ eksplikas) frazelementojn de la

ĉefpropozicio krom la predikato. Ni vidu.

- ① Ĝi estas la libro, kiun mi aĉetis hieraŭ.
- ② Ĝi estas la libro, kies aŭtoro estas fama profesoro.
- ③ Mi vidis virinon, kian mi longe serĉis.
- ④ Ĉu ekzistas saĝa homo, kiu komprenus tion? (Neniu komprenas tion.)
- ⑤ La fakto, ke li amas ŝin, surprizis min.
- ⑥ Mi ricevis telegramon, ke mi tuj venu al la kunsido.
- ⑦ Mi aŭdis onidiron, ke li helpus ŝin (, se ŝi petus lin).
- ⑧ Li skribis la leteron tre fuŝe, ke neniu povis legi ĝin.
- ⑨ Li skribis la leteron tiel, ke neniu povis legi ĝin.
- ⑩ La problemo, ĉu li vere aperos aŭ ne, ankoraŭ turmentas ŝin.
- ⑪ Mi ne ricevis ordonon, kiam mi revenu.
- ⑫ Mi ne aŭdis lian respondon, kiam li komencus la laboron, (se ni interkonsentus, ke li ĝin faru).
- ⑬ Hodiaŭ matene, kiam li vizitis min, mi estis for.
- ⑭ La kato kuras en la ĝardenon, kie estas multaj belaj floroj.
- ⑮ Tiu, kiu donis ĝin al vi, estas mia amiko.
- ⑯ Ĉiuj, kiuj sciis la aferon, tre multe koleriĝis.
- ⑰ Tio, kion vi scias, ne estas fakto.
- ⑱ Mi ne scias tion, kion vi diras.
- ⑲ (Tiu) Bone ridas, kiu laste ridas.

La subpropozicioj de la ekzemploj ①~④, kondukataj de rilataj pronomoj, funkcias kiel epitetoj, modifantaj la rilatatojn, kaj tial ili estas epitetaj subpropozicioj. Tiam la rilataj subpropozicioj aperas ordinare en

indikativo, sed foje ankaŭ en kondicionalo. Tre malofte ĝi povas aperi en volitivo, sed tio estas nur escepta kazo. (ekz: La aŭtoro, kies granda fervoro estu laŭdata, amasigis en sia libro multegan materialon.)

Ankaŭ la ke-subpropozicioj de ⑤~⑨ modifas(t.e. eksplikas) la subjekton aŭ la objekton de la ĉefpropozicioj, kaj tial ili estas traktataj kiel epitetaj subpropozicioj. Ankaŭ en tiu kazo ili povas aperi en indikativo, volitivo aŭ kondicionalo.

En ⑩~⑫ la ĉu-demandaĵ kaj ki-demandaĵ subpropozicioj estas epitetaj subpropozicioj, ĉar ili modifas(t.e. eksplikas) la subjekton aŭ la objekton de la ĉefpropozicioj. Ankaŭ en tiu kazo ili povas aperi en indikativo, volitivo aŭ kondicionalo.

Kaj en ⑬ la subpropozicio, kondukata de relativa adverbo ‘kiam’, kiu montras tempon, determinas la adjekton de la ĉefpropozicio ‘hodiaŭ matene’. En ⑭ ankaŭ la subpropozicio, kondukata de la relativa adverbo ‘kie’, kiu montras lokon, determinas la adjekton de la ĉefpropozicio ‘en la ĝardenon’. Ili do funkcias kiel epitetoj, kaj estas traktataj kiel epitetaj subpropozicioj.

La epitetaj subpropozicioj(rilataj subpropozicioj) de ⑮~⑰ havas paran rilaton de tabelaj vortoj, nome ‘tiu-kiu, ĉiu-kiu, tio-kio’. Kaj en tiu kazo ni traktas la rilatajn subpropoziciojn kiel epitetaj subpropozicioj, kiuj determinas la rilatatojn. Ni povas elimini la rilatatojn, se tio ne malhelpas komprenon. (ekz: Kion vi scias, ne estas fakto. Mi ne scias, kion vi diras.)

Kaj la ekzempla frazo ⑱ estas esprimo de proverbo, kaj en tiu kazo ni povas elimini la subjekton por mallongigi la esprimon.

III.3.3.6. Adjekta subpropozicio

Adjekta subpropozicio funkcias kiel adjekto de la ĉefpropozicio.

Same kiel adjekto mem, la adjekta subpropozicio povas dividiĝi al diversaj specoj. PAG(Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto; 1980, UEA) dividas ĝin al tre multaj specoj laŭ ĝiaj sencoj, kaj prezentas ilin tre detale en sufiĉe multaj paĝoj.

Sed jen ni klasifikas ĝin nur laŭ la morfologia vidpunkto. La nura kriterio estas ‘formo’.

1) Adjekta subpropozicio kun la subjunkcio ‘ke’

- ① Mi ĝojas/dankas, ke vi venis tiel frue.
- ② Mi estas furioza, ke mi staras kiel malpravulo, dum mi estas prava.
- ③ Trapiku lin, (por) ke li momente falu.
- ④ Li kaŝis ĉion, (por) ke neniu malkovru ĝin.
- ⑤ La problemo estis (tiel) malfacila, ke neniu povis solvi ĝin.
- ⑥ Subite regis (tia) silento, ke ne blovis eĉ vento.

La ke-subpropozicioj de la supraj ekzemploj ĉiuj funkcias kiel la adjektoj de la ĉefpropozicioj, kiuj esprimas la cirkonstancojn de la predikatoj. En ① kaj ② ĝi esprimas la kaŭzon aŭ kialon, kaj en ③ kaj ④, la celon, kaj en ⑤ kaj ⑥, la rezulton.

Kiam uziĝas la ‘ke’, esprimanta kaŭzon aŭ kialon, oni povas plu uzi ‘tial, pro tio, ktp’ en la ĉefpropozicio. Kaj ĉe la kazo de rezulto oni povas plu uzi ‘tiel, tiamaniere, tia, ktp’ en la ĉefpropozicio. Ĉe la kazo de celo oni uzas

volitivon en la subpropozicio kaj povas plu uzi la prepozicion ‘por’ antaŭ ‘ke’.

2) Adjekta subpropozicio kun la subjunkcio ‘ĉu... ĉu...’

Kiam ‘ĉu’ estas uzata ne kiel demanda adverbo, sed kiel subjunkcio en la formo de ‘ĉu... ĉu...’, kaj kondukas propozicion, ĝi estas traktata kiel adjekta subpropozicio, kaj la senco estas ‘duba, necerta elekto’ aŭ ‘alternativo’.

- ① Ĉu li estas al ni amiko, ĉu malamiko, ni akceptos lin kiel gaston.
- ② Ĉu li faris tiel pro timo, ĉu pro fiereco, la rezulto detruis lin.
- ③ Ĉu ni iru kun li, ĉu sen li, ni decidu per voĉdono.

3) Adjekta subpropozicio kun rilativoj

Iuj rilataj subpropozicioj, kondukataj de rilativoj, estas uzataj kiel adjektoj. Ili dividiĝas al ‘lokaj, tempaj, manieraj kaj kvantaj’ adjekto-subpropozicioj.

3-1) lokaj adjekto-subpropozicioj

Ili estas adjektaj subpropozicioj kun lokaj rilativoj, kaj estas uzataj en la respondoj de la demandoj, kiuj havas la demandajn adverbojn ‘kie, kien, de kie, ĝis kie, ktp’.

Kaj kiam aperas paro de tabelaj vortoj(montraj tabelvortoj kaj rilativoj), kiel ‘tie-kie, tien-kien, de tie-kie, ĝis tie-kie’, la subpropozicioj estas

traktataj kiel epitetaj subpropozicioj, modifantaj la antaŭajn montraĵn tabelvortojn(tie, tien, ktp)

Sed se la montra tabelvorto estas eliminata, la subpropozicio fariĝas adjekta subpropozicio.

En ambaŭ kazoj ili estas adjektaj subpropozicioj laŭ la senco.

① La rato kuris tien, kie ludas la kato. [epiteta subpropozicio]

② La rato kuris (tien), kien kuris ankaŭ la kato. [adjekta subpropozicio]

Kaj kiel en la frazoj ③ kaj ④, la rilataj subpropozicioj, modifantaj la loko- rilatatojn(ĝardenon, supren), estas ne adjektaj subpropozicioj, sed epitetaj subpropozicioj. (Konsultu la parton de ‘epiteta subpropozicio’)

③ La rato kuris en la ĝardenon, kien kuris ankaŭ la kato.

④ La rato kuris supren, kien kuris ankaŭ la kato.

La rilata adverbo ‘kien’ de ③ povas anstataŭiĝi per ‘en kiun’.

3-2) tempaj adjekto-subpropozicioj

Ili estas adjektaj subpropozicioj kun tempaj rilativoj, kaj estas uzataj en la respondoj de la demandoj, kiuj havas la demandajn adverbojn ‘kiam, de kiam, ĝis kiam, kiel longe, ktp’. Ĝiaj subjunkcioj estas ‘kiam, se(en la senco de tempo), kiomfoje, post kiam, antaŭ ol, apenaŭ, de kiam, ĝis, dum, ktp’.

① Kiam mi vidis lin, li estis tute malseka.

- ② Ĉu vi min ĉiam helpos, se mi vin petos?
- ③ Kiomfoje li ŝin rememoris, liaj okuloj pleniĝis de larmoj.
- ④ Li ekiris, post kiam ŝi forlasis la domon.
- ⑤ Li forlasis la domon, antaŭ ol ŝi vizitis lin.
- ⑥ Li restas muta, de kiam li spertis la akcidenton.
- ⑦ Legu la libron, ĝis mi revenos.
- ⑧ Ŝi senĉese ridegis, dum li parolis al ŝi.

Same kiel en la lokaj adjekto-subpropozicioj, se la subpropozicio estas kondukata de ‘tiam-kiam’, kiel en ⑨~⑪ ĉi sube (t.e. se uziĝas paro de tabelaj vortoj(montraj tabelvortoj kaj rilativoj)), kaj se la subpropozicio aperas en la formo de rilata subpropozicio, modifanta la antaŭan adjekton, ni traktas ĝin kiel epitetan subpropozicion, ne kiel adjektan subpropozicion.

- ⑨ Mi estis en la lito tiam, kiam mia amiko venis al mi.
- ⑩ Li vizitis min en la momento, kiam mi estis ekironta.
- ⑪ Li vizitis min hieraŭ vespere, kiam mi estis ekironta.

Kaj la rilatan adverbon ‘kiam’ de ⑩ ni povas anstataŭi per ‘en kiu’.

3-3) manieraj kaj kvantaj adjekto-subpropozicioj

En subaj ekzemploj la subpropozicio estas adjekta subpropozicio uzata kiel adjekto de la ĉefpropozicio, kaj tie la subjunkcioj estas ordinare ‘kiel, kiom, ktp’. La sencoj de tiuj subpropozicioj estas ĝenerale maniero kaj kvanto.

- ① Li baraktis kiel fiŝo ekster la akvo.
- ② Ŝi estas bela kiel anĝelo.
- ③ Li fariĝis kiel ŝtono.
- ④ Donu al mi la eblon mori kiel kristano.
- ⑤ Kiel(Kiom) ajn malmulte vi pagos, mi estos kontenta.
- ⑥ Li prenis fruktojn, kiom li povas preni.
- ⑦ Oni akceptis lin kiel reĝon. (Fakte li estas reĝo.)

Kaj same kiel en la lokaj kaj tempaj adjekto-subpropozicioj, se la subpropozicio estas kondukata de ‘tiel-kiel, tiom-kiom’, kiel en ⑧~⑪ ĉi sube (t.e. se uziĝas paro de tabelaj vortoj(montraj tabelvortoj kaj rilativoj)), kaj se la subpropozicio aperas en la formo de rilata subpropozicio, modifanta la antaŭan adjekton, ni traktas ĝin kiel epiteta subpropozicio, ne kiel adjekta subpropozicio.

- ⑧ Li agas tiel, kiel plaĉas al li.
- ⑨ Ŝi estas tiel bela, kiel la patrino.
- ⑩ Manĝu tiom, kiom vi povas.
- ⑪ Li amis ŝin vere elkore, kiel neniu povas fari tiel.

4) Adjektaj subpropozicioj kun ceteraj subjunkcioj

Plejparto de la subjunkcioj apartenas al tiu ĉi kategorio. (Konsultu II.2.2.8. Junkcioj)

- ① Ĉar vi venis tro malfrue, vi ne povas ricevi vian porcion. [kondiĉo]

- ② Kiam vi mensogis, oni rajte vin punis. [kondiĉo]
- ③ Mi donus al vi multan monon, se mi fariĝus riĉulo. [supozo]
- ④ Se vi ne semos, vi ne rikoltos. [kondiĉo]
- ⑤ Mi scias nenion, kvankam mi multe lernis. [koncedo]
- ⑥ Li eliris, malgraŭ (spite) ke lia patro malpermesis. [koncedo]
- ⑦ Ni ekskursos, eĉ se la vetero estos malbona. [koncedo]
- ⑧ Oni akceptis lin kvazaŭ reĝon. [supozo]
- ⑨ Vi devas konduti, kiel se vi estus malriĉulo. [supozo]

5) Adjektaj subpropozicioj de komparativo kaj superlativo

Laŭ PAG(1980, UEA: ĉapitroj 262-263) ekzistas tre diversaj komparaj subpropozicioj. Ĝi dividas ilin en du grandajn kategoriojn, nome ‘indika komparo’ kaj ‘supoza komparo’. Indika komparo estas kompari ion kun io reala, kaj supoza komparo estas kompari ion kun io supozata.

Kaj ĝi ankaŭ dividas ilin alimaniere, nome en la kategoriojn de ‘samgradiga komparo’ kaj ‘disgradiga komparo’. Semantike ili povas plu dividiĝi en diversajn kategoriojn, ekzemple ‘agokomparoj’, ‘kvalitkomparoj’, ‘manierkomparoj’, ‘aĵo-komparoj’, ‘kvantokomparoj’, ‘komparoj paraleligaj’ kaj ‘identigo’.

Sed mi dubas, ĉu vere necesus tiel komplika kaj tro semantika klasifiko. Ĉi tie mi volas studi la komparajn subpropoziciojn laŭ sintaksa vidpunkto, ne laŭ semantika vidpunkto, kaj tial la klasifiko de PAG ne taŭgas por nia studo. Krom tio, laŭ mia penso, povus ekzisti pliaj metodoj dividi la komparajn subpropoziciojn, se ni volus pli detale dividi ilin laŭ la semantika vidpunkto. Ili povus dividiĝi preskaŭ senlime, kaj tio farus

gramatikon nehelpeble komplika.

Ĉi tie mi eksplikas ilin nur sintakse. Sed por montri, kia estas la klasifiko de PAG, mi prezentas post mia ekspliko po unu ekzemplon de PAG.

Mi faris jenan tabelon por sintakse klasifiki komparajn subpropoziciojn. Fakte la superlativo havas nenian rilaton kun kompara subpropozicio, ĉar ĝi ne esprimiĝas per komplika frazo, sed per simpla frazo. Ĝi esprimiĝas nur per la adverbo ‘plej’.

specoj	esprimaj formoj		
komparo supergrada	pli + adjektivo, advero + ‘ol’ + komparata objekto		
komparo subgrada	malpli + adjektivo, advero + ‘ol’ + komparata objekto		
komparo samgrada	‘tiel’ ‘same’ ‘egale’ ‘samgrade’ + adjektivo, advero + ‘kiel’ + komparata objekto ‘tia’ (epiteto, predikativo) ~ + ‘kia’ + komparata objekto		
superlativo supera	‘plej’ + adjektivo, advero +	‘el’ ‘en, sur’	+ amaso loko
superlativo malsupera	‘malplej’ + adjektivo, advero +	‘el’ ‘en, sur’	+ amaso loko

[ekzemploj]

- ① Li estas pli sana, ol mi.
- ② Li kantas malpli bele, ol mi.
- ③ Li estas tiel alta, kiel mi.

- ④ Ŝi havas tian floron, kian mi havas.
- ⑤ Mi estas la plej diligenta el ni.
- ⑥ Mi estas la malplej diligenta en mia klaso.

La komparata objekto povas esti unu vorto(ordinare substantivo) aŭ unu propozicio. Jen estas ekzemplaj frazoj, kie la komparataj objektoj estas propozicioj.

- ① Li estas nun pli diligenta, ol li estis antaŭe.
- ② La rato kuris tiel rapide, kiel kuris la kato.
- ③ Ŝi estas tia, kia estis ŝia patrino. (predikativa subpropozicio de komparo)

<la klasifiko de PAG>

(1) indikaj komparoj

- Li naĝas kiel fiŝo. [samgrada agokomparo de subjekto, per sama verbo]
- Li amas lin kiel filon. [samgrada agokomparo de objekto, per sama verbo]
- Li pensas eĉ nun, kiel (li pensis) en la infaneco. [samgrada agokomparo de adjekto, per verbo malsam-tensa]
- Li hezitas kiel tiam, kiam li alparolas virinon. [komparo de la karaktero de la subjekto kun iu reala situacio]
- Vi parolas, kiel se vi konfesas ian gravan sekreton. [same kiel supre]
- Li malaperis en mallumon, kiel nebulo malaperas sub la suno. [samgrada agokomparo, per malsama verbo]

- Ĉio okazis, kiel mi deziris. [samgrada agokomparo, en la koro]
- Ŝi havas manojn blankajn kiel neĝo. [samgrada kvalitkomparo, per adjektiva epiteto]
- Ŝiaj manoj estas blankaj kiel neĝo. [samgrada kvalitkomparo, per predikativo]
- Lia pugno estas kiel fero. [samgrada aĵo-komparo, per <'kiel'+predikativo>]
- Li estas tia sama homo, kiel mi. [samgrada aĵo-komparo, per <'kiel'+vorto>]
- Restu ĉiam tia, kia vi estas. [samgrada aĵo-komparo, per <'kia'+propozicio>]
- Li verkas poemon tiel turmente, kiel virino naskas infanon. [samgrada manierkomparo]
- Mi gajnis tiom, kiom mi perdis. [samgrada kvantokomparo]
- Mi estas tiel stulta, kiel li. [samgrada mezurkomparo, per alia persono]
- Li estas tiel stulta, kiel bela. [samgrada mezurkomparo, per siaj karakteroj]
- Kiel vi semas, tiel vi rikoltos. [samgrada paraleliga komparo]
- Ju pli multe oni havas, des pli multe oni avidas. [samgrada paraleliga komparo]
- Mi venis kiel delegito. [samgrada agoidentigo]
- Mi restas ĉe tiu sama opinio, kiun mi esprimis hieraŭ. [samgrada kvalitidentigo, per rilata propozicio]
- Li restas tiu sama infaneca homo, kiel antaŭe. [samgrada kvalitidentigo, per unu vorto post 'kiel']
- Mi amas vin pli ol lin. [malsamgrada agokomparo]

- Lia mieno estis pli luma ol la suno. [malsamgrada kvalitkomparo]
- Li trovis la juvelon pli facile, ol oni trovas akvon. [malsamgrada manierkomparo]
- Vi ricevis pli multe ol mi. [malsamgrada kvantkomparo]
- Li estas pli sana, ol mi. [malsamgrada mezurkomparo, per alia persono]
- Li estas pli malica, ol saĝa. [malsamgrada mezurkomparo, per siaj karakteroj]
- Mi preferas resti silenta, ol paroli. [malsamgrada neparaleliga komparo]
- Ju pli oni avidas, des malpli oni perdos. [malsamgrada neparaleliga komparo]
- Venis alia homo, ol (tiu) kiun mi atendis. [malsamgrada neidentigo]

(2) supozaj komparoj

- Neniam oni estas tiel malfeliĉa, kiel se oni perdis sian infanon.
[komparo per teoria kazo]
- Li veis, kiel se al iu oni eltiras la dentojn. [komparo per ebla kazo]
- Ili amis sin reciproke, kvazaŭ ili estus fratoj. [komparo per supozita kazo]

III.3.4. Subjekta frazo kaj sensubjekta frazo

Ordinare ĉiuj frazoj havas subjekton. Sed en specialaj kazoj oni ne uzas subjekton. Ĝuste tio estas unu el la specialaj trajtoj de Esperanto. Ĉi tie mi traktas nur sensubjektajn frazojn.

Sensubjekta frazo estas la frazo, en kiu logike ne ekzistas subjekto. Ĝi

estas malsama ol la frazo, en kiu subjekto estas eliminata. Se ni diras, ke io estas eliminata, tio signifas, ke ĝi origine ekzistis, sed nur momente ĝi estas eliminata. Sed se ni diras, ke io ne ekzistas, tio signifas, ke ĝi ne ekzistas de komence.

La sensubjekta frazo estas uzata en jenaj kazoj.

① meteologia fenomeno:

Pluvas. Neĝas. Tondras.

② fizika impresio:

Estas varme. Estas freŝe.

③ konveneco al sia volo aŭ al la situacio:

Estas bone. Estas necese.

④ kutima uzo:

Temas pri Esperanto-movado.

Se plaĉas al vi,....

Kiel plaĉas al vi?

Ili, ŝajnas, devis fari tiel.

Inter supraj kazoj ni devas atenti ② kaj ③. En tiuj kazoj la predikativoj ne estas adjektivoj, sed adverboj. Ni devas ne konfuziĝi inter tiu kazo kaj la kazo, kiam ni devas uzi adverban predikativon. Jen mi prezentas la kazojn, kiam ni devas uzi adverban predikativon.

① ĉe la kazo de sensubjekta frazo

② ĉe la kazo, kiam la subjekto estas propozicio aŭ infinitivo

Tio diras, ke jenaj frazoj ne estas sensubjektaj frazoj.

① Estas bone, ke li lernas Esperanton.

② Mensogi estas malbone.

Ĉi-supra ekzemplo ① havas la esprimon ‘Estas bone’, sed ĝi ne estas sama kiel tiu de la sensubjekta frazo ③. En supra ekzemplo ① evidente ekzistas subjekto, kiu estas subpropozicio, kondukita de ‘ke’. Kaj la signifo de la frazo estas: ‘La afero, ke li lernas Esperanton, estas bona.’ Sed en la sensubjekta frazo ③ ne ekzistas subjekto, kaj ĝia signifo estas: ‘Mia humoro aŭ la situacio estas bona.’

Estas facile distingi ilin. Se la frazo finiĝas ĉe ‘Estas bone’, kaj ne plu havas iun alian vorton, ĝi estas sensubjekta frazo. Sed se post la frazo venas subpropozicio kondukita de ‘ke’, ĝi ne estas sensubjekta frazo, sed ĝi estas la kazo, kiam oni uzas adverban predikativon.

Rilate al sensubjekta frazo, ni havas unu problemon. Kiel ni devas trakti jenajn frazojn?

① Estas la sepa posttagmeze.

② Estas printempo.

③ Estas tempo iri al lito.

La verbo ‘esti’ en supraj ekzemplaj frazoj havas origine du uzojn. Unue, ĝi estas kompleta netransitiva verbo kun la signifo ‘ekzisti’. Due, ĝi estas nekompleta netransitiva verbo, kopulo, kiu kunigas la predikativon kun la subjekto. Se etas tiel, kun kiuj signifoj estas uzitaj la ‘estas’ en supraj

frazoj? Bedaŭrinde ili estas uzitaj kun neniuj el ambaŭ signifoj de la verbo ‘esti’.

Se ili estas uzataj kiel kompletaj netransitivaj verboj, la sekvantaj vortoj devas esti subjektoj. Kaj la signifoj de la frazoj respektive devas esti ‘ekzistas la sepa posttagmeze’, ‘ekzistas printempo’ kaj ‘ekzistas tempo iri al lito’. Tio estas stranga klarigo.

Kaj se ili estas uzataj kiel nekompletaj netransitivaj verboj, la sekvantaj vortoj devas esti aŭ subjektoj aŭ predikativoj. Se ili estas subjektoj, tiam do mankas predikativoj, kaj inverse se ili estas predikativoj, tiam do mankas subjektoj. Ankaŭ tio ne povas esti ĝusta klarigo gramatika.

Se estas tiel, ni devus ilin konsideri kiel sensubjekta frazo aŭ gramatike erara frazo. Sed ili ne apartenas al tiu kategorio de sensubjekta frazo, kiun ni pristudis ĝis nun. Tial ni ne traktas ilin kiel sensubjekta frazo. Ĉu ili do estas eraraj? Ne, ĉar ĝis nun multaj homoj uzadis tiujn esprimojn. Kaj tial ni devas kiel ajn klarigi ilin gramatike.

Por solvi la problemon, mi aldonas unu plian funkcion al la verbo ‘esti’, nome ‘tenso-indiki’. Tio estas, ke la verbo ‘esti’ en tiu kazo havas nur gramatikan funkcion de ‘tenso-indiki’. La vorto ‘estas’ havas nur la gramatikan signifon de prezenco, kaj ‘estis’ nur tiun de preterito, kaj ‘estos’ nur tiun de futuro. Alivorte mi pensas ĉi tiel: <estas = as, estis = is, estos = os>. (Kp: PAG(ĉapitro 193) vidas, ke la substantivoj en la ① kaj ② estas subjektoj.)

III.3.5. Indikativa frazo·Volitiva frazo·Kondicionala frazo

Pri la indikativa frazo, volitiva frazo kaj kondicionala frazo, kiuj estas

klasifikitaj laŭ modoj, mi jam klarigis en la parto de finitivo(II .4.1.).

III.3.6. Priskriba frazo kaj Demanda frazo

Laŭ ekzisto de demandaj vortoj dividiĝas priskriba frazo kaj demanda frazo. Krom demanda frazo ĉiuj aliaj estas priskribaj frazoj, kaj pri ili ni jam bone scias. Ĉi tie mi traktas nur demandajn frazojn.

Oni dividas demandojn al ĉu-demandoj kaj ki-demandoj.

III.3.6.1. Ĉu-demanda frazo

Ĉu-demanda frazo estas farita per la demanda adverbo ‘ĉu’. Ni uzas la demandan adverbon ‘ĉu’ ĉe la komenca loko de priskriba frazo. Kaj la demanda frazo demandas pri la vereco de la frazo, kaj ĉe la respondo ni uzas ‘jes’ aŭ ‘ne’. Ni vidu.

① Ĉu li laboras diligente?

(⇐ Li laboras diligente.)

② Ĉu li ne laboras diligente?

(⇐ Li ne laboras diligente.)

③ Jes, li laboras diligente.

④ Ne, li ne laboras diligente.

La demandaj frazoj ① kaj ② estas faritaj respektive el la priskribaj frazoj en la krampoj kun la aldono de ‘ĉu’ ĉe la komenco de la frazoj. La frazo ① estas pozitiva demanda frazo kaj ② estas negativa demanda frazo. La respondo al la demando estas unu el la frazoj ③ kaj ④. La maniero de

respondo al negativa demando diferencas en korea lingvo kaj Esperanto.

En la korea se la respondanto konsentas pri la opinio de la demandanto, tiam li respondas per ‘jes’. Se ne, per ‘ne’. Sed en Esperanto, sendepende de la vortoj de la demandanto, se la respondo estas pozitiva frazo, la respondanto uzas ‘jes’, kaj se ĝi estas 세계에스페란토청년대회, li uzas ‘ne’.

III.3.6.2. Ki-demanda frazo

Ki-demanda frazo estas farita per la demandaj vortoj ‘kio, kiu, kia, kie, kiam, kiel, kial, kiom, kies’. Ĝi ne demandas pri la vereco de la frazo, sed postulas iun apartan informon. Kaj tial ĉe la respondo al la demando oni ne uzas ‘jes’ aŭ ‘ne’, sed oni devas doni la informon postulitan. Ni vidu.

- ① Kiu vi estas? — Mi estas Petro.
[demando pri individuo, homo, objekto]
- ② Kio estas tablo? — Tablo estas meblo.
[demando pri ideo, objekto]
- ③ Kia estas Esperanto? — Ĝi estas facila.
[demando pri priskribo, kvalito]
- ④ Kie estas via patro? — Li estas en la ĉambro.
[demando pri loko]
- ⑤ Kiam li venos? — Li venos morgaŭ.
[demando pri tempo]
- ⑥ Kiel vi fartas? — Mi fartas bone.
[demando pri metodo, stato, grado]

⑦ Kial li ridas?—Li ridas, ĉar li estas feliĉa.

[demando pri kaŭzo, motivo]

⑧ Kiom vi manĝis?—Mi manĝis multe.

[demando pri kvanto]

⑨ Kies libro estas ĝi?—Ĝi estas lia libro.

[demando pri posedo]

Esperanto havas naŭ ki-demandajn vortojn. Ili estas inkluditaj en tiel nomataj 45 tabelaj vortoj. La sencojn de la demandaj vortoj mi montris supre. Kaj jen mi traktas kelkajn aferojn, kiujn ni devas atenti.

Unue, multaj miskomprenas, ke la pronomo ‘kiu’ estas uzata nur por homoj. Sed tio estas erara. La fundamenta senco de ‘kiu’ estas demando pri individueco de homo aŭ objekto. Kaj tial la frazo “Kiu estas tablo?” ne estas eraro. Ĝi demandas, kiu el la objektoj(vidataj antaŭ la okuloj de la interparolantoj) estas tablo. Ĝi estas malsama ol la demando “Kio estas tablo?”, per kiu oni postulas la klarigon de tablo mem.

Due, ĉar la vorto ‘kiel’ demandas ankaŭ pri stato, ĝi povas esti uzata ankaŭ kun la verbo ‘esti’. Kaj tial ni povas diri ne nur “Kiel li vivas?—Li vivas feliĉe.” aŭ “Kiel li manĝas?—Li manĝas rapide.”, sed ankaŭ “Kiel li estas?—Li estas sekure.”.

Trie, la demanda vorto pri grado ne estas ‘kiom’, sed ‘kiel’. La vorto ‘kiom’ demandas nur pri kvanto, kaj ĝi ne estas uzata por demandi pri grado. Kaj tial pli bone estas diri “Kiel bela ŝi estas?” ol “Kiom bela ŝi estas?”.

Kvare, ĉiuj demandaj vortoj estas uzataj ankaŭ kiel rilataj vortoj.

III.3.6.3. Ceteraj demandaj frazoj

Krom la divido de ĉu-demando kaj ki-demando, oni ankoraŭ povas dividi la demandajn frazojn laŭ alia vidpunktoj. T.e. la divido de aldona demando kaj dependa demando.

Aldona demando estas la esprimo “ĉu ne?”, kiu aldoniĝas post priskriba frazo, kaj ĝi ŝanĝas la tutan frazon al demanda frazo. Ĝi havas la signifon de konfirmo. La formo de la aldona demando estas ĉiam “ĉu ne?”, senkonsidere ĉu la antaŭa frazo estas pozitiva aŭ ne.

Dependa demando estas demanda subpropozicio en kompleksa frazo. Kaj ĝi ne povas ŝanĝi la tutan frazon al demando, malsame ol la aldona demando. Kompreneble se la ĉefpropozicio mem estas demando, tiam la tuta frazo estas demando.

① Mi ne scias, ĉu li vere venos aŭ ne.

② Ĉu vi scias, ĉu li vere venos aŭ ne?

La demanda propozicio ĉe la frazo ① funkcias kiel subpropozicio de priskriba ĉefpropozicio. Kaj tiu ĉe ② funkcias kiel subpropozicio de demanda ĉefpropozicio. Tial la tuta frazo ① estas priskriba frazo, kaj ② estas demanda frazo.

III.3.7. Pozitiva frazo kaj Negativa frazo

Laŭ la ekzisto de negativa vorto oni povas dividi pozitivan frazon kaj negativan frazon. Mi pensas, ke mi ne bezonas klarigi la pozitivan frazon. Jen mi klarigos nur la negativan.

Kiel negativaj vortoj ekzistas la negativa adverbo ‘ne’, kiu neas verbon, kaj la 9 neaj tabelvortoj neaj(neniu, nenio, nenia, nenie, neniam, neniel, nenial, neniom, nenies). Kaj krom ili la adverbo ‘apenaŭ’ uziĝas kun negativa senco. Ni vidu.

- ① Mi ne scias ĝin.
- ② Mi renkontis ne lin, sed lian patron.
- ③ Mi scias nenion.
- ④ Mi ne scias ĉion.
- ⑤ Mi apenaŭ aŭdas vin.

La supra ekzemplo ① estas tipa negativa frazo, en kiu la adverbo ‘ne’ estas uzita antaŭ la verbo, kaj tiel ĝi neas la tutan frazon. Sed en la frazo ② la adverbo ‘ne’ estas uzita ne antaŭ la verbo, sed antaŭ la substantiva objekto, kaj tiel ĝi neas nur la objekton.

Kaj en ③ la pronomo ‘nenio’ men estas negativa vorto. Tiaj pronomoj ne ekzistas en korea lingvo, kaj tial por koreoj kompreni la nocion de negativa pronomo estus iom malfacile. Ĉiukaze se uziĝas neaj tabelvortoj, ili faras la frazojn komplete negativaj. Kaj la frazo ④ estas en parta negativo, kaj tiam uziĝas la totalaj tabelvortoj ‘ĉiu, ĉio, ĉia, ĉie, ĉiam, ĉiel, ĉial, ĉiom, ĉies’. Alivorte <‘ne’ + totalaj tabelvortoj> faras partan negativon, kaj <neaj tabelvortoj> faras kompletan negativon.

Kaj en ⑤ la vorto ‘apenaŭ’ estas origine adverbo, kies signifo estas ‘ne pli multe ol’ aŭ ‘ne tute tiom’. Sed ĝi havas la sencon de ‘preskaŭ ne’ antaŭ verboj. Kaj tial la senco de la frazo ⑤ estas “Mi preskaŭ ne aŭdas vin” aŭ “Mi ne povas bone aŭdi vin”, kaj ĝi estas uzata ordinare je telefona

interparolo. Jen estas kelkaj pliaj ekzemploj de ‘apenaŭ’: “Mi apenaŭ komprenas vin”, “Ŝi apenaŭ povis marŝi”.

III.4. Specoj de sintagmoj

Sintagmo staras meze inter propozicio kaj vorto. T.e. ĝi estas ĉeno de pluraj vortoj, sed ne kompletigas la rilaton de ‘subjekto + predikato’ kiel propozicio.

Inter diversaj lingvoj ekzistas lingvoj, ĉe kiuj la gramatika kategorio de sintagmo havas gravan signifon, sed samtempe ekzistas lingvoj, ĉe kiuj ĝi havas nenian signifon. En korea lingvo la kategorio de sintagmo ne estas tiel bezonata. Kaj ankaŭ en Esperanto sintagmo ne estas tiel grava gramatika kategorio.

La plej grava afero ĉe sintagmo, kiun ni studos de nun, estas la sintagmoj de infinitivo, participo kaj prepozicio. Sed eĉ se ni ne starigas apartan kategorion de sintagmo por ili, ni povas kontente trakti ilin ĉe aliaj partoj de la gramatiko. Ni povas trakti la infinitivan sintagmon ĉe la klarigo de infinitivo, kaj la partician sintagmon ĉe la klarigo de participo, kaj la prepozician sintagmon ĉe la klarigo de prepozicio.

Krome tiuj sintagmoj ne prezentas ian unikan gramatikan fenomenon en Esperanto. Ni do ne bezonas trakti ilin speciale. Kaj tial ĉi tie mi ne faros pli ol koncizan prezenton de sintagmo.

La specoj de sintagmoj povas esti diversaj laŭ gramatikistoj. Ĉi tie mi klasifikas ilin laŭ la formo kaj la funkcio.

III.4.1. Klasifiko laŭ formo

- adverba sintagmo
- junkcia sintagmo
- infinitiva sintagmo
- participa sintagmo
- prepozicia sintagmo

Adverban sintagmon kondukas adverbo, kaj junkcian sintagmon kondukas junkcio. Kaj ankaŭ la infinitivan, la partician kaj la prepozician sintagmojn kondukas respektive infinitivo, participo kaj prepozicio. Ni vidu.

- ① Responde al lia demando, mi nur ridis. [adverba sintagmo]
- ② Ŝi estas, kvankam malriĉa, tre feliĉa. [junkcia sintagmo]
- ③ Viziti lin estas unu el miaj taskoj. [infinitiva sintagmo]
- ④ Legante la libron, mi multe ploris. [participa sintagmo]
- ⑤ Ĝi estas la libro de mia patro. [prepozicia sintagmo]

III.4.2. Klasifiko laŭ funkcio

- subjekta sintagmo
- objekta sintagmo
- predikativa sintagmo
- epiteta sintagmo
- adjekta sintagmo

Jen ni studos la sintagmojn dividitajn laŭ la funkcio.

III.4.2.1. Subjekta sintagmo

Subjekta sintagmo estas uzata kiel subjekto en la frazo. Ni vidu.

① Ami iun estas agrabla afero.

En supra frazo la infinitiva sintagmo ‘ami iun’ funkcias kiel subjekto.

Sed kiam, ne la infinitiva sintagmo, sed la infinitivo mem sola estas uzata kiel subjekto, oni ne nomas ĝin subjekta sintagmo, sed nur subjekto. En la angla gramatiko oni traktas ankaŭ ĝin kiel subjekta sintagmo, ĉar la angla infinitivo ĉiam konsistas el du vortoj, <to + infinitivo>. Sed en Esperanto la infinitivo konsistas nur el unu vorto, kaj tial oni ne rigardas ĝin kiel sintagmo.

Sed lastatempe en transformata ĝenerala gramatiko oni traktas la substantivon kaj la pronomon mem ankaŭ kiel unu el substantivaj sintagmoj. Laŭ tiu vidpunkto ni povas rigardi kiel unu sintagmo ne nur ĉiujn substantivojn kaj pronomojn, sed ankaŭ ĉiujn infinitivojn de Esperanto. Sed mi ne sekvas tiun vidpunkton.

Kaj la subjekta sintagmo nomiĝas ankaŭ substantiva sintagmo, ĉar ĝi funkcias kiel substantivo.

III.4.2.2. Objekta sintagmo

Objekta sintagmo estas uzata kiel objekto en la frazo. Ni vidu.

① Ŝi amas aŭskulti popularan muzikon.

En supra frazo la sintagmo ‘aŭskulti popularan muzikon’ estas uzata kiel objekto, kaj ĝi estas objekta sintagmo.

Ankaŭ ĝi funkcias kiel substantivo same kiel la subjekta sintagmo, kaj tial ĝi estas nomata ankaŭ substantiva sintagmo.

III.4.2.3. Predikativa sintagmo

Predikativa sintagmo estas uzata kiel predikativo en la frazo. Ni vidu.

① Ami iun estas havi intereson pri li.

En supra frazo la infinitiva sintagmo ‘havi intereson pri li’ estas uzata kiel predikativo.

Ankaŭ tiu ĉi funkcias kiel substantivo, kaj tial ĝi estas nomata substantiva sintagmo.

III.4.2.4. Epiteta sintagmo

Epiteta sintagmo estas uzata kiel epiteto en la frazo. Ni vidu.

① Realigis la deziro renkonti lin persone.

② Mi trovis la leonon dormantan sub la arbo.

③ Ĝi estas la libro de mia patro.

En la ekzempla frazo ① la vortopo ‘renkonti lin persone’ estas infinitiva sintagmo kaj estas uzata kiel epiteto, kaj en ② la vortopo ‘dormantan sub la arbo’ estas participa sintagmo kaj estas uzata ankaŭ kiel epiteto. Kaj ankaŭ

la vortopo ‘de mia patro’ en ③ estas prepozicia sintagmo kaj estas uzata kiel epiteto.

Ili funkcias kiel adjektivo. Oni do nomas ilin ankaŭ adjektivaj sintagmoj.

III.4.2.5. Adjekta sintagmo

Adjekta sintagmo estas uzata kiel adjekto en la frazo. Ni vidu.

- ① Mi iris renkonti ŝin.
- ② Legante la libron, mi ploris pro malĝojo.
- ③ La leono dormas sub la arbo.
- ④ Komence de pasinta monato mi sendis al vi unu leteron.
- ⑤ Ĉiukaze li sekvis min, kvankam ne volonte.
- ⑥ Ĉu pro mono, ĉu pro amo, ŝi edziniĝis kun li.

En la frazo ① el supraj ekzemploj la infinitiva sintagmo ‘renkonti ŝin’ estas uzata kiel adjekto. Kaj en ② la participa sintagmo ‘Legante la libron’ estas uzata kiel adjekto. En ③ kaj ④ la prepozicia sintagmo ‘sub la arbo’ kaj la adverba sintagmo ‘Komence de la pasinta monato’ estas uzataj kiel adjektoj. Fine en ⑤ kaj ⑥ la junkciaj sintagmoj kondukataj de ‘kvankam’ kaj ‘ĉu~ĉu~’ estas uzataj kiel adjektoj.

INDEKSO

- a _ 29, 32, 37, 39, 57, 68, 75, 77, 92, 99
- ad- _ 64, 66, 69
- al _ 42
- am _ 42
- an- _ 64, 66
- ant- _ 64, 70, 71, 74
- anta _ 81
- ar- _ 64, 66
- as _ 38, 81
- at- _ 64, 70, 71, 74
- ata _ 81
- aĉ- _ 64, 66
- aj- _ 64, 66
- e _ 29, 37, 42, 76, 77
- ebl- _ 64, 66
- ec- _ 64, 66
- eg- _ 64, 66
- ej- _ 64
- el _ 42
- em- _ 64, 66
- en _ 77
- end- _ 64, 66
- er- _ 64
- es _ 39, 57, 99
- estr- _ 64
- et- _ 65, 66
- i _ 38, 66, 77
- i- _ 66
- id- _ 65, 66
- ig- _ 65, 66, 69, 71
- il- _ 65
- in- _ 65, 66
- ind- _ 65, 66
- ing- _ 65
- int- _ 65, 69, 70, 71, 74
- inta _ 81
- into _ 75
- is _ 38, 81
- ism- _ 65

-ist- _ 65
 -it- _ 65, 69, 70, 71, 74
 -ita _ 81
 -iv- _ 66
 -iz- _ 66
 -iĝ- _ 65, 66, 71
 -ĵ _ 32, 33, 36, 37, 40, 92, 93
 -n _ 32, 33, 40, 92, 94, 96
 -nj- _ 65
 -o _ 29, 30, 32, 57, 66, 74, 77, 92
 -obl- _ 65, 66
 -om _ 42
 -on- _ 65, 66
 -ont- _ 65, 70, 71
 -onta _ 81
 -op- _ 65, 66
 -os _ 38, 81, 82
 -ot- _ 65, 70, 71
 -ota _ 81
 -oz- _ 66
 -u _ 29, 32, 38, 39, 57
 -uj- _ 65
 -ul- _ 65
 -um- _ 65, 66
 -us _ 38
 -ĉj- _ 64

【A】

adjekta sintagmo _ 145, 148
 adjekta subpropozicio _ 117, 126
 adjektivo _ 30, 39
 adjekto _ 101, 108
 adverba sintagmo _ 145
 adverbo _ 30, 41, 110, 113
 afikso _ 28, 61, 69
 ajn _ 43
 aktivo _ 71
 akuzativo _ 94, 96, 99
 al _ 46
 aldonado _ 142
 almenaŭ _ 43, 49
 alofono _ 24
 ambaŭ _ 35
 ankaŭ _ 43, 49
 ankoraŭ _ 43
 anstataŭ _ 47, 52, 91
 antaspekto _ 70
 antaŭ _ 45, 46
 antaŭ ol _ 52
 apenaŭ _ 43, 52, 111, 143
 apud _ 45
 artikolo _ 57, 58
 aspekto _ 69
 aŭ _ 50, 115

【B】

baldaŭ _ 43
bedaŭrinde _ 53
bis _ 53
bo- _ 61
bone _ 53

【C】

ĉar _ 50, 118
ĉe _ 45, 46, 47
ĉi _ 43
ĉi- _ 32, 39, 42
ĉia _ 39, 143
ĉial _ 42, 143
ĉiam _ 42, 143
ĉie _ 42, 143
ĉiel _ 42, 143
ĉies _ 39, 143
ĉio _ 32, 33, 34, 143
ĉiom _ 42, 143
ĉirkaŭ _ 43, 45, 46
ĉiu _ 32, 39, 143
ĉu _ 43, 52, 111, 139
ĉu-demando _ 139
certe _ 53

【D】

da _ 48
de _ 46, 47, 48
deklinacio _ 92
demanda frazo _ 139
demanda subpropozicio _ 118
demanda vorto _ 118
des _ 43
devi _ 87, 92
dis- _ 62
do _ 50
domaĝe _ 53
dum _ 46, 52, 128
duonvokalo _ 20
durativo _ 69

【E】

eble _ 54
ek- _ 62, 69
eks- _ 62
eksplika subpropozicio _ 118
ekster _ 45
el _ 45, 46, 47, 132
en _ 45, 46, 47, 132
epiteta sintagmo _ 145, 147
epiteta subpropozicio _ 117, 123

epiteto _ 101, 108

esti _ 137, 138

eĉ _ 43, 49

eĉ se _ 52

【F】

faktitivo _ 71, 72

far _ 47

fĥ _ 53

finajo _ 28

finitivo _ 80

fonemo _ 19

fonologio _ 19

for _ 43

for- _ 64

frazelemento _ 101

frazo _ 114

futuro _ 81

【G】

ĝis _ 45, 46, 47, 52

ge- _ 62

genitivo _ 99

【H】

ha _ 53

hierau _ 43

ho _ 53

hodiau _ 43

【I】

i- _ 32, 39, 42

ia _ 39

ial _ 42

iam _ 42

ie _ 42

iel _ 42

ies _ 39

IFA _ 20

implikita subpropozicio _ 118

Indikativo _ 80

infinitiva sintagmo _ 145

infinitivo _ 85

inkoativo _ 69

intaspekto _ 70

inter _ 45, 46

interjekcio _ 30, 53

io _ 32, 33, 34

iom _ 42

iterativo _ 69

iu _ 32, 39

【J】

ĵus _ 43

ja _ 43

jam _ 43

je _ 46, 49, 98

jen _ 43

jes _ 43, 139, 140

ju _ 50

junkcia sintagmo _ 145

junkcio _ 30, 49

【K】

kaj _ 50, 115

kazo _ 93

kaŭza subpropozicio _ 118

ke _ 50, 118, 126, 137

ki- _ 32, 39, 42

ki-demando _ 139

kia _ 34, 35, 39, 40, 50, 51, 54, 118,
132, 140

kia ajn _ 52

kial _ 42, 140

kiam _ 42, 52, 140

kiam ajn _ 52

kie _ 42, 52, 140

kie ajn _ 52

kiel _ 42, 49, 50, 118, 132, 140

kiel ajn _ 52

kiel se _ 50

kies _ 39, 140

kies ajn _ 52

kio _ 32, 33, 34, 140

kio ajn _ 52

kiom _ 42, 52, 140

kiom ajn _ 52

kiu _ 32, 33, 34, 39, 140, 141

kiu ajn _ 52

kompara subpropozicio _ 118

komparo samgrada _ 132

komparo subgrada _ 132

komparo supergrada _ 132

kompleksa frazo _ 117

konceda subpropozicio _ 118

kondicionalo _ 81

konjunkcio _ 50

konsonanto _ 19

kontraŭ _ 45, 46, 47

kredeble _ 54

krom _ 47

kun _ 47, 48

kunliganto _ 110

kunmetado _ 61, 77

kvankam _ 50, 118
kvazaŭ _ 44, 52, 111, 123
kvazaŭ-interjekcio _ 53

【L】

la _ 57
laŭ _ 46, 47
liganto _ 101, 110
lo _ 53

【M】

mal- _ 62
malantaŭ _ 45
malgraŭ _ 47
malgraŭ, ke _ 52
malplej _ 132
medialo _ 71, 73
mem _ 44
memstaranto _ 101, 111
minus _ 50
mirinde _ 54
mis- _ 63
modo _ 80
momentaneo _ 69
morgaŭ _ 44

【N】

ne _ 44, 49, 139, 140, 143
negativa frazo _ 142
nek _ 50
neni- _ 32, 39
nenia _ 39, 143
nenial _ 42, 143
neniam _ 42, 143
nenie _ 42, 143
neniel _ 42, 143
nenies _ 39, 143
nenio _ 32, 33, 34, 143
neniom _ 42, 143
neniu _ 32, 39, 143
netransitiva _ 38
nombro _ 93
nominativo _ 94
nu _ 50, 53
numeralo _ 30
nun _ 44
nur _ 44, 49

【O】

objekta sintagmo _ 145, 146
objekta subpropozicio _ 117, 120
objekto _ 101, 106

obla frazo _ 115
ol _ 51, 118, 132
ontaspekto _ 70

【P】

parolelemento _ 30, 66, 101
participa sintagmo _ 145
participo _ 74
pasivo _ 71, 72
per _ 47
perfektivo _ 69
persona pronomo _ 31
plej _ 44, 132
pli _ 44
plu _ 44
pluralo _ 93
plus _ 51
po _ 48, 99
por _ 46, 48
por, ke _ 52
post _ 46, 52
povi _ 87, 92
pozitiva frazo _ 142
pra- _ 63
Pred _ 118
predikativa sintagmo _ 145, 147
predikativa subpropozicio _ 117, 122

predikativo _ 101, 104
predikato _ 101, 103
prefikso _ 61
prepozicia sintagmo _ 145
prepozicio _ 30, 110
preskaŭ _ 44
preter _ 46
preterito _ 81
prezenco _ 81
pri _ 48
pro _ 48
pronomo _ 30, 31

【R】

radiko _ 28
re- _ 63, 69
retro- _ 64
rilata pronomo _ 33
rilata subpropozicio _ 118
rilativo _ 110, 118
ruk _ 53

【S】

se _ 50, 51, 52, 82, 118
sed _ 51, 115
sen _ 48

simpla frazo _ 114
 singularo _ 93
 sintagmo _ 144
 sintakso _ 101
 sonŝanĝo _ 24
 sub _ 45, 48
 subjekta sintagmo _ 145, 146
 subjekta subpropozicio _ 117, 119
 subjekto _ 101
 subjunkcio _ 50
 subliganto _ 111
 substantivo _ 30
 sufikso _ 64
 super _ 48
 super: _ 45
 superlativo malsupera _ 132
 superlativo supera _ 132
 supoza subpropozicio _ 118
 sur _ 45, 132

【T】

tabelaj vortoj _ 31, 56
 tamen _ 51
 tele- _ 64
 tenso-indiki _ 138
 ti- _ 32, 39, 42

tia _ 35, 39, 132
 tial _ 42
 tiam _ 42
 tie _ 42
 tiel _ 42, 132
 ties _ 39
 tio _ 32, 33, 34
 tiom _ 42
 tiu _ 32, 39
 tra _ 48
 trafe _ 54
 trans _ 45
 tre _ 44
 tro _ 44
 tuj _ 44

【V】

ve _ 53
 verbo _ 30, 38
 verŝajne _ 54
 vic- _ 64
 vokalo _ 20
 voli _ 87, 92
 volitivo _ 83
 vortofarado _ 61
 voĉo _ 70



D-ro BAK Giwan estas koreo nun loĝanta en Ĉinio. Li naskiĝis en Koreio en 1956, eklernis Esperanton en 1973, kaj doktoriĝis pri Esperanta gramatiko (morfologio) en 1992 en la universitato Konkuk, Seulo, Koreio. Ekde 1985 li instruadas Esperanton kaj la korean en universitatoj en Koreio kaj Ĉinio. Li verkis kelkajn librojn pri Esperanto kaj la korea, ĉefe pri iliaj gramatikoj kaj edukado. Nun li instruas Esperanton en la Esperanto-fako de Zaozhuang Universitato en Ĉinio, ĉe tie ankaŭ troviĝas Esperanto-muzeo.

Gramatiko de Esperanto (reviziita)

Unua eldono _ 1994. jul. 15

Verkinto _ BAK Giwan

Tradukinto _ KIM Uson

Eldonejo _ Hanshin Publishing Co.